



**300 poemoj de Tang-dinastio
en Esperanto**

世译唐诗 300 首

eLibrigita de Elerno

Julio, 2020

Enhavo (目录)

| | |
|---|----|
| Tradukintoj | 11 |
| Invito al legado | 12 |
| 白居易 Bai Juyi | |
| 赋得古原草送别 Adiaŭado..... | 13 |
| 后宫词 Poemo por honordamo, Veado en la palaco..... | 13 |
| 问刘十九 Demande al Liu Shijiu..... | 13 |
| 春词 Versoj de l' printempo..... | 14 |
| 夜雪 Nokta neĝo..... | 14 |
| 买花 Aĉeti florojn..... | 14 |
| 观刈麦 Spektado al falĉado de tritiko..... | 15 |
| 长恨歌 Longa bedaŭro..... | 16 |
| 琵琶行 Rakonto pri bivludistino..... | 21 |
| 常建 Chang Jian | |
| 宿王昌龄隐居 Ĉe la loĝejo de ermito..... | 25 |
| 题破山寺后禅院 En la templo Poshan..... | 26 |
| 曹松 Cao Song | |
| 己亥岁感事 Meditado..... | 26 |
| 岑参 Cen Shen | |
| 登总持阁 Vizito al la pavilono Zongchi..... | 26 |
| 逢入京使 Renkontiĝo kun kuriero irante al Chang'an..... | 27 |
| 白雪歌送武判官归京 Adiaŭado en neĝa vetero..... | 27 |
| 陈陶 Chen Tao | |
| 陇西行 Melodio Longxixing..... | 28 |
| 陈抟 Chen Tuan | |
| 归隐 Reveno al ermitejo..... | 29 |
| 崔护 Cui Hu | |
| 题都城南庄 Ĉe vilaĝo..... | 29 |
| 崔颢 Cui Hao | |
| 长干行 Popolkanto el Changgan..... | 30 |
| 黄鹤楼 La pavilono Flava Gruo..... | 30 |
| 登黄鹤楼 Sur Flav-Grua Turo..... | 30 |
| 崔涂 Cui Tu | |
| 旅怀 Survoja ĉagreno..... | 31 |
| 孤雁 Sola sovaĝansero..... | 32 |
| 除夜有怀 Penso ĉe antaŭnokto de novjaro..... | 32 |
| 戴叔伦 Dai Shulun | |
| 江乡故人偶集客舍 Kuniĝo de samlokanoj en la loĝejo..... | 32 |
| 东方虬 Dongfang Qiu | |
| 春雪 Printempa neĝo..... | 33 |
| 杜甫 Du Fu | |

| | | |
|------------------|---|----|
| 登高 | Ascendo al altaĵo..... | 33 |
| 悲陈陶 | Lamentado pri la batalo de Chentao..... | 34 |
| 哀江头 | Malĝojemulo ĉe la riverbordo..... | 34 |
| 病马 | La malsana ĉevalo..... | 35 |
| 蜀相 | Templo memore al Zhuge Liang..... | 35 |
| 江上值水如海势聊短述 | Kiam rivero aspektas marsimila..... | 36 |
| 水槛遣心二首（之一） | Mi sentas min libera ĉe balustrade..... | 37 |
| 花鸭 | Kolora anaso..... | 37 |
| 宿府 | Tranoktado en l' oficejo..... | 37 |
| 蚕谷行 | Kanto pri silkraŭpoj kaj greno..... | 38 |
| 登岳阳楼 | Sur Yueyang-turo..... | 38 |
| 自京赴奉先县咏怀五百字 | Versaĵo farita survoje de la ĉefurbo al Fengxian-gubernio..... | 39 |
| 绝句 | Verskvaro..... | 42 |
| 漫兴 | Improvizado..... | 43 |
| 漫兴 | Okazaj pensoj..... | 43 |
| 曲江二首（其一） | Ĉe la rivero Qu..... | 43 |
| 江村 | La vilaĝo ĉe l' rivero..... | 44 |
| 南邻 | La suda najbaro..... | 44 |
| 客至 | Alven' de gasto..... | 45 |
| 春夜喜雨 | Pluvo en printempa nokto..... | 45 |
| 望岳 | Rigardo al la monto..... | 46 |
| 茅屋为秋风所破歌 | Lamento pri mia pajlkabano damaĝita de l' aŭtuna vento..... | 46 |
| 佳人 | Belulino..... | 47 |
| 初月 | Nova luno..... | 48 |
| 春望 | Pririgardo en printempo..... | 48 |
| 旅夜书怀 | Nokto ĉe gastejo..... | 49 |
| 兵车行 | Militirado..... | 49 |
| 江南逢李龟年 | Renkontiĝo kun konato en Sudlando..... | 51 |
| 阁夜 | Nokto en gastejo..... | 51 |
| 月夜忆舍弟 | Pensado pri mia frato..... | 51 |
| 月夜 | Luna nokto..... | 52 |
| 石壕吏 | Pedelo en la vilaĝo Shihao..... | 52 |
| 丽人行 | Ekskurso de belulinoj..... | 53 |
| 画鹰 | Pentraĵo de aglo..... | 54 |
| 杜牧 | Du Mu | |
| 秋夕 | En aŭtuna nokto..... | 55 |
| 清明 | Klaro kaj Brilo..... | 55 |
| 江南春 | La printempo sude de la rivero Janzio..... | 56 |
| 旅宿 | En gastejo..... | 56 |
| 独酌 | Trinkado en soleco..... | 56 |
| 长安秋望 | Aŭtuno en Chang'an..... | 57 |
| 暝投云智寺渡溪不得，却取沿江路往 | Survoje al Templo | |

| | |
|---|----|
| Yunzhi..... | 57 |
| 叹花 Lamento pri floroj..... | 57 |
| 赠别 Ĉe disiĝo..... | 58 |
| 秋日 Aŭtuna tago..... | 58 |
| 遣怀 Rimorso..... | 58 |
| 江楼 Turo ĉe rivero..... | 59 |
| 题新定八松院小石 Eta roko en Ok-pina korto..... | 59 |
| 杜秋娘 Du Qiuniang | |
| 金缕衣 Orfadena vesto..... | 59 |
| 杜审言 Du Shenyan | |
| 和晋陵陆丞早春游望 Ekskurso en frua printempo..... | 60 |
| 杜荀鹤 Du Xunhe | 60 |
| 春宫怨 Plendemo en palaco..... | 61 |
| 高蟾 Gao Chan | |
| 上高侍郎 Al vicministro Gao Pian | 61 |
| 高骈 Gao Pian | |
| 山亭夏日 Somera tago en monta kiosko..... | 61 |
| 高适 Gao Shi | |
| 别董大 Adiaŭado al amiko Dong..... | 62 |
| 除夜作 La nokto antaŭ la jarfino..... | 62 |
| 葛鸦儿 Ge Ya'er | |
| 怀良人 Sopiremo al la edzo en la foro..... | 62 |
| 顾况 Gu Kuang | |
| 宫词 Plendo de honordamo..... | 63 |
| 韩翃 Hang Hong | |
| 寒食 Tago de malvarma manĝaĵo..... | 63 |
| 酬程延秋夜即事见赠 Aŭtuna nokto..... | 64 |
| 同题仙游观 Ĉe la taŭista templo Xianyou..... | 64 |
| 寒山 Han Shan | |
| 诗五首..... | 65 |
| 韩偓 Han Wo | |
| 已凉 La vetero fridiĝas..... | 66 |
| 韩愈 Han Yu | |
| 雉带箭 Fazan' trafita sage..... | 67 |
| 初春小雨 Pluveto en frua printempo..... | 67 |
| 晚春 En malfrua printempo..... | 67 |
| 题榴花 Dediĉe al granataj floroj..... | 68 |
| 贺知章 He Zhizhang | |
| 回乡偶书二首 Improvizado pri rehejmiĝo..... | 68 |
| 咏柳 Kanto pri l' saliko..... | 69 |
| 胡令能 Hu Lingneng | |
| 小儿垂钓 Infano fiŝhokanta..... | 69 |
| 黄巢 Huang Chao | |

| | |
|--|----|
| 不第后赋菊 Spekto al krizantemo post malsukceso en ekzameno..... | 69 |
| 题菊花 Krizantemo..... | 70 |
| 自题像 Meportreto..... | 70 |
| 皇甫冉 Huangpu Ran | 70 |
| 春思 Penso en printempo..... | 70 |
| 贾岛 Jia Dao | |
| 寻隐者不遇 Sensukcesa vizito al ermito..... | 71 |
| 三月晦日送春 Adiaŭ al la printempo en ties lasta tago..... | 71 |
| 渡桑乾 Transpasi la riveron Sanggan..... | 71 |
| 皎然 Jiao Ran | |
| 寻陆鸿渐不遇 La netrovita amiko Lu Hongjian..... | 71 |
| 金昌绪 Jin Changxu | |
| 春怨 Printempa rankoro..... | 72 |
| 景云 Jing Yun | |
| 画松 Pino sur pentraĵo..... | 73 |
| 郎士元 Lang Shiyuan | |
| 柏林寺南望 Rigardo suden ĉe la templo Bolin..... | 73 |
| 李白 Li Bai | |
| 静夜思 Penso en kvieta nokto..... | 73 |
| 早发白帝城 Ekirante de Baidi-urbo ĉe matenkrepusko..... | 74 |
| 赠汪伦 Dediĉe al Wang Lun..... | 74 |
| 清平调词 Ario pri belulino..... | 74 |
| 客中行 Gastado dum vojaĝo..... | 75 |
| 独坐敬亭山 Sola sidante sur la monto Jingting..... | 75 |
| 春思 Sopiremo en printempo..... | 75 |
| 蜀道难 Malfacila vojo al Shu-regno..... | 76 |
| 月下独酌 Drinki sola sub la luno..... | 77 |
| 关山月 La luno super montaro..... | 78 |
| 怨情（五言） Plendemo..... | 78 |
| 怨情（七言） Plendemo..... | 79 |
| 将进酒 Preta drinki..... | 79 |
| 夜泊牛渚怀古 Nokta ankriĝo piede de la monto Niuzhu..... | 80 |
| 春思 Penseroj en la printempo..... | 80 |
| 渡荆门送别 Trans pramejo en Jinmen..... | 81 |
| 黄鹤楼送孟浩然之广陵 Al Meng Haoran vojaĝonta al Yangzhou..... | 81 |
| 行路难 Malfacila vojirado..... | 81 |
| 送友人 Adiaŭ al amiko..... | 82 |
| 子夜秋歌 L' aŭtuna kanto..... | 82 |
| 金陵酒肆留别 Adiaŭado en drinkejo de Jinling..... | 83 |
| 长相思 Longa sopiro..... | 83 |
| 望庐山瀑布 Spektado al akvofalo de la Lu-monto..... | 84 |
| 塞下曲 Kanto de soldatoj en lim-regiono..... | 85 |

| | |
|---|-----|
| 宫中行乐词 En palaco..... | 85 |
| 梦游天姥吟留别 Vizito al la monto Tianmu en sonĝo..... | 85 |
| 玉阶怨 Plendemo ĉe jada perono..... | 87 |
| 听蜀僧濬弹琴 Aŭskultado al liut-ludado de bonzo..... | 87 |
| 对酒 Lindulino..... | 88 |
| 长干行 (二首) Kanzonoj de Changgan..... | 88 |
| 李端 Li Duan | |
| 听箏 Aŭskulto al citro..... | 90 |
| 李华 Li Hua | |
| 春行即兴 Improvizaĵo pri printempa ekskurso..... | 91 |
| 李隆基 Li Longji | |
| 经邹鲁祭孔子而叹之 Kultado al Konfuceo..... | 91 |
| 李颀 Li Pin | |
| 渡汉江 Transpasi la riveron Han..... | 92 |
| 李颀 Li Qi | |
| 古从军行 Gardado ĉe landlimo..... | 92 |
| 古意 Versoj laŭ antikva stilo..... | 93 |
| 李峤 Li Qiao | |
| 风 Vento..... | 93 |
| 李商隐 Li Shangyin | |
| 无题 Sentitole..... | 94 |
| 落花 Falantaj floroj..... | 94 |
| 凉思 Penseo en frida aŭtuno..... | 95 |
| 春雨 Printempa pluvo..... | 95 |
| 乐游原 Leyou-altano..... | 96 |
| 蝉 Cikado..... | 96 |
| 风雨 Ventpluvo..... | 96 |
| 夜雨寄北 En nokta pluvo..... | 97 |
| 晚晴 Vespera sereno..... | 97 |
| 锦瑟 Farbita citro..... | 97 |
| 北青萝 Lianoj..... | 98 |
| 小园独酌 Drinki sola en korto..... | 98 |
| 无题二首 Sentitole..... | 98 |
| 自喜 Memkontentiĝo..... | 99 |
| 春宵自遣 Distriĝo en printempa nokto..... | 99 |
| 寄令狐郎中 Al Linghu Tao..... | 100 |
| 为有 Plendema edzino..... | 100 |
| 北楼 Sur norda turo..... | 100 |
| 幽居冬暮 Vivi solece ĉe vintrofino..... | 101 |
| 正月崇让宅 Dum la unua lunmonato..... | 101 |
| 李涉 Li She | |
| 登山 Montogrimpado..... | 102 |
| 李绅 Li Shen | |
| 悯农二首 Kompato al kampuloj..... | 102 |

| | |
|--|-----|
| 李益 Li Yi | |
| 江南曲 Melodio sude de Janzi-rivero..... | 103 |
| 夜上受降城闻笛 Sur la murturo de la kapitulaciga urbo nokte mi aŭdas flutadon..... | 103 |
| 喜见外弟又言别 Ĝojo renkonti la kuzon kaj bedaŭro lin tuj adiaŭi..... | 103 |
| 刘长卿 Liu Changqing | |
| 逢雪宿芙蓉山主人 En nokta neĝostormo..... | 104 |
| 送上人 Adiaŭ al la altestimata bonzo..... | 104 |
| 送灵澈上人 Adiaŭ al la altestimata bonzo Ling Che..... | 104 |
| 听弹琴 Aŭskultado al citro-ludado..... | 105 |
| 刘方平 Liu Fangping | |
| 春怨 Plendemo en printempo..... | 105 |
| 刘慎虚 Liu Shenxu | |
| 阙题 Sen titolo | 105 |
| 刘禹锡 Liu Yuxi | |
| 浪淘沙 Ondo lavas sablon..... | 106 |
| 望洞庭 Rigarde al la lago Dongting..... | 106 |
| 玄都观桃花 Spekto al persikfloroj en la Taŭista templo Xuanduguan..... | 107 |
| 再游玄都观 Revizito al la taŭista templo Xuanduguan..... | 107 |
| 和乐天春词 Responde al la poemo de Bai Juyi..... | 107 |
| 柳中庸 Liu Zhongyong | |
| 征人怨 Plendemo de soldatoj..... | 108 |
| 柳宗元 Liu Zongyuan | |
| 溪居 Loĝado ĉe rojo..... | 108 |
| 江雪 Neĝo sur rivero..... | 109 |
| 渔翁 Fiŝisto..... | 109 |
| 登柳州城楼寄漳汀封连四州刺史 Sur la pordego de Liuzhou... | 109 |
| 卢纶 Lu Lun | |
| 晚次鄂州 En Ezhou ĉe vespero..... | 110 |
| 卢照邻 Lu Zhaolin | |
| 曲池荷 Lotusoj en ronda lageto..... | 110 |
| 骆宾王 Luo Binwang | |
| 咏鹅 La ansero..... | 110 |
| 在狱咏蝉 Cikado kaj malliberulo..... | 111 |
| 于易水送别 Disiĝo ĉe la rivero Yi..... | 111 |
| 马戴 Ma Dai | |
| 灞上秋居 Loĝejo en aŭtuno..... | 111 |
| 楚江怀古 Ĉe Dongting-lago..... | 112 |
| 孟浩然 Meng Haoran | |
| 春晓 Printempa mateno..... | 112 |
| 宿建德江 Tranoktado ĉe la rivero Jiande..... | 113 |
| 过故人庄 Vizito al amiko en vilaĝo..... | 113 |

| | |
|--|-----|
| 望洞庭湖赠张丞相 Rigardo al Dongting-lago..... | 113 |
| 早寒有怀 En frua frosto..... | 114 |
| 孟郊 Meng Jiao | |
| 游子吟 Kanto de vojaĝanto..... | 114 |
| 聂夷中 Nie Yizhong | |
| 咏田家 Povra kampulo..... | 115 |
| 田家 Familio de l' kampulo..... | 115 |
| 公子家 Dando..... | 115 |
| 裴迪 Pei Di | |
| 送崔九 Adiaŭado al amiko..... | 116 |
| 綦毋潜 Qimu Qian | |
| 春泛若耶溪 Printempe remi en boato sur la rojo Ruoye..... | 116 |
| 钱起 Qian Qi | |
| 暮春归故山草堂 rehejme al la ĥato fine de printempo..... | 116 |
| 送僧归日本 Dediĉe al bonzo reiranta al Japanio..... | 117 |
| 赠阙下裴舍人 Dediĉe al la palaca konsilanto Pei..... | 117 |
| 谷口书斋寄杨补阙 Al kortegano Yang..... | 118 |
| 秦韬玉 Qin Taoyu | |
| 贫女 Malriĉa filino..... | 118 |
| 邱为 Qiu Wei | |
| 寻西山隐者不遇 Ne trovi la ermiton en l' Okcidenta Monto..... | 119 |
| 权德舆 Quan Deyu | |
| 独酌 Drinki sola..... | 119 |
| 岭上逢久别者又别 Redisiĝo post renkontiĝo sur monto..... | 120 |
| 玉台体 Sapiro al amo..... | 120 |
| 沈佺期 Shen Quanqi | |
| 杂诗 Sentitole..... | 121 |
| 独不见 Sopire al la edzo..... | 121 |
| 司空曙 Sikong Shu | |
| 喜外弟卢纶见宿 Min ĝojigas la vizito de mia kuzo..... | 121 |
| 云阳馆与韩绅宿别 Adiaŭ al Han Shen en la hotelo Yunyang.... | 122 |
| 贼平后送人北归 Post la subpremo de ribelo..... | 122 |
| 宋之问 Song Zhiwen | |
| 题大庾岭北驿 Ĉe poŝta stacio..... | 123 |
| 渡汉江 Trans Han-rivero..... | 123 |
| 王勃 Wang Bo | |
| 山中 En la monto..... | 123 |
| 送杜少府之任蜀州 Adiaŭ al mia amiko, kiu oficos en Shuzhou | 124 |
| 王昌龄 Wang Changling | |
| 送柴侍御 Al imperia prokuroro CHAI..... | 124 |
| 闺怨 Ekplendo en haremo..... | 125 |
| 芙蓉楼送辛渐 Adiaŭado al amiko..... | 125 |
| 王梵志 Wang Fanzhi | |
| 其一 Sen titolo..... | 125 |

| | |
|--|-----|
| 王翰 Wang Han | |
| 凉州词 Kanto de bataalkampo..... | 126 |
| 王绩 Wang Ji | |
| 过酒家 En drinkejo..... | 126 |
| 王驾 Wang Jia | |
| 雨晴 Sereno post pluvado..... | 126 |
| 王建 Wang Jian | |
| 望夫石 Edz-sopira roko..... | 127 |
| 水夫谣 Kanzoneto pri ŝiphaŭlisto..... | 127 |
| 雨过山村 Vilaĝo en pluvo..... | 128 |
| 王湾 Wang Wan | |
| 次北固山下 Piede de la monto Beigu..... | 128 |
| 王维 Wang Wei | |
| 竹里馆 La domo en bambuoj..... | 129 |
| 终南山 La monto Zhongnan..... | 129 |
| 鹿柴 La ermitejo..... | 129 |
| 鸟鸣涧 Birdpepa montrojo..... | 130 |
| 画 Pentraĵo..... | 130 |
| 归嵩山作 En monto Songshan..... | 130 |
| 山居秋暝 Ĉe aŭtuna vespero..... | 130 |
| 过香积寺 Vizito al la templo Xiangji..... | 131 |
| 相思 Amsopiro..... | 131 |
| 山中 En monto..... | 132 |
| 秋夜曲 Melodio en aŭtuna nokto..... | 132 |
| 送别 Aŭdiaŭado..... | 132 |
| 渭川田家 Vilaĝa vivo..... | 133 |
| 终南别业 Ermita vivo en la monto Zhongnan..... | 133 |
| 九月九日忆山东兄弟 Penso pri fratoj en Shandong dum Festo de Duobla Naŭo..... | 133 |
| 送元二使安西 Al l' amiko vojaĝanta al Anxi..... | 134 |
| 青溪 Klara Rojo..... | 134 |
| 王之涣 Wang Zhihuan | |
| 登鹳雀楼 Sur la turo Guanque..... | 135 |
| 送别 Adiaŭado..... | 135 |
| 凉州词 Kanto pri limregiono..... | 135 |
| 韦应物 Wei Yingwu | |
| 滁州西涧 La okcidenta rojo en Chuzhou..... | 136 |
| 寒食寄京师诸弟 Al fratoj dum fridmanĝaĵa tago..... | 136 |
| 夕次盱眙县 Ĉe nokta ankriĝo..... | 137 |
| 秋夜寄邱员外 En aŭtuna nokto..... | 137 |
| 寄李儋元锡 Versoj al miaj amikoj..... | 137 |
| 长安遇冯著 Renkontiĝo kun amiko en Chang'an..... | 138 |
| 淮上喜会梁川故友 Ĝoja renkontiĝo kun malnova amiko..... | 138 |
| 初发扬子寄元大校书 Adiaŭado al kara amiko..... | 138 |

| | | |
|--------------------------|---|-----|
| 赋得暮雨送李胄 | Adiaŭado en vespera pluvo..... | 139 |
| 寄全椒山中道士 | Al taŭisto en la monto Quanjiao..... | 139 |
| 东郊 | Orienta ĉirkaŭurbo..... | 139 |
| 送杨氏女 | Adiaŭado al mia filino..... | 140 |
| 韦庄 Wei Zhuang | | |
| 金陵图 | Pentraĵo de la urbo Jinling..... | 141 |
| 章台夜思 | Nokta penso en palaco Zhangtai..... | 141 |
| 温庭筠 Wen Tingyun | | |
| 利州南渡 | Pramado ĉe Lizhou..... | 142 |
| 瑶瑟怨 | Plendemo..... | 142 |
| 送人东游 | Adiaŭado al amiko vojaĝanta orienten..... | 143 |
| 许浑 Xu Hun | | |
| 秋日赴阙题潼关驿楼 | En aŭtuna tago..... | 143 |
| 薛逢 Xue Feng | | |
| 宫词 | Plendemo en la palaco..... | 144 |
| 杨炯 Yang Jiong | | |
| 从军行 | Militirado..... | 144 |
| 杨巨源 Yang Juyuan | | |
| 城东早春 | Frua printempo oriente de la urbo..... | 145 |
| 叶采 Ye Cai | | |
| 暮春即事 | Improvizaĵo en la malfrua printempo..... | 145 |
| 虞世南 Yu Shinan | | |
| 咏萤 | La lampiro..... | 146 |
| 蝉 | Cikado..... | 146 |
| 元结 Yuan Jie | | |
| 石鱼湖上醉歌 | Ebria kanto sur la lago Shiyu..... | 146 |
| 元稹 Yuan Zhen | | |
| 行宫 | La vic-palaco..... | 147 |
| 遣悲怀三首 | Tri poemoj por mia edzino..... | 147 |
| 张泌 Zhang Bi | | |
| 寄人 | Letere al la memorata..... | 149 |
| 张祜 Zhang Hu | | |
| 赠内人 | Dediĉe al honordamo..... | 149 |
| 题金陵渡 | Jinling-pramejo..... | 149 |
| 何满子 | Trista ario..... | 150 |
| 张继 Zhang Ji | | |
| 枫桥夜泊 | En boato ĉe acer-ponto..... | 150 |
| 张九龄 Zhang Jiuling | | |
| 赋得自君之出矣 | De kiam vi foriris..... | 150 |
| 望月怀远 | Sopiro al karuloj sub la luno..... | 151 |
| 感遇 | Penseroj..... | 151 |
| 张乔 Zhang Qiao | | |
| 书边事 | Priskribo por la limregiono..... | 152 |
| 张旭 Zhang Xu | | |

| | | |
|-----------------------|---------------------------------------|-----|
| 桃花溪 | Persikflora Rojo..... | 152 |
| 张说 Zhang Yue | | |
| 蜀道后期 | Hasteco..... | 153 |
| 醉中作 | En ebrieco..... | 153 |
| 三月闺怨 | Plendemo en marto..... | 153 |
| 朱庆馀 Zhu Qingyu | | |
| 近试上张水部 | Novedzino sin ornamenta..... | 154 |
| 宫中词 | Plendo de honordamoj..... | 154 |
| 祖咏 Zu Yong | | |
| 终南望余雪 | Lasta neĝo sur la monto Zhongnan..... | 155 |

Tradukintoj:



mao zifu



Ardo



Minosun



Vejdo

Invito al legado

Poemoj belaj de Tang-dinastio
ja estas tre valora gem-trezoro
en la antikva ĉina poezio,
konata jam al ĉina la popolo.

Poemoj tiaj nun en Esperanto
prezentas sin al via okulparo.
Ĉu por legado ĉu por buŝa ĉanto,
ili 'stas bona la materialo.

Ni tradukintoj penis energie
pretigi la tradukojn en bonordo,
tiel ke ni laboris ja konscie
vere por nia legemula rondo.

Samideanoj, legu kun satĝuo,
kaj naĝu en la scia river-fluo.

Vejdo

白居易 (772—846)

Bai Juyi (772-846)

赋得古原草送别

离离原上草，一岁一枯荣。野火烧不尽，春风吹又生。
远芳侵古道，晴翠接荒城。又送王孙去，萋萋满别情。

Adiaŭado

Herboj kreskas sur la vasta ebenaĵ' prospere,
ili velkas en aŭtuno, verdas primavere.
Fajr' sovaĝa povas ne detrui ilin trude,
ree ili kreskas en printempa vento tute.
sovaĝ-herboj kovras praajn vojojn agreseme,
sub sunlumo verd' sterniĝas ja ĝis urb' alpreme.
Mi refoje sendas vin amikon al la foro,
verdaj herboj montras bedaŭremon en la koro.
trad. Vejdo

后宫词

泪湿罗巾梦不成，夜深前殿按歌声。
红颜未老恩先断，斜倚薰笼坐到明。

Poemo por honordamo

Kun la larme malseka mantuko ŝi ne endormiĝas,
Noktomeze el ĉambro antaŭa aŭdiĝas kanthoro.
La favoro de reĝo rompiĝis, kun freŝa vizaĝo
La belino ĉe la incensujo sidas ĝis aŭroro.
trad. Minosun

Veado en la palaco

Mi kun larm-malseka tuko endormiĝi ne sukcesas,
en profunda nokt' alŝvebas kantovoĉo el la halo.
Ruĝaj vangoj ne oldiĝas, sed regnestro min forgesas,
mi ĉe varmigil' oblikve sidas ja ĝis aŭrorpalo.
trad. Vejdo

问刘十九

绿蚁新醅酒，红泥小火炉。
晚来天欲雪，能饮一杯无。

Demande al Liu Shijiu

Jen pretas nova vino verde ŝaŭma;
Kaj brulas eta ruĝargila forno.
Ĉu venu vi, amiko kara, preni
Drinkaĵon dum vespera neĝoŝtormo?
trad. Minosun

春词

低花树映小妆楼，春入眉心两点愁。
斜倚栏杆背鹦鹉，思量何事不回头？

Versoj de l' printempo

Inter arboj basaj floroj staras ĉe dometo,
en knabinaj brovoj ludas la printempa spleno.
Dorse al papag' sin klinas ŝi ĉe parapeto,
kial ŝi ne turnas sian kapon kun ĉagreno?

alia versio:

Penso en printempo

En domet' kaŝita inter floroj kaj arbegoj verdaj
riveligas inter brovoj de la junulin' ĉagreno.
Dorse al papago apogante sin al balustrado,
ŝi, ne kapturnante, kion primeditas en la spleno?
trad. Vejdo

夜雪

已讶衾枕冷，复见窗户明。
夜深知雪重，时闻折竹声。

Nokta neĝo

Vekiĝinte, surprizite trovas
mi la litkovrilon frida,
kun dubem' mi vidas la fenestron
hela en taglum' livida.
Mi ekscias, ke la neĝo falis
nokte en tavolo' dik-sida.
Jen aŭdiĝas foje derompado
de bambu' en son'krepita.
trad. Vejdo

买花

帝城春欲暮，喧喧车马度。
共道牡丹时，相随买花去。
贵贱无常价，酬直看花数。

灼灼百朵红， 戛戛五束素。
上张幄幕庇， 旁织巴篱护。
水洒复泥封， 移来色如故。
家家习为俗， 人人迷不悟。
有一田舍翁， 偶来买花处。
低头独长叹， 此叹无人喻。
一丛深色花， 十户中人赋。

Aĉeti florojn

Printempo en ĉefurbo venas tuj al fino,
navedas homoj kaj kaleŝoj kiel fluo.
Dum la sezon' de peonia disflorado,
aĉeti florojn oni iras kun ĝojbruo.

La floroj karas aŭ malkaras je la prezo
laŭ la specioj de la lokaj peonioj.
Buked' da belaj ruĝaj floroj en freŝeco
nu, je kvin silkrulaĵo kostas sen malplio.

La florplantant' protektas ilin per markizo
kaj ilin ĉirkaŭfermas per heĝobarilo.
Krom akvumad' zorgema ili butas florojn,
tiel ke ili tenas ruĝon kun belbrilo.

Ĉiu plantanto faras tion laŭkutime,
la florplantadon oni trovas tre natura.
Kampul' maljuna venas senintence tien,
kie vendiĝas floroj en negoc' konkura.

Je tio li suspiras kun klinita kapo,
sed lin neni priatentas kun volonto.
Bukedo da skarlataj peonioj vere
ja kostas je imposto alta kiel monto.

trad. Vejdo

观刈麦

田家少闲月， 五月人倍忙。
夜来南风起， 小麦覆陇黄。
妇姑荷箠食， 童稚携壶浆，
相随饷田去， 丁壮在南冈。
足蒸暑土气， 背灼炎天光，
力尽不知热， 但惜夏日长。
复有贫妇人， 抱子在其旁，
右手秉遗穗， 左臂悬敝筐。

听其相顾言，闻者为悲伤。
家田输税尽，拾此充饥肠。
今我何功德？曾不事农桑。
吏禄三百石，岁晏有余粮，
念此私自愧，尽日不能忘。

Spektado al falĉado de tritiko

Kampuloj rare senokupas ĉiujare,
en majo des pli okupiĝas je laboro.
Alblovis vento el la sud' en lasta nokto,
tritiko kovras kampon jen per flavkoloro.
Virinoj nun alportas korbojn da manĝaĵoj,
infanoj prenas kruĉon da trinkakv' en mano,
por ke la viroj sate manĝu en la kampo
falĉantaj la tritikon en la ŝvita bano.
Ilian piedparon pikas ter-vaporo,
ilian nudan torson bakas la sungloro.
Varmegon ili spitas eĉ en lac-sufero,
sed nur domaĝas longan tagon de somero.
Ni vidas povran inon stari jen apude,
tenante bebon en la brakoj firme tute,
kun spikoj kolektitaj en la dekstra mano
kaj en maldekstra la korbeto el liano.
Babilas ŝi pri l' stat' de sia familio,
aŭdantoj veas pri l' tragika historio:
ŝi jam elvendis ĉiujn kampojn por imposto,
kolekti spikojn savas nin nur je ne kosto.
Kiajn meritojn gajnis mi por vivplezuro,
tiel ke mi ne kamplaboras en la ruo?
Mia enspez' tri cent buŝelojn da rizgrajnoj,
tio pli ol sufiĉas tute por vivpanoj.
mi ofte sentas honton je ekpens' pri l' sceno
neniam mi forgesos tion kun korspleno..

trad. Vejdo

长恨歌

汉皇重色思倾国，御宇多年求不得。
杨家有女初长成，养在深闺人未识。
天生丽质难自弃，一朝选在君王侧。
回眸一笑百媚生，六宫粉黛无颜色。
春寒赐浴华清池，温泉水滑洗凝脂。
侍儿扶起娇无力，始是新承恩泽时。
云鬓花颜金步摇，芙蓉帐暖度春宵。
春宵苦短日高起，从此君王不早朝。

承欢侍宴无闲暇，春从春游夜专夜。
后宫佳丽三千人，三千宠爱在一身。
金屋妆成娇侍夜，玉楼宴罢醉和春。
姊妹弟兄皆列土，可怜光彩生门户。
遂令天下父母心，不重生男重生女。
骊宫高处入青云，仙乐风飘处处闻。
缓歌慢舞凝丝竹，尽日君王看不足。
渔阳鞞鼓动地来，惊破霓裳羽衣曲。
九重城阙烟尘生，千乘万骑西南行。
翠华摇摇行复止，西出都门百余里。
六军不发无奈何，宛转蛾眉马前死。
花钿委地无人收，翠翘金雀玉搔头。
君王掩面救不得，回看血泪相和流。
黄埃散漫风萧索，云栈萦纡登剑阁。
峨嵋山下少人行，旌旗无光日色薄。
蜀江水碧蜀山青，圣主朝朝暮暮情。
行宫见月伤心色，夜雨闻铃肠断声。
天旋地转回龙驭，到此踟躇不能去。
马嵬坡下泥土中，不见玉颜空死处。
君臣相顾尽沾衣，东望都门信马归。
归来池苑皆依旧，太液芙蓉未央柳。
芙蓉如面柳如眉，对此如何不泪垂？
春风桃李花开日，秋雨梧桐叶落时。
西宫南内多秋草，落叶满阶红不扫。
梨园弟子白发新，椒房阿监青娥老。
夕殿萤飞思悄然，孤灯挑尽未成眠。
迟迟钟鼓初长夜，耿耿星河欲曙天。
鸳鸯瓦冷霜华重，翡翠衾寒谁与共？
悠悠生死别经年，魂魄不曾来入梦。
临邛道士鸿都客，能以精诚致魂魄。
为感君王辗转思，遂教方士殷勤觅。
排空驭气奔如电，升天入地求之遍。
上穷碧落下黄泉，两处茫茫皆不见。
忽闻海上有仙山，山在虚无缥缈间。
楼阁玲珑五云起，其中绰约多仙子。
中有一人字太真，雪肤花貌参差是。
金阙西厢叩玉扃，转教小玉报双成。
闻道汉家天子使，九华帐里梦魂惊。
揽衣推枕起徘徊，珠箔银屏迤迤开。
云髻半偏新睡觉，花冠不整下堂来。
风吹仙袂飘飘举，犹似霓裳羽衣舞。
玉容寂寞泪阑干，梨花一枝春带雨。
含情凝睇谢君王，一别音容两渺茫。
昭阳殿里恩爱绝，蓬莱宫中日月长。

回头下望人寰处，不见长安见尘雾。
惟将旧物表深情，钿合金钗寄将去。
钗留一股合一扇，钗擘黄金合分钿。
但令心似金钿坚，天上人间会相见。
临别殷勤重寄词，词中有誓两心知。
七月七日长生殿，夜半无人私语时。
在天愿作比翼鸟，在地愿为连理枝。
天长地久有时尽，此恨绵绵无绝期。

Longa bedaŭro

L' imperiestr' avidis je belinoj tra la lando,
sed ne sukcesis li akiri dum multjara ĉaso.
En Familio Yang knabino ĵus plenkreskis ĉarma,
ne konis oni ŝin en buduaro kun tempaso.

Naturdotita belo ŝia diskoniĝis fine,
ŝi elektitis ĉe l' imperiestron servoprete.
Kapturino kaj rideto ŝiaj montras ja cent ĉarmojn,
ŝi superbelas ĉiujn inojn en palac' sencede.

En frost' printempa ŝi sin banis en Huaqing-baseno,
fontakvo lavis haŭton silkan de kremo-koloro.
Servoknabinoj helpis ŝin en supla koketeco,
ŝi plaĉis al li ĉe unua lia korfavoro.

Kun haroj nubaj, or-harplinglo kaj ŝminkitaj vangoj,
ŝi kun li ĝuis nupto-nokton en la litvualo.
La nokto kurtis, ili ellitiĝis tre malfrue,
li ne plu tronis en mateno por ofico-faro.

Lin ŝi priservis tutatage sen libera tempo,
vigilis ŝi ĉe li dum ekskursad' en primavero.
En posta la palac' troviĝis tri mil belulinoj,
li tamen solan ŝin dorlotas vere kun tenero.

Ŝminkite ŝi lin servis ĉiunokte en haremo,
ebrie ili ludis kun amĝu' en Jada Turo.
Gefratoj ŝiaj ĉiuj havis la honoran rangon,
alportis ŝi al familio gloron sen mezuro.

Pro tio la gepatroj sub ĉiel' preferis naski
filinon ol generi filon kun profita celo.
Palac' Li staras alte nub-skrapante en aero,
el ĝi muziko fea ŝvebis ĉien en ventpelo.

Leĝeris danco kaj kantado en muziko korda,
satĝuis la imperiestro, tamen sen kontento.
Subite tondre sonis la milit-tamburoj trae,
panike stopis dancistinojn jen en artprezento.

Fajrfum' minace pendis peze super la palaco,
mil kaj mil homoj, ĉaroj fuĝis al sudokcident'.
La procesio kun regnflagoj jen iris jen haltis,
jam sude de l' ĉefurbo de la regno liojn cent.

Rifuzis ses armeoj marŝi sen dekreton sekvi,
eĉ Honordam' Yang mortis triste antaŭ la ĉevaloj.
Kapornamaĵoj oraj ŝiaj disŝutiĝis teren,
neniu levkolektis ilin pro disĵetaj faloj.

Kovrante la vizaĝon la regnestro ne ŝin povis
elsavi kaj li triste larmis, sangis en la koro.
Loesa polv' foliojn pelis en susura vento,
la homvicaro jam zigzagis al Jiange-montkolo.

Sub Emei-mont' danĝera preskaŭ mankis la pasantoj,
jam flagoj perdis helon ĉe vespera suna palo.
Vidante verdajn montojn kaj riverojn jen de Sichuan,
sopiris li matene, nokte al ŝi en fatalo.

Kiam li vidis lunon, li tuj naskis afliktiĝon.
Noktpluva battoj pelis lin al la korŝira horo.
Post militĉes' returnis li al regna la ĉefurbo,
ĉe ŝia tombo li hezitis kun rompita koro.

Sub grundo de Deklivo Mawei ŝi eterne kuŝis,
vizaĝon ŝian oni povis vidi jam ne plu.
Li mute vid-al-vidis korteganojn kun larmflu',
en la direkto al ĉefurb' li rajdis sen voĉbru'.

Restis samaj lago kaj ĝardenoj en palaco:
lotusoj en lageto kaj salikoj en ĝardeno.
En ili ŝajne riveliĝis ŝiaj vangoj, brovoj,
kiel li povus ja reteni larmojn kun ĉagreno?

Printempe prunoj kaj persikoj pompas en disfloro,
aŭtune pluvo batis la foliojn de l' platano.
En suda kaj uesta kortoj herboj kreskis riĉe,

neniu forbalais falajn florojn sur l' altano.

Operludistoj en la Pira Kort' jam hargriziĝis,
la servistinoj de harem' oldiĝis en senilo.
Lampiroj flugis en palacon, ĝenis lin en penso,
tra l' tuta nokto li maldormis jen en maltrankvilo.

Kalkulis li l' sonorilbatojn en longlonga nokto,
rigardis li la stelojn surĉielajn ĝis l' aŭroro.
Malvarmis prujntavolo sur tegoloj de l' tegmento,
kun kiu kuŝus li sub litkovril' de verd-koloro?

Jam jaro pasis lante ŝia mort' el lia vivo,
en lian sonĝon ŝi neniam venis per animo.
Alvokis li taŭiston kiel gaston jen el Linqiong
por ŝin animi vive per sorĉarto kun estimo.

Por kvietigi la imperiestran sopiremon
petatis la taŭist' ŝin serĉi kun giganta peno.
Rajdante per la nubo li galopis kiel fulmo,
de paradizo ĝis infer' li serĉis kun fortpleno,

sed ŝin nenie trovis sur ĉiel' kaj sub la tero,
en lokoj du nur regis svaga, vasta la nebulo.
Subite aŭdis li pri l' fea monto Penglai, kiun
en nubomaro oni vidis nure en konturo.

Jen staris fajna pavilon' en kolorriĉaj nuboj,
troviĝis multe da feinoj belaj en la loko.
El ili unu kun la nomo Taizhen, belaspektas,
kun blanka haŭto, tre simila al ŝi kun allogo.

La pastro frapis je la jada pordo okcidenta,
kaj petis servistinon prianonci lian venon.
Aŭdinte pri la mesaĝist' el la imperiestro,
Feino Taizhen tuj elsonĝis, portis dub-mienon.

Levinte litkovrilon, ŝi tuj surŝultrigis veston,
disŝovis ŝi l' ekranon kaj kurtenon jen leĝere.
Kun hartuber' klinita jen pro ellitiĝo ĵusa,
elhastis ŝi kun la kapkrono en malord' iele.

Zefir' flirtigis ŝiajn larĝmanikojn buntkolorajn,
kvazaŭ ŝi dancus belan dancon Ĉielarka Vesto.

Solecon montris ŝiaj vangoj jen kun larmmakuloj,
simile ĝuste al pirfloroj kun pluvguta resto.

Ŝi kore dankis l' Ekscelencon pro favoro lia,
dum longa tempo ili ne intervidiĝis kare.
Ne daŭris plu en la palac' ilia arda amo,
ŝi loĝis en ĉiela fea mondo jam multjare.

Ŝi ĵetis malsuprenrigardon al la homa mondo,
ŝi vidis ne palacon, sed vastmaron de nebulo.
“Mi sendas al li paron da harpingloj en orkesto
por la profundan senton ja esprimi kun ambrulo.

Konservas mi l' alian paron da harpingloj oraj
kaj l' saman keston por atesti amon de sincero.
Se nia kor' fidelas kiel firmas orharpingloj,
ni renkontiĝos, ĉu sur la ĉielo ĉu sur tero.”

Ĉe adiaŭo al la pastro ŝi konfidis al li
la ĵuron kaŝan kiun nur ŝi kaj li konas bone:
“La sepan de l' monato sepa en Palac' Longvivo
ni tiujare ĵuris al ĉiel' serioz-tone:

Sur la ĉielo ni fariĝu paro da ambirdoj,
ni iĝu interplektiĝintaj branĉoj sur la tero.
Ĉiel' kaj tero iam venos al la fina horo,
sed la bedaŭro de viv-morto daŭros sen ŝancelo.”

琵琶行

元和十年，予左迁九江郡司马。明年秋，送客湓浦口，闻舟中夜弹琵琶者，听其音，铮铮然有京都声。问其人，本长安倡女，尝学琵琶于穆、曹二善才，年长色衰，委身为贾人妇。遂命酒，使快弹数曲。曲罢悯然，自叙少小时欢乐事，今漂沦憔悴，转徙于江湖间。予出官二年，恬然自安，感斯人言，是夕始觉有迁谪意。因为长句，歌以赠之，凡六百一十六言，命曰《琵琶行》。

浔阳江头夜送客，枫叶荻花秋瑟瑟。
主人下马客在船，举酒欲饮无管弦。
醉不成欢惨将别，别时茫茫江浸月。
忽闻水上琵琶声，主人忘归客不发。
寻声暗问弹者谁？琵琶声停欲语迟。
移船相近邀相见，添酒回灯重开宴。
千呼万唤始出来，犹抱琵琶半遮面。
转轴拨弦三两声，未成曲调先有情。
弦弦掩抑声声思，似诉平生不得志。

低眉信手续续弹，说尽心中无限事。
轻拢慢捻抹复挑，初为《霓裳》后《六么》。
大弦嘈嘈如急雨，小弦切切如私语。
嘈嘈切切错杂弹，大珠小珠落玉盘。
间关莺语花底滑，幽咽泉流冰下难。
冰泉冷涩弦凝绝，凝绝不通声暂歇。
别有幽愁暗恨生，此时无声胜有声。
银瓶乍破水浆迸，铁骑突出刀枪鸣。
曲终收拨当心画，四弦一声如裂帛。
东船西舫悄无言，唯见江心秋月白。
沉吟放拨插弦中，整顿衣裳起敛容。
自言本是京城女，家在虾蟆陵下住。
十三学得琵琶成，名属教坊第一部。
曲罢曾教善才服，妆成每被秋娘妒。
五陵年少争缠头，一曲红绡不知数。
钿头云篦击节碎，血色罗裙翻酒污。
今年欢笑复明年，秋月春风等闲度。
弟走从军阿姨死，暮去朝来颜色故。
门前冷落鞍马稀，老大嫁作商人妇。
商人重利轻别离，前月浮梁买茶去。
去来江口守空船，绕船月明江水寒。
夜深忽梦少年事，梦啼妆泪红阑干。
我闻琵琶已叹息，又闻此语重唧唧。
同是天涯沦落人，相逢何必曾相识！
我从去年辞帝京，谪居卧病浔阳城。
浔阳地僻无音乐，终岁不闻丝竹声。
住近湓江地低湿，黄芦苦竹绕宅生。
其间旦暮闻何物？杜鹃啼血猿哀鸣。
春江花朝秋月夜，往往取酒还独倾。
岂无山歌与村笛？呕哑嘲哳难为听。
今夜闻君琵琶语，如听仙乐耳暂明。
莫辞更坐弹一曲，为君翻作《琵琶行》。
感我此言良久立，却坐促弦弦转急。
凄凄不似向前声，满座重闻皆掩泣。
座中泣下谁最多？江州司马青衫湿。

Rakonto pri bivludistino

En la 815-a jaro, la deka jaro de Yuanhe-erao de Tang-dinastio, mi estis degradita kaj forsendita al Jiujiang-prefektujo, kie mi funkciis kiel konsilisto de la prefekto. La sekvan aŭtunon, kiam mi diris adiaŭ al amiko ĉe la pramejo Penpu, mi aŭdis ludadon de bivo el la boato dum nokto. La sonoj de bivplektrado tintis kun gusto de la metropolo en ludmaniero. Mi demandis kaj sciiĝis, ke la bivludistino estas hetajro de Chang'an. Ŝi lernis ludarton ĉe la famaj ludlertuloj Mu kaj Cao. Pro tio,

ke ŝia beleco fadis kun aĝo pliiĝanta, ŝi edziniĝis al komercisto. Mi do postulis pli da alkoholo kaj petis ŝin ludi plurajn ariojn. Post ludado ŝi emociplene rakontis pri sia ĝoja juneco, kaj lamentis pri sia mizerplena vivo vaganta de loko al la alia. Mi estis degradita du jarojn, sed mi ĝuis trankvilan kaj memkontentan vivon. Aŭdinte ŝin rakontadon, mi eksentis morozon de degradito. Do mi komponis ĉi tiun longan poemon kun 616 ideogramoj, titolitan Bivludistino, kaj donacis ĝin al ŝi

Nokte mi forsendis gaston ĉe Xunyang-rivero,
jen susuris fragmitfloroj en aŭtun-vetero.
Ni deĉevaliĝis kaj enboatiĝis solaj,
ni vintasojn levis sen muzika atmosfero.

La disiĝo tristis, ve, sen ĝoj' sed kun ebrio,
la bedaŭr' elfluis sub nebula lunradio.
Jen aŭdiĝis tintoj de bivludo sur rivero,
ni restadis por aŭskulti jen kun emocio.

“Kiu estas la ludisto?” ĉuis mi dubeme,
la ludado haltis, kaj respondis ŝi retene.
La boat' alproksimiĝis por intervidiĝi,
rearanĝis vinon kaj manĝaĵojn ni festene.

Post plurfoĵaj vokoj ŝi elvenis malrapide,
kovris unu vangon per la bivo ŝi rigide.
Ŝi agordis kordojn eligante kelkajn sonojn,
la hakitaj tonoj jame naskis sentojn glite.

Kordoj vibris jen per melodio kun ĉagreno,
ŝajne rakontante pri tutviva trista spleno.
Kun klinita kapo ŝi arpeĝis per fingretoj,
elverŝante sian koron kun la suferpleno .

Kordojn ŝi kuntiris, pinĉis, levis fingrolerte,
ŝi serion da arioj ludis ja tutcerte.
Dikaj kordoj sonorbruis kiel pluvobatoj,
la maldikaj flustris duonvoĉe kaj tonperde.

Tintojn kaj gratsonojn ŝi kunmiksis jen varie:
jen faladis perloj sur jadpladon kolizie,
jen triladis oriole inter floroj ŝvebe,
jen fontakvo malfacile fluis subglacie.

Sub frostiga la fontakvo ne plu vibris kordoj,

dume ĉesis pro frostiĝo fingraj la pluktordoj.
Ŝi ĉagrenon kaŝan naskis en la korprofundo,
nun son-mank' superis muziksonojn en akordoj.

Nun ekkrevis l' arĝent-vaz' kaj akvo ŝprucis flue,
ferĉevaloj sturmis, glavoj, lancoj tintis brue.
Ĉe la fin' de lud' ŝi plukis meze de bivkordoj,
la kvar kordoj ĥoris kvaz' ŝiriĝus tol' detruie.

En boatoj regis nun silento dum momento,
nur vidiĝis super flu' l' aŭtuna lun-arĝento,
Ŝi senvorta l'plektron jen enŝovis inter kordojn,
kaj ordigis veston kun vizaĝ' de ĉagren-sento.

Ŝi naskiĝis loke en ĉefurb' , laŭ ŝia diro,
ŝia hejm' troviĝis ĉe Hamaling en trankvilo.
Ŝi dektria-jara jam ellernis bivoludadon,
kaj de tiam servis en palac' en art-defilo.

Post bivoludad' ŝin multe laŭdis majstroj vere,
kaj envias ŝian ĉarmon hetajrar' megere.
Dandoj en palaco vete pro prezento ŝia
ruĝajn silkkrubandojn jen donacis memprefere.

Harpingloj, kombilo disrompiĝis pro takt-bato,
vin-makuloj plenas sur la jupo de skarlato.
Ĝojo kaj rideto alportiĝis jar' post jaro,
glitis aŭtun-lun' kaj printemp-vent' al ŝia ŝato.

Frato ŝia iris al milit', l'onklin' pereis,
en temppaso pri beleca malaper' ŝi veis.
Raris gastoj kaj kaleŝoj jen ĉe ŝia pordo,
do, al edziniĝ' al komercisto ŝi obeis.

Monavida li disiĝis ofte sen bedaŭro,
iris li por te-negoco antaŭ monatdaŭro,
kaj ŝin lasis tute sola en boat' malplena
ĉirkaŭita de la frosta akv' sub luna klaro.

Nokte ŝi prisonĝis la paseon dum junaĝo,
larmoj fuŝdetruis ŝian ŝminkon sur vizaĝo.
Pri bivoludo ŝia mi suspiris jam admire,
mi des pli lamentis pri l' rakonto kun domaĝo.

Ambaŭ ni vagantaj same kun mizera sorto,
nekonataj, sed ni renkontiĝas en komforto.
Mi lastjare degradite forlasis ĉefurbon
kaj en Xunyang-urbo dume loĝas jen pro morbo.

Pro forec' sovaĝa mankas muzik-distr' plezura,
dum la jar' aŭdiĝas eĉ ne flutolud' sent-lula.
Loĝas mi en ĉerivera loko kun humido,
ĉe bambuoj kaj fragmitoj en la vent' ulula.

Kion mi aŭskulti povas nokte kaj matene?
Nur kukolan kaj simian kriojn tristajn ĝene.
Ĉu ĉe la river' printempa, ĉu sub aŭtun-luno,
mi solece verŝas vinon, drinkas kunĉagrene.

Ĉu aŭdiĝi povas la montkantoj kaj flutsonoj?
Jes, nur raspaj, krudaj flutludado kaj kanzonoj.
Mi ĉi-nokte aŭdis belajn notojn de bivoludo,
kvazaŭ plaĉan fe-arion jen sen monotonoj.

“Ne disiĝu tuj kaj ludu pecon ĉe la fino,
mi komponu versojn jen por vi bivoludistino.”
Kortuŝite longe staris ŝi pro miaj vortoj,
kaj sidiĝis, plukis kordojn urĝe kun kapklino.

Sonis tuj ario trista malkiel lastfoje,
ĉiuj aŭskultantoj plorsupiris jen malĝoje.
Kiu el la ĉeestantoj larmis pleje multe?
Larmoj de mi, la prefekt' i-loka, fluis roje.

常建 (? - ?)

Chang Jian (? - ?)

宿王昌龄隐居

清溪深不测，隐处唯孤云。松际露微月，清光犹为君。
茅亭宿花影，药院滋苔纹。余亦谢时去，西山鸾鹤群。

Ĉe la loĝejo de ermito

La klara lag' profundas ja abisme,
ĉe ermitej' vidiĝas nubo sola.
Lunlum' filtriĝas mole tra pinaro,
helbrilo servas al vi libervola.
Florombroj dormas peze ĉe pajl-hato,

pompas peoni-bedo musk-dekora.
Forlasi volas mi l' vulgaran mondon
por vivi kun la grua grego fola.
trad. Vejdo

题破山寺后禅院

清晨入古寺，初日照高林。曲径通幽处，禅房花木深。
山光悦鸟性，潭影空人心。万籁此俱寂，但余钟磬音。

En la templo Poshan

Matene ĉe l' antikva templ' mi staras,
sunbril' prilumas arbojn sur la monto.
Ale' perdiĝas en verd-bambuaron,
prosperas floroj en la templa rondo.
Pli gajas birdoj en pejzaĝo bela,
lageto klara igas koron pura.
Ĉi-hore ĉio dronas en mutecco,
aŭdiĝas sonoril-tintado nura.
trad. Vejdo

曹松 (828—903)

Cao Song (828-903)

己亥岁感事

泽国江山入战图，生民何计乐樵苏。
凭君莫话封侯事，一将功成万骨枯。

Meditado

Vasta teren' da montoj kaj riveroj
Jam dronas en milito,
la popolanoj falĉi kaj lignhaki
ne povas sen timido.
Ho, ne parolu plu pri konkurado
al la feŭdland-divido,
Sur dekmil blankaj ostoj ja baziĝas
Generala merito.
trad. Vejdo

岑参 (约 715 - 770)

Cen Shen (ĉ.715-770)

登总持阁

高阁逼诸天，登临近日边。
晴开万井树，愁看五陵烟。
槛外低秦岭，窗中小渭川。
早知清静理，常愿奉金仙。

Vizito al la pavilono Zongchi

Proksimas al la firmamento
De pavilono la tegmento.
Ĝi altas eĉ ke mi perceptas
Supre: la suno min akceptas.
Kiam serena tago brilas,
Ĉe-putaj arboj hele milas;
Se super montoj nuboj ŝvebas,
Tristecon tio reliefas.
Ĉe l' balustrado mi rigardas
Malsupren: Qin-monto malaltas;
Tra la fenestro: Wei-rivero
Fadene fluas sub l' etero.
Se mi la zenon pli ol frue
Ekkonus, tiam asidue
Mi volus iri, kor-konfida,
Al Budho en statu' orita.

trad. Minosun

逢入京使

故园东望路漫漫，双袖龙钟泪不干。
马上相逢无纸笔，凭君传语报平安。

Renkontiĝo kun kuriero irante al Chang'an

Mia hejmoloko foras oriente en rigardo,
la manikoj malsekiĝas, ve, pro mia larm' sen halto.
Nun ni renkontigxas surĉevale sen paper' kaj plumo,
do vi diru ion al parencoj miaj pri l'bonfarto.

trad. Ardo

Renkontiĝo kun kuriero iranta al la ĉefurbo

Al la hejmloko l' vojo longe iras oriente, —
Al mi l' manikojn larmoj malsekigas ajn-momente.
Ni renkontiĝas surĉevale. Sen paper' kaj plumo,
Do diru al karuloj miaj: “Ĉe li brilas lumo!”

trad. Minosun

白雪歌送武判官归京

北风卷地白草折，胡天八月即飞雪。

忽如一夜春风来，千树万树梨花开。
散入珠帘湿罗幕，狐裘不暖锦衾薄。
将军角弓不得控，都护铁衣冷难着。
瀚海阑干百丈冰，愁云惨淡万里凝。
中军置酒饮归客，胡琴琵琶与羌笛。
纷纷暮雪下辕门，风掣红旗冻不翻。
轮台东门送君去，去时雪满天山路。
山回路转不见君，雪上空留马行处。

Adiaŭado en neĝa vetero

Balae rompas blankajn herbojn jen la norda vento,
aŭguste sur teren' de hunoj neĝas kun lamento.
Subite kvazaŭ blovus tra la nokt' printemp-zefiro,
pirfloroj pompas jame sur da arboj mil' kaj milo.
Neĝflokaj malsekigas la kurtenon en la tendo,
varmiĝas nek peltaj' nek litkovril' por korp-defendo.
Pro frosto general' ne povas streĉi arkon plene,
kiras' glacie fridas tro por surporti eltene.
Mil futoj da glacio ŝlosas la dezerton ĉie,
sur vasta la ĉielo drivas nuboj apatie.
La ĉef' aranĝas adiaŭ-festenon por la gasto,
muzikas citro, biv' kaj fluto laŭ l' odron' de mastro.
Neĝego falas antaŭ la pordego ĉe vespero,
ne flirtas ruĝa flag' glaciiginta en ventpelo.
Ni vin elakompanas ĝis la pord' kun bondeziro,
sed la montvojojn kovras neĝ' por malfacila iro.
la voj' sinua baras vidon jen per neĝ-veluro,
sur neĝo ja vidiĝas nur la ĉeval-hufa spuro.

trad. Vejdo

陈陶 (812 - 885)

Chen Tao (812-885)

陇西行

誓扫匈奴不顾身，五千貂锦丧胡尘。
可怜无定河边骨，犹是春闺梦里人！

Melodio Longxixing

Ekstermi hunojn ili ĵuris spite sian vivon,
kvin mil soldatoj bontrejnitaj mortis bataleje.
Veindas la skeletoj ĉe l' rivero Necerteco—
ankoraŭ l' junedzinoj songas pri la kara pleje.

trad. Minosun

陈抟 (906 – 989)

Chen Tuan (906-989)

归隐

十年踪迹走红尘，
回首青山如梦频。
紫绶纵荣争及睡，
朱门虽富不如贫。
愁闻剑戟扶危主，
闷听笙歌聒醉人。
携取旧书归旧隐，
野花啼鸟一般春。

Reveno al ermitejo

Dek jarojn mi vane klopodis en tiu ĉi mondo,
Foj-foje en sonĝo alpaŝis al mi ermit-monto.
Honora rangeco kontentas malpli ol dormado;
Riĉaj zorgas pli ol malriĉaj en la vivparado.
Deprimas aŭd' pri suvereno en militdangero;
Afliktas vid' pri ebriuloj de orgiprefero.
Kun libroj malnovaj al ĉi ermitejo mi iros, -
Printempan aeron, ĉu floroj, ĉu birdoj, elspiros.
trad. Minosun

崔护 (772-846)

Cui Hu (772-846)

题都城南庄

去年今日此门中，人面桃花相映红。
人面不知何处去，桃花依旧笑春风。

Ĉe vilaĝo

Printempe lastajare ĉe la sama pordo
vizaĝo ŝia ĉarmas kiel persikfloro.
Nun la vizaĝo malaperis jam senspure,
nur ridas persikflor' en printemp-venta molo.
trad. Vejdo

崔颢 (? - 754)

Cui Hao (?-754)

长干行

君家何处住，
妾住在横塘。
傍船暂借问，
或恐是同乡。

Popolkanto el Changgan

He, sinjoro, kie estas vi?
Tie ĉi en Hengtang loĝas mi.
Ŝiphaltige, mi demandas, nu:
Ĉu samprovincanoj estus ni?
trad. Minosun

黄鹤楼

昔人已乘黄鹤去，
此地空余黄鹤楼。
黄鹤一去不复返，
白云千载空悠悠。
晴川历历汉阳树，
芳草萋萋鹦鹉洲。
日暮乡关何处是，
烟波江上使人愁。

La pavilono Flava Gruo*

Per flava gruo senmortulo delonge forflugis,
Ĉi restas nur forlasita l' pavilono Flava Gruo.
De tiam ĝi neniam estas foje reveninta,
Miljare blankaj nuboj ŝvebas en soleca bluo.
La turo Qingchuan kaj en Hanyang arboj distingiĝas,
Aromaj herboj pompas sur la sablobenk' Yingwu'o.
Vesperkrepusko baras vidon. Kie la hejmloko?
Hejmveon en mi vekas la nebula riverfluo.

**La pavilono Flava Gruo: kiu, plurfoje rekonstruita, situas en la urbo Wuhan ĉe la suda bordo de la rivero Jangzio, kaj norde de ĝi, tiam, kiam la poemo formiĝis, sin trovis la turo Qingchuan kaj la sablobenko Yingwu; la loko Hanyang nun estas parto de Wuhan.*

trad. Minosun

登黄鹤楼

昔人已乘黄鹤去，此地空余黄鹤楼。

黄鹤一去不复返，白云千载空悠悠。
晴川历历汉阳树，芳草萋萋鹦鹉洲。
日暮乡关何处是？烟波江上使人愁。

Sur Flav-Grua Turo

Senmortul' rajdante flavan gruon flugis for,
tie ĉi nur restas vaka la Flav-Grua Turo.
Senrevene malaperis flava gru' sen spuro,
blankaj nuboj jam mil jarojn flosas kun frivol'.
En la urbo Hanyang arboj verdas en prosper',
herboj riĉe pompas jen sur Papag-insuleto.
Kie mia hejmalok' vidiĝas ĉe vesper'?'
en nebul' sur fluo ĉagreniĝas mi poeto.

trad. Vejdo

崔涂 (? - ?)

Cui Tu (? - ?)

旅怀

水流花谢两无情，
送尽东风过楚地。
蝴蝶梦中家万里，
杜鹃枝上月三更。
故园书动经年绝，
华发春催两鬓生。
自是不归归便得，
五湖烟景有谁争。

Survoja ĉagreno

Egale senkompatas ĉu akvfluo aŭ florfalo,
Trapasas mi Chu* kun finiĝo de printempa vento.
En songo la hejmlando foras dek mil liojn,
Noktmeze brilas super l' rododendroj la krescento.
Ofte post jaro eĉ ne venas al mi hejmletero,
La haroj ĉe l' tempioj iĝas grizaj en momento.
Mi povus rehejmiĝi, se mi volus; mi ermite
Satĝuus la pejzaĝon en nebula akv-etendo.

**Chu: nomo de la regiono, kiu ampleksis proksimume la nunajn provincojn Hunan kaj Hubei. La aŭtoro longe kaj malproksime vojaĝis kaj loĝis for de sia naskiĝloko, la provinco Zhejiang.*

trad. Minosun

孤雁

几行归塞尽，念尔独何之。
暮雨相呼失，寒塘欲下迟。
渚云低暗度，关月冷相随。
未必逢矰缴，孤飞自可疑。

Sola sovaĝansero

La sovaĝanseraĵoj jam revenis,
kien do vi unuope flugas sola?
En vespera pluvo vi tragike gakas,
vi ne riskas fali teren senkonsola.
Tra nuboj vi flugas super insuleto,
inter fridaj montoj kun soleco kora.
Kvankam vi sekuras de invado kaŝa,
sola flugo trafas nin per timo stupora.
trad. Veĵdo

除夜有怀

迢递三巴路，羈危万里身。
乱山残雪夜，孤烛异乡人。
渐与骨肉远，转於僮仆亲。
那堪正飘泊，明日岁华新。

Penso ĉe antaŭnokto de novjaro

Kiel longas vojo al la hejmo kara!
Restas mi en danĝerplena loko fora.
En neĝfala nokto inter frostaj montoj
mi stagniĝas kiel la fremdul' izola.
Distas pli kaj pli mi disde la karuloj,
al mi karas pli servknab' kun sent' elkora.
Mi jam ne elteni povas ĉien vagi,
ve, novjar' alvenos tuj tra nokt' ĉi-hora.
trad. Veĵdo

戴叔伦（732—789）

Dai Shulun (732-789)

江乡故人偶集客舍

天秋月又满，城阙夜千重。
还作江南会，翻疑梦里逢。
风枝惊暗鹊，露草泣寒虫。
羁旅长堪醉，相留畏晓钟。

Kuniĝo de samlokanoj en la loĝejo

Plenluno pendas sur aŭtuna la ĉielo,
prilumas ĝi la oblajn pordojn en palaco.
Kiel sudanoj ni kuniĝas sur ĉi-tero,
verŝajne ni troviĝus kune en sonĝ-spaco.
Panikas birdojn for l' aŭtuna ventopelo,
insektoj en ros-herboj ĉirpas per agaco.
vagantaj ni fremdloke drinku per barelo,
ĝis maten-sonoril' son-sendos nin en laco.
trad. Vejdo

东方虬 (? - ?)

Dongfang Qiu (? - ?)

春雪

春雪满空来，触处似花开。
不知园里树，若个是真梅。

Printempa neĝo

Printempa neĝo flirtas en aero,
palpeblas ĝi simile al florero.
En korto umefloroj ja imponas,
sed kiu floro estas en la vero?
trad. Vejdo

杜甫 (712-770)

Du Fu (712-770)

登高

风急天高猿啸哀，渚清沙白鸟飞回。
无边落木萧萧下，不尽长江滚滚来。
万里悲秋常作客，百年多病独登台。
艰难苦恨繁霜鬓，潦倒新停浊酒杯。

Ascendo al altaĵo

La vento furiozas sub ĉielo,
simioj triste hurlas,
super sablejo blanka ĉe l' rivero
la birdoj flugkonkuras.
Folioj flavaj en arbar' senlima
flirt-fale jen susuras,
akvfluo de l' Janzi-river' el foro

torente sin alrulas.
Mi vagas multajn jarojn en l' aŭtuno
kun miloj da ĉagren',
kun malsanema korp' mi kadukulo
staras sur alt-teren'.
Post suferado blankaj haroj rampas
kapen je mia ĝen'.
Mi ne plu drinkas, kiel povus, ho ve,
mildiĝi mia splen'?

trad. Vejdo

悲陈陶

孟冬十郡良家子，血作陈陶泽中水。
野旷天清无战声，四万义军同日死。
群胡归来血洗箭，仍唱胡歌饮都市。
都人回面向北啼，日夜更望官军至。

Lamentado pri la batalo de Chentao

Fruvintre l' sango de la bonaj filoj el dek lokoj
enfluis en kotaĵon de Chentao-distrikt' senpage.
Spitante la ĉielon klaran kaj sen batalvokoj,
kvar dekmil militistoj sin oferis ja samtage.
Forlavis ribelantoj sangon el armiloj glore,
kantante kaj drinkante sate tra la urbaj stratoj.
Sin turnas norden loĝantar' de Chang'an, singultplore,
sopire arde al alven' de reĝaj soldatoj.

trad. Vejdo

哀江头

少陵野老吞声哭，春日潜行曲江曲。
江头宫殿锁千门，细柳新蒲为谁绿？
忆昔霓旌下南苑，苑中万物生颜色。
昭阳殿里第一人，同辇随君侍君侧。
辇前才人带弓箭，白马嚼啮黄金勒。
翻身向天仰射云，一笑正坠双飞翼。
明眸皓齿今何在？血污游魂归不得。
清渭东流剑阁深，去住彼此无消息。
人生有情泪沾臆，江水江花岂终极！
黄昏胡骑尘满城，欲往城南望城北。

Malĝojemulo ĉe la riverbordo

Sensone olda sovaĝ' el Shaoling* larmojn glutas,
sekrete iras al Rivero Kurba primavere.
Envide mil ŝlositaj palac-pordoj jen sin trudas,

por kies ĝu' ĉeborda salikaro verdas vere?
 Iame l' reĝaj flagoj al Sudkorto pave venis,
 aspektis ĉio ena tre kolore jen beleta.
 Unua Sinjorino el Palaco Zhaoyang prenis
 sidlokon en l' imperiestra ĉaro servopreta.
 Sagistoj inaj antaŭ l' ĉaro rajdis kun fiero
 sur la ĉevaloj blankaj kun orita bridrimeno.
 Sagistino levis kapon, sendis sagon al l' aero,
 du birdoj falis jam de la ĉielo pro vundsveno.
 Kie la brilaj okulpar' kaj dentoj nun forvagas?
 Fantom' sangmakulita** vagabondas sen reveno.
 Ĉiam roĝo Wei fluas, Jian'ge-vojoj ja zigzagas,
 Ne plu l' mortinto kaj vivantoj mesaĝis kun kompreno.
 Per larmoj homoj ĉiam en la kor' sopiron kovas,
 kiel ĉe bord' revivas floroj, herboj energie.
 Krepuske la rajdantoj hunaj polvonubon movas,
 volante suden, norden mi direktas senkonscie.

**Du Fu aludas sin mem.*

***Tio signifas Yang Guifei, la plej amata konkubino de tiama imperiestro. Ŝi estis mortigita laŭ la ordono de la imperiestro, kiu faris tion sub la minaco de ribelantaj trupoj.*

trad. Vejdo

病马

乘尔亦已久，天寒关塞深。
 尘中老尽力，岁晚病伤心。
 毛骨岂殊众，驯良犹至今。
 物微意不浅，感动一沉吟。

La malsana ĉevalo

Mi longtempe rapidas vin kun fido,
 Nun ĉe landolim' tra vintra frido.
 Vian forton suĉis vojaĝpuno,
 paras vin malsano kaj maljuno.

Ordinara vi ĉevalo estas,
 kaj fidela, vi cedema restas.
 Nura brut', jes, kun humoro pia,
 indas je odado mia emocia.

trad. Vejdo

蜀相

丞相祠堂何处寻？锦官城外柏森森。
 映阶碧草自春色，隔叶黄鹂空好音。

三顾频频天下计，两朝开济老臣心。
出师未捷身先死，长使英雄泪满襟。

Templo memore al Zhuge Liang*

Kie troviĝas Templo por memori l' ĉefministron?
Ĝi nestas ekster Chengdu** en arbaro de cipresoj.
Verd-herboj inter ŝtupoŝtonoj plektas primaveron,
surbranĉe birdoj trilas melodion ja sen ĉesoj.

Tri-foje l' duko jam invitis vin al plan' la ŝtata***,
vi—sindoneme helpis du regn-estrojn kun sukcesoj,
ve, vivoferis antaŭ ol akiri finan venkon.
Pri vi l' herooj postaj larmis jen kun kor-opresoj.

**Fama ĉefministro de Shu-regno dum la periodo de Tri Regnoj en antikva Ĉinio.*

***Urbo en sudokcidenta Ĉinio, tiama ĉefurbo de Shu-regno.*

**** "La duko" aludas Liu Bei, regnestron de Shu-regno, kiu, por ŝtataj aferoj, invitis tri fojojn Zhuge Liang por helpi sin, spite al ties ignorado, kaj finfine gajnis la talentan kompetentulon.*

trad. Vejdo

江上值水如海势聊短述

为人性僻耽佳句，语不惊人死不休。
老去诗篇浑漫与，春来花鸟莫深愁。
新添水槛供垂钓，故着浮槎替入舟。
焉得思如陶谢手，令渠述作与同游。

Kiam rivero aspektas marsimila

Kun fermita karakter' mi ŝatas
elfari versojn de poemo,
mi ĝismorte absorbite ĉasas
mirigajn frazojn kun volemo.
Jen oldaĝe simplajn versojn bakas
mi laŭ natura flu' de memo,
eĉ printempaj birdoj ĉi tien falas,
ne sentas ĝenon kun timpremo.
Mi sur novan balustradon amas
apogi min en ĝoj-ekstremo
por fiŝhoki, kaj sur flos' mi gajas
anstataŭ en boat' kun ĝemo.
Grandajn la poetojn (kiel Tao kaj Xie) akompanas
volonte mi kun verva temo,
verki versajn pecojn tree plaĉas
nin kunveture en ravemo.

trad. Vejdo

水檻遣心二首（之一）

去郭轩楹敞，无村眺望赊。
澄江平少岸，幽树晚多花。
细雨鱼儿出，微风燕子斜。
城中十万户，此地两三家。

Mi sentas min libera ĉe balustrado

De l' urbo fore l' kort' pli larĝa ŝajnas,
pli longa l' vid' sen ekzist' de vilaĝoj:
pro riverŝvel' bordlando pli malgajnas;
kun arba fon' plimultas florsejzaĝoj;
elakve saltas fiŝoj, pluvo duŝas;
hirundoj strabe flugas en brizsku';
en urbo centmil domoj sin kunpuŝas,
dum tie ĉi nur staras tri aŭ du.

trad. Vejdo

花鴨

花鴨无泥滓，阶前每缓行。
羽毛知独立，黑白太分明。
不觉群心妒，休牵众眼惊。
稻粱沾汝在，作意莫先鸣。

Kolora anaso

Senkota, kolorriĉa, la anaso
suriras ŝtupojn jen per paŝoj lantaj.
Dividas plumoj sin per kolorklaso,
la ĝiaj sidas nigraj disde blankaj.

Atentas nek envion de sia raso
nek miron ĝi en mavaj la okuloj.
Kuraĝus ĝi el sama la manĝ-maso,
sed gakas ne l' unua por mastr-luloj.

trad. Vejdo

宿府

清秋幕府井梧寒，独宿江城蜡炬残。
永夜角声悲自语，中天月色好谁看。
风尘荏苒音书绝，关塞萧条行路难。
已忍伶俜十年事，强移栖息一枝安。

Tranoktado en l' oficejo

Ĉe puto platano sin trovas en frosto
sub freŝe aŭtuna ĉielo.
Mi sola tranoktas en tendo de Jiangcheng
kun flame kaduka kandelo.
Korn-sono trafendas la nokton, kvazaŭe
dirante al si mem mizere.
Zenite la luno aspektas pitoreska,
kiu ĝin aprecas sincere?
En longa tempdaŭro leteroj elhejmaj
neniaj atingas, nenniaj.
Laŭ hejmira voj' min atendas pasejoj
dezertaj, danĝeraj, defiaj.
Dek jarojn mi migras, suferas tro multe
en tagoj tragikaj sennombraj.
Finfine samkiel birdeto kaŝvivu
surbranĉe en pensoj mi sombraj.
trad. Vejdo

蚕谷行

天下郡国向万城，无有一城无甲兵！
焉得铸甲作农器，一寸荒田牛得耕？
牛尽耕，蚕亦成。
不劳烈士泪滂沱，男谷女丝行复歌。

Kanto pri silkraŭpoj kaj greno

La lando dispeciĝas en da urboj presk' dek miloj,
en kiuj ne okazas ne konfliktoj per armiloj.
Ĉu oni fandu l' batalilojn ja por grenakiroj,
por ke nekulturita ter' plugitu col' post colo,
silkraŭpojn bredu inoj kaj bovplugu l' teron viroj.
Ne plu soldatoj verŝu larmojn en torentsimilo.
Geviroj, kunlaboru, kantu ree en trankvilo.
trad. Vejdo

登岳阳楼

昔闻洞庭水，今上岳阳楼。
吴楚东南坼，乾坤日夜浮。
亲朋无一字，老病有孤舟。
戎马关山北，凭轩涕泗流。

Sur Yueyang-turo

Jam longe aŭdis mi pri Dongting-lago,
mi Yueyang-turon ĉe ĝi nun ascendas.

Lagakvo landon en du partojn fendas,
ĉiel' surflosas jen dum nokt' kaj tago.
Karuloj senmesaĝe al mi silentas
soleca, old-malsana en boato.
Milit' reardas norde de la ŝtato,
kaj mi kun larmoj fluaj ve-lamentas.
trad. Vejdo

自京赴奉先县咏怀五百字

杜陵有布衣，老大意转拙。
许身一何愚，窃比稷与契。
居然成濩落，白首甘契阔。
盖棺事则已，此志常觊豁。
穷年忧黎元，叹息肠内热。
取笑同学翁，浩歌弥激烈。
非无江海志，潇洒送日月。
生逢尧舜君，不忍便永诀。
当今廊庙具，构厦岂云缺。
葵藿倾太阳，物性固莫夺。
顾惟蝼蚁辈，但自求其穴。
胡为慕大鲸，辄拟偃溟渤？
以兹误生理，独耻事干谒。
兀兀遂至今，忍为尘埃没！
终愧巢与由，未能易其节。
沉饮聊自遣，放歌破愁绝。
岁暮百草零，疾风高冈裂。
天衢阴峥嵘，客子中夜发。
霜严衣带断，指直不得结。
凌晨过骊山，御榻在嵯峨。
蚩尤塞寒空，蹴踏崖谷滑。
瑶池气郁律，羽林相摩戛。
君臣留欢娱，乐动殷胶葛。
赐浴皆长缨，与宴非短褐。
彤庭所分帛，本自寒女出。
鞭挞其夫家，聚敛贡城阙。
圣人筐篚恩，实欲邦国活。
臣如忽至理，君岂弃此物？
多士盈朝廷，仁者宜战栗。
况闻内金盘，尽在卫霍室。
中堂舞神仙，烟雾蒙玉质。
暖客貂鼠裘，悲管逐清瑟。
劝客驼蹄羹，霜橙压香橘。
朱门酒肉臭，路有冻死骨。
荣枯咫尺异，惆怅难再述。

北轅就涇渭，官渡又政轍。
群冰從西下，極目高崢兀。
疑是崆峒來，恐觸天柱折。
河梁幸未坼，枝撐聲窸窣。
行旅相攀援，川廣不可越。
老妻寄異縣，十口隔風雪。
誰能久不顧？庶往共飢渴。
入門聞號啕，幼子餓已卒。
吾寧舍一哀，里巷亦嗚咽。
所愧為人父，無食致夭折。
豈知秋禾登，貧窶有倉卒？
生常免租稅，名不隸征伐。
撫迹猶酸辛，平人固騷屑。
默思失業徒，因念遠戍卒。
憂端齊終南，瀕洞不可掇。

Versaĵo farita survoje de la ĉefurbo al Fengxian-gubernio

Min vestas per katuno kruda mi,
oldaĝ' min obstinis en raci'.
Ke kun ministroj oldaj min kompari
mi volis, kiel malsaĝe tion fari!
Finfine mi min sentas nekonvena,
kaj turnas al penemo solecplena.
Escepte se alvokos min la morto,
ne l' ambicio falas en aborto.
Prizorgas mi l' popolon ĉiuhore,
la simpation naskas ja elkore.
Primokas kunlernantoj min je stulto,
mi dume dronas febre en kred-kulto.
Mi dezirus vivi kiel ermito,
kaj vidi l' sunon, lunon en ir-glito.
Ĉar regas la monarko kun merito,
malamas mi foriri por evito.
Amasas en korteg' nun talentuloj,
utilas ne la nanoj en ranguloj.
Senhelpe, ve, mi kiel helianto
ĉiame turnas min al sun-giganto.
Ĉar nure estas mi malgranda besto,
kiu nur kontentas pri la ŝirma nesto,
pro kio la balenon mi envias,
kiu furiozan maron ja defias?
El tio venas mi al la konkludo:
por-peta aŭdienc'—hontinda ludo.
Mi ĝis hodiaŭ restas senfaranto

kun polv' kaj kot' kovranta ĝis kolrando.
Vizaĝe al l' ermitoj sanktaj, noblaj,
mi plenas je hontinda sent' duobla.
Drinkante kaj kantante kun korgemo,
malĝoja mi vivaĉas ĝis ekstremo.
Jarfine mil, mil herboj velkas morte,
montetoj krevus en ventego forte.
Ĉielaj stratoj grizis sub nub-pezo,
vaganto, mi ekiris en noktmezo.
Vestzonon rompis prujn' deŝove
rigidaj fingroj nodis ĝin senpove.
Monton Li frumatene trapasinte,
mi vidis reĝpalacon surmontpinte.
Nebulo densis sur ĉielo frida,
stumble iris mi en val' humida.
Surmonta banbasen' vaporis nube,
soldatoj reĝaj gardis amas-trupe.
Monark' kaj dukoj ĝuis sin diboĉe,
muzik' de flutoj sonis tondravoĉe.
Banantoj—senescepte korteganoj,
Ĝuantoj—neniele popolanoj.
Jen donaciĝis en palac' silkruloj,
produktis ilin inaj malriĉuloj,
kies edzoj ilin sendis sub vip-pelo
kiel tributon al palaca kelo.
Imperiestra graco per donaco
alcelas regi l' landon en viv-paco.
Se donacitoj tretas la intencon,
ĉu la regnestr' ricevus rekompencan?
El funkciuloj en korteg' disponaj
humilas antaŭ dev' nur la sindonaj.
Malgraŭe donacaĵoj falas sur
parencojn reĝajn laŭ ties plezur'.
Knabinoj dancas tie fein-similaj
kun diafanaj roboj svingfacilaj;
spektantojn varmas peltaj la surtutoj
en softa la muzik' de kordoj, flutoj;
manĝtablon pezas kaĉo kamelkruraj,
citronoj, mandarinoj plenmaturaj.
Ve! Vin', viando stinkas enpalacaj,
surstrate kuŝas homoj mort-grimacaj!
Diboĉon mort' alfrontas tuj proksime,
malĝojas mi enkore tre senlime.
La ĉaron mi direktas norden lante,

pramejon vane serĉas mi trovante.
 Torentas fluoj la deokcidentaj,
 tre agresemaj, danĝeroprezentaj,
 kvazaŭ alpremus mont' giganta
 kaj rompus fostojn de ĉiel' kovranta.
 Feliĉe l' pont' ankoraŭ traireblas,
 kvankam kaduka, knaras, feblas,
 sur kiu kroĉas unu la alian
 irantoj trans akv-vaston la muĝ-krian.
 Edzinon, idojn miajn en fremdloko
 neĝŝtormo baras de mi en sufoko.
 Kiu vole sin izoli deziras?
 Kuniĝon familian mi aspiras.
 Renkontis min ploreg' ĉe porde, ĉar
 malsate mortis l' id' en juna jar'.
 Eligis laŭtan ŝrikon mi ĝissate,
 najbaroj singultploris kunkompate.
 La patro taŭga mi ne indas esti,
 mi povis ne lin nutri por vivresti.
 Kiu imagas, tempe de aŭtuna
 rikolt', pro povr' subitis morto juna.
 Dumvive senigita je imposto,
 livre', konskript' pro mia fama kosto,
 suferas ankaŭ mi jen de ĉagrenoj,
 ordinarulojn certe hantas ĝenoj.
 Ekpense je la uloj senrimedaj
 k' soldatoj ĉe landlimo gard-pikedaj,
 mi naskas tuj malĝojon la senhaltan
 kiu senbride voras monton l' altan.
 trad. Vejdo

绝句

两个黄鹂鸣翠柳，
 一行白鹭上青天。
 窗含西岭千秋雪，
 门泊东吴万里船。

Verskvaro

Sur branĉoj verdsalikaj du oriojoj ĥoras,
 Linio da ardeoj al blu' ĉiela soras.
 Vidiĝas tra fenestro miljara neĝ' sur monto,
 Ĉe l' pord' ankriĝas ŝonkoj de l' regno kiu foras.
 trad. Minosun

漫兴

糝径杨花铺白毡，
点溪荷叶叠青钱。
笋根雉子无人见，
沙上凫雏傍母眠。

Improvisaĵo

Sur sabla vojeto ŝutiĝas
Salikaj pure blankaj floroj.
Lotusaj folioj plenkovras
La rojon per verdaj koloroj.
La fazanidetoj post ŝosoj
Bambuaj apenaŭ vidiĝas,
Ĉe sia panjo anasidoj
Dormante nun dolĉe feliĉas.
trad. Minosun

漫兴

肠断春江欲尽头，
杖藜徐步立芳洲。
癫狂柳絮随风舞，
轻薄桃花逐水流。

Okazaj pensoj

Afliktas min river' de printempo velkoranda,
Mi staras irbastone sur benko floro-planta.
Freneze flirtas flokoj salikaj en vent-danco,
Frivolaj persikfloroj drivas laŭ akv' fluanta.
trad. Minosun

曲江二首（其一）

一片花飞减却春，
风飘万点正愁人。
且看欲尽花经眼，
莫厌伤多酒入唇。
江上小堂巢翡翠，
苑边高冢卧麒麟。
细推物理须行乐，
何用浮名绊此身。

Ĉe la rivero Qu

(unu el la du poemoj kun la sama titolo)

Per unuflora falo la printemp' ekmalfortiĝas,
Kaj dek mil floroj en ventkirlo nun des pli ĉagrenas.

Flirtantaj ilin en ĉi agonio mi rigardas
Kaj por enkoran splenon peli vinon multe prenas.
Alcedoj nestas en la domo sur rievera bordo,
Ĉe l' tombo en reĝparko ŝtonaj Qilin jam forsvenas
Se bone rezonante pri la leĝo de aferoj,
Kial per vanta kaj malplena fam' mi min katenas?
**Qilin: ĉina unukormulo (legenda besto, kiun la antikvuloj imagis kun kapo de leono,
korpo de cervo, skvamoj de drako, vosto de bovo ktp. kaj kiu servis kiel simbolo de
bonaŭgureco)*

trad. Minosun

江村

清江一曲抱村流，
长夏江村事事幽。
自去自来梁上燕，
相亲相近水中鸥。
老妻画纸为棋局，
稚子敲针作钓钩。
多病所须惟药物，
微躯此外更何求。

La vilaĝo ĉe l' rivero

Rivero klara fluas ĉirkaŭ la vilaĝo,
En longaj somertagoj mi senzorgas tie.
Al aŭ de traboj hirundoj libere flugas;
Sur akvo laroj intimiĝas softekrie
L' edzino surpapere pentras ŝaktabulon;
El pingl' fiŝhokon faras mia fil' pasie.
Krom kuracilo kontraŭ la malsano mia,
Kion alian mi postulas ambicie?

trad. Minosun

南邻

锦里先生乌角巾，
园收芋栗未全穷。
惯看宾客儿童喜，
得食阶除鸟雀驯。
秋水才深四五尺，
夜航恰受两三人。
白沙翠竹江村暮，
相送柴门月色新。

La suda najbaro

Sinjoro Jinli, ne riĉulo, kun ermita ĉapo;

Ĝardeno lia plenas je la taroj kaj kaŝtanoj.
La birdoj surperone bekas grajnoj senzorgeme,
Kutimas gaje alrigardi gastojn la infanoj.
Aŭtuna akvo malprofundas je kvar aŭ kvin futoj,
Permesas nur al du-tri homoj noktveturi barke.
Sin lokas la vilaĝo ĉe sabl-duno kaj bambuoj;
Je mia ĝiso ĉe la pordo l' luno lumas arke.

trad. Minosun

客至

舍南舍北皆春水，但见群鸥日日来。
花径不曾缘客扫，蓬门今始为君开。
盘飧市远无兼味，樽酒家贫只旧醅。
肯与邻翁相对饮，隔篱呼取尽余杯。

Alven' de gasto

Super akv' printempa ĉirkaŭ mia domo,
jen frekventas birdaj grupoj en ŝvebado.
Ne ankoraŭ balaitas por vi l' pado,
barilpordon mi malfermas, mia homo.
Hejmo mia distas de la bazarloko,
vin regalu povre mi per vin' malklara.
Ĉu vin-akompane la oldul' najbara?
Lin kondukos por plezuro nur alvoko.

trad. Vejdo

春夜喜雨

好雨知时节，当春乃发生。
随风潜入夜，润物细无声。
野径云俱黑，江船火独明。
晓看红湿处，花重锦官城。

Pluvo en printempa nokto

Bona pluvo konas la sezonon,
falas ofte ĝi en primavero.
Ĝi kun vento kaŝe iras nokte,
ĉion ĝi humidas sen son-elo.
Nigras nuboj super la kamp-pado,
lumas la boato sur rivero.
Ĉe tagiĝ' vidiĝas ruĝ' kun roso,
urbe floroj pompas en prospero.

trad. Vejdo

望岳

岱宗夫如何？齐鲁青未了。
造化钟神秀，阴阳割昏晓。
荡胸生层云，决眦入归鸟。
会当凌绝顶，一览众山小。

Rigardo al la monto

Kiel la grandioza Taishan-mont' aspektas?
Sur l' ebenaĵo monton kovras verd' senlima.
naturdotitaj la pejzaĝoj ĉarme sorĉas,
maten', vesper' varias per aper' fascina.
Kirliĝas nuboj kvaz' tumulte en la brusto,
birdar' regalas vidon per la flug' pilgrima.
Se stari sur montpinto ĝia kaj rigardi:
aliaj montoj etas en la for' senfina.

trad. Vejdo

茅屋为秋风所破歌

八月秋高风怒号，卷我屋上三重茅。茅飞渡江洒江郊，高者挂胃长林梢，下者飘转沉塘坳。
南村群童欺我老无力，忍能对面为盗贼。公然抱茅入竹去，唇焦口燥呼不得，归来倚杖自叹息。
俄顷风定云墨色，秋天漠漠向昏黑。布衾多年冷似铁，娇儿恶卧踏里裂。床头屋漏无干处，雨脚如麻未断绝。自经丧乱少睡眠，长夜沾湿何由彻！
安得广厦千万间，大庇天下寒士俱欢颜，风雨不动安如山。呜呼！何时眼前突兀见此屋，吾庐独破受冻死亦足！

Lamento pri mia pajlkabano damaĝita de l' aŭtuna vento

Aŭgusta vento muĝas en aŭtuna la vetero,
forblovas pajlojn de l' tegmento de kabano mia.
Jen ili flirtas al la suda bordo trans rivero,
sur arbopintoj alte pendas kelkaj pajlaj tigoj,
aliaj sur malaltajn kampojn falas kun leĝero.

La buboj de l' vilaĝo suda venas kun defio
al mia malfortiĝ' kaj rolon de rabisto ludas,
forportas pajlojn en bambuojn eĉ sen simpatio.
Mi ne reteni ilin povas per vokad' raŭkiga,
mi devas min apogi al bastono kun ĝemkrio.

Momente post ventado svarmas peĉe nigraj nuboj,
tuj la ĉiel' aŭtuna nebuliĝas en malhelo.
La litkovril' trupleonas pro endorma piedpuŝoj
de filĉjo kaj pro uz' multjara fridas kvazaŭ fero.

Pluvakvo likas el tegmento tie kaj ĉi tie,
neniu loko sekas pro senĉesa pluv-kruelo.
De la ribel-tumulto mi malmulte dormas pace,
kiel mi povus dormi tra la nokto en sufero?

Mi volus, ke mil kaj mil altaj domoj jen stariĝu
por ŝirmi ĉiujn povrajn la plebanojn en la mondo,
ke ili ĝoju en la domoj firmaj kiel monto.

Ho ve!

Se mia kabanaĉo tuj fariĝu domo tia,
preferus morti mi en frosto vere tragedia!

trad. Vejdo

佳人

绝代有佳人，幽居在空谷。
白云良家女，零落依草木。
关中昔丧乱，兄弟遭杀戮。
官高何足论，不得收骨肉。
世情恶衰歇，万事随转烛。
夫婿轻薄儿，新人美如玉。
合昏尚知时，鸳鸯不独宿。
但见新人笑，那闻旧人哭。
在山泉水清，出山泉水浊。
侍婢卖珠回，牵萝补茅屋。
摘花不插发，采柏动盈掬。
天寒翠袖薄，日暮倚修竹。

Belulino

Belulino sen rivalo
loĝas sola en profunda valo.
De rangulo alta
ŝi devenas en la stat' bonfarta,
tamen ŝi nun sen plezuro
vivas inter herboj de la ruo.
En milito de ribelo
mortis ŝia frato sub glavpelo.
Spite al altranguleco
la kadavr' traktiĝis ne laŭ deco.
En vulgara la hommondo
ĉio flosas blinde sur la ondo.
Ŝia edzo dandas fole,
li sin turnas al belin' frivole.
Floro konas tempon flori,
la ambirdoj ne deziras soli.

Ridas li al novedzino,
ploras ja malnova la virino.
Klaras akvo el montfonto,
sed sordidas ekstere de l' monto.
Ŝi elvendas por vivteno
la juvelojn pro la viva premo.
Por ripari la kabanon
ŝi nur emas uzi la lianon.
Ŝi deŝiris floron vole
ne por kapon dekori petole.
Ŝi derompas kun prefero
cipresbranĉojn al si kun fiero.
Jen en frosta la vetero
ŝia vest' tro mincas por la gelo.
ŝi nur staras ĉe vespero,
dorse kontraŭ la bambu' sen celo.
trad. Vejdo

初月

光细弦岂上，影斜轮未安。
微升古塞外，已隐暮云端。
河汉不改色，关山空自寒。
庭前有白露，暗满菊花团。

Nova luno

Leviĝas novluno kun mincaj radioj,
ankoraŭ flagretas l' oblikva lumbrilo.
Ascendas iome ĝi super lim-tero,
kaŝiĝas krepuske ĝi en nub-azilo.
Laktvojo ne ŝanĝas ja sian koloron,
montaro malvarmas vane en trankvilo.
En korto jen kuŝas blankbrilaj roseroj,
malhele rivelas sin la krizantema profilo.
trad. Vejdo

春望

国破山河在，城春草木深。
感时花溅泪，恨别鸟惊心。
烽火连三月，家书抵万金。
白头搔更短，浑欲不胜簪。

Pririgardo en printempo

Nur restas intaj monto kaj rivero
ankoraŭ en la regn' ruinigita,

malplenas tute l' urb' en primavero
kaj herboj densas sur la ter' humida.
Eĉ floroj jen faligas tristajn larmojn,
kiam lamentas mi pri regna sorto.
Birdar' malĝojon sentas en la koro
je la disiĝ' karula kun kor-tordo.
Milit' jam daŭras plene tri monatojn,
elhejma vort' valoras kiel oro.
Kapharoj miaj raras kaj griziĝas,
harpingl' ne kroĉi povas en ĉi horo.
trad. Vejdo

旅夜书怀

细草微风岸，危樯独夜舟。
星垂平野阔，月涌大江流。
名岂文章著，官应老病休。
飘飘何所似，天地一沙鸥。

Nokto ĉe gastejo

Zefiro blovas herbojn ĉe la bordo,
boat' kun masto nokte haltas sola.
Sub steloj des pli vastas l' ebenaĵo,
rivero fluas kun lunlumo palkolora.

Ĉu mi famiĝis pro verkado lerta?
mi demisiu pro l' oldaĝ' torpora.
mi malsanema vagas por nenio,
nur kiel mev' en flugo senfervora.

trad. Vejdo

兵车行

车辚辚，马萧萧，行人弓箭各在腰。
耶娘妻子走相送，尘埃不见咸阳桥。
牵衣顿足拦道哭，哭声直上干云霄。
道旁过者问行人，行人但云点行频。
或从十五北防河，便至四十西营田。
去时里正与裹头，归来头白还戍边。
边庭流血成海水，武皇开边意未已。
君不闻汉家山东二百州，千村万落生荆杞。
纵有健妇把锄犁，禾生陇亩无东西。
况复秦兵耐苦战，被驱不异犬与鸡。
长者虽有问，役夫敢申恨？
且如今年冬，未休关西卒。
县官急索租，租税从何出？

信知生男恶，反是生女好。
生女犹得嫁比邻，生男埋没随百草。
君不见，青海头，古来白骨无人收。
新鬼烦冤旧鬼哭，天阴雨湿声啾啾！

Militirado

Militĉaroj knaras, knaras, la ĉevaloj henas, henas,
la soldatoj kun pafark' kaj sagoj dum militirado.
Gepatroj, edzino kaj gefiloj kure venas
por adaŭi forirantaj la soldatojn sur la pado.
Dum militirado polv' leviĝas al aer' kun fol',
eĉ la Xianyang-ponto ne videblas klare en malhelo.
Retirante tiujn, ili stamfas en tragika plor',
bruo kaj plorsonoj soras rekte al ĉielo.
La pasantoj ĉuas al soldatoj, kio l' militir' por,
la respondo estas: "Pro konskriptigado ofta por konkero.
Kelkaj, dekkvin-jaraj, garnizonas norde de l' rivero,
kaj je kvardek jaroj, gardas ĉe l' uesta limo sen konsol'.
Ili ja foriris kun sangvin' kaj nigra la hararo,
sed revenas grizharuloj, kiel limgardistoj en la for'.
Tie en batalo la soldatoj sangas multe kiel maro,
sed l' imperiestro ne kontentas en ter-aneksio.
Ĉu vi aŭdas, ke la regno vastas je teritorio,
kie kreskas nur herbaĉoj en vilaĝoj mil kaj mil?
Eĉ fortika la virino plugas, sarkas laboreme,
kampoj ja disordas malsamkiel sub la zorgo de la vir'.
Plie la soldatoj bataladas tie kaj ĉi tie pene,
ĝuste kiel hundoj, kokoj forpelataj en humil'.
Kvankam maljunuloj kovas dubojn pri l' afero,
ĉu ni servutuloj povus plendi pri l' sufero?
En ĉi-jara vintr', ekzemple, registar' eĉ ne
ĉesis varbi la soldatojn okcidente de l' pasej'.
La instanco urĝe vringas impostgrenon el plebanoj,
kion ili povus doni, do, al kolektantaj la tiranoj?
Se ni frue sciis, ke damaĝas filoj nian vivon vere,
ni generus al ni la filinojn ja prefere.
La filinoj povas edziniĝi al najbara viro,
tamen filoj devas morti inter herboj, ve, pro militiro.
Vidu l' scenon ĉe la limo!
De antikv' neniŭ, ho, kolekti blankajn ostojn volas,
la fantomoj novaj krias kun plendemo kaj l' malnovaj ploras,
en humidaj tagoj krioj tristaj ĝis kulmino!"

trad. Vejdo

江南逢李龟年

岐王宅里寻常见，崔九堂前几度闻。
正是江南好风景，落花时节又逢君。

Renkontiĝo kun konato en Sudlando

Mi ofte vidis vin sur la scenejo en domo,
kaj spektis viajn art-prezentojn en palaca halo.
Nuntempe en la pitoreska loko en Sudlando,
mi re-renkontas vin dum la sezono de florfalo.

trad. Vejdo

阁夜

岁暮阴阳催短景，天涯霜雪霁寒宵。
五更鼓角声悲壮，三峡星河影动摇。
野哭千家闻战伐，夷歌数处起渔樵。
卧龙跃马终黄土，人事音书漫寂寥。

Nokto en gastejo

Pli kaj pli kurtas tagoj ĉe la fino de la jaro,
mi dum vagad' tranoktas je degelo de glacio.
Noktmeze mi blovadon tristan de la kornoj aŭdas,
Tri-gorĝa* spegurbildo vibras jen en Galaksio.
Alŝvebas la plorsonoj pro mesaĝoj pri milito,
meze de la kantvoĉoj de fiŝista melodio.
Ja same la bravuloj fine loĝis sub la tero,
la mondaj ŝanĝoj enuigas min ja en ansio.

** Tri gorĝoj situas ĉe Jangzi-rivero en Ĉinio.*

trad. Vejdo

月夜忆舍弟

戍鼓断人行，边秋一雁声。
露从今夜白，月是故乡明。
有弟皆分散，无家问死生。
寄书长不达，况乃未休兵。

Pensado pri mia frato

La tamburado sur gvatturo. La pasantoj haltas.
Sovaĝansero sola gakas en aŭtun' ĉe limo .
Ĉi-nokte komenciĝas period' de Blanka Roso,
la luno brilas pli super hejmlok' en malproksimo.
Aparte mi vagadas disde l' frato pro l' ofico,
malhavas hejmon ni por farti kune en intimo.
Leteroj ofte ne atingas unu al l' alia,
dum la milit' senĉese furiozas ja sen fino.

trad. Vejdo

月夜

今夜鄜州月，闺中只独看。
遥怜小儿女，未解忆长安。
香雾云鬟湿，清辉玉臂寒。
何时倚虚幌，双照泪痕干。

Luna nokto

Ĉi-nokte l' lun' kristale belas super Fuzhou,
l' edzino en haremo ĝin rigardas sola.
Gefiloj junaj ne komprenas ŝian koron,
kial ŝi stultas kun sopiro al mi fora.
Nubeskaj haroj humidiĝas de roseroj,
la brakoj fridas sub la luno palkolora.
Kiam ni povos jen ĉe la fenestro kune,
ke sub la lun' sekiĝu nia larm' dolora?
trad. Vejdo

石壕吏

暮投石壕村，有吏夜捉人。
老翁逾墙走，老妇出门看。
吏呼一何怒，妇啼一何苦。
听妇前致词，三男郾城戍。
一男附书至，二男新战死。
存者且偷生，死者长已矣。
室中更无人，惟有乳下孙。
有孙母未去，出入无完裙。
老妪力虽衰，请从吏夜归。
急应河阳役，犹得备晨炊。
夜久语声绝，如闻泣幽咽。
天明登前途，独与老翁别。

Pedelo en la vilaĝo Shihao

Tranoktante mi en la vilaĝo vidas:
por rekruto homojn kaptas la pedelo.
Trans la muro kaŝe fuĝas maljunulo,
kaj l' edzino gvatas ĉe la pord' en ŝtelo.
La pedelo krias laŭte pro kolero,
la virin' ekploras laŭte kaj tragike .
Ŝi rakontas pri dolora la afero:
“Miaj filoj tri ja iris al la limo,
fil' el ili nin informis per letero:
du aliaj mortis en batalo nelge.
Ni vivantoj jen nin trovas en mizero,

la mortintoj ne revenus por eterne.
Al ni mankas viro por rekrut-ofero,
restas nur la suĉinfan' sub nia zorgo.
Ĝia panjo ne foriris kun kruelo,
kaj ŝi eĉ ne havas vere decajn vestojn.
Kvankam mi malfortas, oldas kun ŝancelo,
mi volentas iri kun vi al tendaro.
Por rebati malamikon, kun prefero,
mi preparos matenmanĝon por soldatoj.”
Nokte fadas la homvoĉ' en malapero
nur aŭdiĝas intermitaj plora sonoj.
Kiam pretas mi foriri frumatene,
adiaŭas nur l' oldulon en sufero.

trad. Vejdo

丽人行

三月三日天气新，长安水边多丽人。
态浓意远淑且真，肌理细腻骨肉匀。
绣罗衣裳照暮春，蹙金孔雀银麒麟。
头上何所有？翠微盍叶垂鬓唇。
背后何所见？珠压腰褭稳称身。
就中云幕椒房亲，赐名大国虢与秦。
紫驼之峰出翠釜，水精之盘行素鳞。
犀箸厌饫久未下，鸾刀缕切空纷纶。
黄门飞鞚不动尘，御厨络绎送八珍。
箫鼓哀吟感鬼神，宾从杂遝实要津。
后来鞍马何俊巡，当轩下马入锦茵。
杨花雪落覆白苹，青鸟飞去衔红巾。
炙手可热势绝伦，慎莫近前丞相嗔！

Ekskurso de belulinoj

La trian de la tria lunmonato
serenas la vetero,
en Chang'an kolektiĝas belulinoj
amase ĉe rivero.
Ili aspektas elegante, ĉarme,
gracie kun plezuro,
kun glate delikata haŭt' glacea
modere en staturo.
Satenaj vestoj okulfrapas bele
en malfru-primavero,
broditaj kun unukornuloj blankaj
kaj pavoj en or-helo.
Surkape florornamoj el smeraldo

falpendas ĝis tempio,
surdorse sidas juvel-inkrustita
la zono ĉe talio.

El ili kelkaj estas la parencoj
de reĝa kromedzino,
kaj famkonataj honordamoj Guo, Qin
konataj en fascino.

Vaporumitas kamelaĵ' purpura
en jada kaserolo,
sur rond-teler' kristala alportiĝas
gras-fiŝ' kun bon-saporo.

Senmove ili tenas la haŝiojn
el rinocera ostoj,
klopodis kuiristoj jen por ili
vane je ĉia kosto.

Eŭnukoj ne kuraĝas levi polvon
rajdante sur ĉevalo,
senĉese kuiristoj la fandaĵojn
alportas sen avaro.

Muzik' de instrumentoj kordaj brue
vibradas en aero,
nobeloj, altranguloj kun lakeoj
amasas en apero.

Ĉeval' entrudas nun kun altrangulo
senpere al tendaro,
descendas li de la ĉeval' kaj iras
rekte al karnavalo.

Neĝblankaj salikflokaj flirte falas
sur lemnojn en laĝeto,

Blubird' alflugas kaj buŝprenas ruĝan
silk-tukon kun impeto.

Incitu ne la altrangulon mavan
de familio forta

ja por eviti riproĉadon lian
kun insultado morda.

trad. Vejdo

画鹰

素练风霜起，苍鹰画作殊。
拟身思狡兔，侧目似愁胡。
绦镞光堪摘，轩楹势可呼。
何当击凡鸟，毛血洒平芜。

Pentraĵo de aglo

Leviĝas prujna vent' el blanka silko,
pentrita agl' aperas sur papero.
Ĝi klinas sin por kapti la leporon,
minacas ĝi jen per okula helo.
Ĝi je forigo de ferĉen' forflugus,
kaj je alvok' alvenus el ĉielo.
Se ĝin instigi por batali birdon,
tuj sango birda ŝprucas al la tero.
trad. Vejdo

杜牧 (803-852)

Du Mu (803-852)

秋夕

银烛秋光冷画屏，轻罗小扇扑流萤。
天阶夜色凉如水，卧看牵牛织女星。

En aŭtuna nokto

Ekranon aŭtun-nokt' fridigas en kandela lum'
svingiĝas peli kulojn gaza ventumil' en zum'.
La ŝtupoj malvarmiĝas akve en vualo nokta
ŝi kuŝe spektas la stelparon jen en amindum'*.

**stelpar'—ĉi tie aludas bovistan kaj teksistinan stelojn (Altairo kaj Vego), kiuj, laŭ ĉina antikva legendo, estas du amantaj steloj.*

trad. Vejdo

清明

清明时节雨纷纷，
路上行人欲断魂。
借问酒家何处有，
牧童遥指杏花村。

Klaro kaj Brilo*

Dum Klar' kaj Bril' senĉese pluvetas kun fervor'
Survoje vojaĝantoj morozas de angor'.
Mi ĉuas: "Bovisteto, kie drinkejo estas?"
Li montras foren al la vilaĝ' Abrikotflor'.

**Klaro kaj Brilo: unu el la 24 sunperiodoj, kiu komenciĝas je la 4-, 5-a aŭ 6-a de aprilo, kaj dum kiu (precipe en la Festo de Mortintoj) oni vizitas la tombojn de mortintoj por ilin rememori.*

tra. Minosun

La funebra tago

Pluveto milde falas en funebra tago
Survojaj homoj paŝas kun malĝoja koro.
"Ĉu ie estas vindrinkejo, paŝtisteto?"
Li montras la vilaĝon Abrikota Floro.

trad. Ardo

江南春

千里莺啼绿映红，
水村山郭酒旗风。
南朝四百八十寺，
多少楼台烟雨中。

La printempo sude de la rivero Janzio

En vastego ruĝa-verda trilas birdoj,
En vilaĝoj kaj urbetoj flirtas vinvend-ŝildoj.
Ho, el kvarcent okdek temploj tra la regno,
Kiom vualiĝas svage en nebulaj bildoj?

trad. Minosun

旅宿

旅馆无良伴，凝情自悄然。寒灯思旧事，断雁警愁眠。
远梦归侵晓，家书到隔年。沧江好烟月，门系钓鱼船。

En gastejo

En la gastej' mi restas sen kompano
Kaj en kontemplo de melankolio.
La frida lamp' pensigas pri paseo,
Ekvekas min sovaĝansera krio.
Tra jaro l' hejmletero nun atingas
Afliktas min matene nostalgio.
Ekstere ĉe l' nebula riverbordo
ligitas fiŝboat' de l' familio.

trad. Minosun

独酌

窗外正风雪，
拥炉开酒缸。
何如钓船雨，
篷底睡秋江。

Trinkado en soleco

Ekstere de l' fenestro sovaĝas neĝoŝtormo,
El vinovazo ene mi trinkas ĉe l' hejtforno.

Ĉu ne pli bonus, se mi fiŝhokus en boat', aŭ
Min lulus subtegmente, en pluv' aŭtuna, dormo?
trad. Minosun

Sola trinkanto

Ekstere de fenestro hurlas la neĝ-ŝtormo,
en domo mi trinkadas vinon ĉe fajr-forno,
preferas mi fiŝkapti en aŭtuna pluvo,
al mi pli bona estas enboate l' dormo.
trad. Ardo

长安秋望

楼倚霜树外，镜天无一毫。
南山与秋色，气势两相高。

Aŭtuno en Chang'an

Tur' pli altas super prujn-frapita arbopinto,
ne videblas nuba strio sur ĉielspegulo.
Suda Monto klaras kaj imponas en aŭtuno,
ĉu ĝi volus veti je la belo kun naturo?
trad. Vejdo

暝投云智寺渡溪不得，却取沿江路往

双岩泻一川，回马断桥前。
古庙阴风地，寒钟暮雨天。
沙虚留虎迹，水滑带龙涎。
却下临江路，潮深无渡船。

Survoje al Templo Yunzhi

Impetas rojo puŝe inter du ŝtonegoj,
ĉevalon turnas mi al ponto en ŝancelo.
Ĉe praa templ' tereno ludas vent' humida,
krepuske sonorilo tintas en pluvpelo.
Videblas tigra piedspuro sur sablejo,
rojakvo saŭme, glate fluas kun leĝero.
mi daŭre serĉas sur la apudroja vojo,
ne disponeblas pramo tamen pro akv-ŝvelo.
trad. Vejdo

叹花

自是寻春去校迟，不须惆怅怨芳时。
狂风落尽深红色，绿叶成阴子满枝。

Lamento pri floroj

Printempon serĉas mi malfrue, tre bedaŭre!
Mi ne plendemu pri trofrua disflorado.
Ventego jam forblovis ruĝajn florojn teren,
elstaras verd-folioj, fruktoj en parado.
trad. Vejdo

贈別

多情却似总无情，唯觉尊前笑不成。
蜡烛有心还惜别，替人垂泪到天明。

Ĉe disiĝo

Kuniĝo montras ardan amon, sed disiĝ' neniom,
drinkante mi ne povas ridmieni, se mi volas.
Kandelo sur la tablo havas simpation por ni,
per grasaj larmoj pro disiĝo ĝis tagiĝ' ĝi ploras.
trad. Vejdo

秋日

有计自安业，秋风罢远吟。
买山惟种竹，对客更弹琴。
烟起药厨晚，杵声松院深。
闲眠得真性，惆怅旧时心。

Aŭtuna tago

Mi laŭvole vivas la trankvilan vivon,
ĝuas mi l' aŭtunan venton el la foro.
Mi bambuojn plantas sur la montdeklivo,
mi liutas al la gastoj kun bonvolo.
Drogoherbojn mi kuiris ĉe vespero,
en la kort' aŭdiĝas brua pist-laboro.
Venas vera la natur' el paca dormo,
splen' naskiĝas ree el pasinta koro.
trad. Vejdo

遣怀

落魄江湖载酒行，楚腰纤细掌中轻。
十年一觉扬州梦，赢得青楼薄幸名。

Rimorso

Dum mia iele-trapela viv' mi multe drinkis,
diboĉis ĝue kun virinoj kun talio svelta.
Dekjara vivo jen en Yangzhou krevis kiel songo,

restas al mi nur nomo de putin-ĉasanto merda.

trad. Vejdo

江楼

独酌芳春酒，
登楼已半醺。
谁惊一行雁，
冲断过江云。

Turo ĉe rivero

Mi trinkas la printempan arom-vinon,
surgrimpas turon jam duonebria.
Panike la sovaĝansera vico
trarompas nubojn super fluo stria.

trad. Vejdo

题新定八松院小石

雨滴珠玑碎，
苔生紫翠重。
故关何日到，
且看小三峰。

Eta roko en Ok-pina korto

Pluvaj gutoj falas kreve kiel perloj brilaj,
per la purpurverd' kovriĝas muskoplana tero.
Kiam oni povas vidi la imponan monton?
Nur rigardu ĉi roketon kun fascina belo.

trad. Vejdo

杜秋娘（约791—？）

Du Qiuniang (ĉ.791—?)

金缕衣

劝君莫惜金缕衣，
劝君惜取少年时。
花开堪折直须折，
莫待无花空折枝。

Orfadena vesto

Ne alkroĉiĝu al la vesto orfadena,
domaĝu tempon de juneco senĉagrena.
Jen pluku florojn dum disflora la prospero,

alie vin atendas branĉoj nur malplena.

trad. Vejdo

杜审言 (约 645 – 约 708)

Du Shenyan (ĉ. 645 – ĉ. 708)

和晋陵陆丞早春游望

独有宦游人，偏惊物候新。
云霞出海曙，梅柳渡江春。
淑气催黄鸟，晴光转绿蘋。
忽闻歌古调，归思欲沾巾。

Ekskurso en frua printempo

(Samrima respondaĵo al samtitola poemo de mia amiko)

Nur regnoficistoj, kiuj servas aliloke,
Pri la renoviĝo de sezonoj sin surprizas:
En la rozaj nuboj levas sin la sun' el maro;
La umeojn kaj salikojn trans rivero skizas
La printemp'. En ties varmo oriojoj verve
Kantas; la sunbrilo lemnojn hele nun verdizas.
Aŭskultante vian melodion, mi je l' hejmo
Eksopiras, kaj la nostalgi' min paralizas.

trad. Minosun

En frua printempo

Nur ranguloj laborantaj aliloke
tre sensivas al naturo en vario.
Tra nubar' la sun' leviĝas el la maro,
en printemp' salikoj verdas en magio.
Orioloj kantas en aero varma,
lemnoj malheliĝas sub la sunradio.
Jen aŭdiĝas antikveca la ario,
mi eklarmas kaj naskiĝas nostalgio.

trad. Vejdo

杜荀鹤 (846–907)

Du Xunhe (846-907)

春宫怨

早被婊娟误，欲妆临镜慵。
承恩不在貌，教妾若为容。
风暖鸟声碎，日高花影重。

年年越溪女，相忆采芙蓉。

Plendemo en palaco

Pro bel' mi elektitis en palacon,
nun pigras mi min ŝminki en spegulo.
Ĉar min regnestro gracias ne pro belo,
kial mi penas pavi kun plezuro?
En varma vento birdoj ĉirpas klare,
disĵetas floroj ombrojn sub sunbrulo.
Ĉi-tempe pensas mi pri l' kampulino,
lotusojn plukis ni en ĝoja lulo.

trad. Vejdo

高蟾 (? - ?)

Gao Chan (? - ?)

上高侍郎

天上碧桃和露种，
日边红杏倚云栽。
芙蓉生在秋江上，
不向东风怨未开。

Al vicministro Gao Pian

Ĉielajn verdpersikojn vartas favora roso,
Ruĝabrikotojn portas sunplena la nubozo.
Hibisko ĉe l' rivero aŭtuna ja senflora
Ne plendas pri malfrua disflora graci-pozo.

trad. Minosun

高骈 (821 – 887)

Gao Pian (821 – 887)

山亭夏日

绿树阴浓夏日长，
楼台倒影入池塘。
水晶帘动微风起，
满架蔷薇一院香。

Somera tago en monta kiosko

Verdaj arboj havas sub si densan ombron,
Longas la somera tago,
Pavilonoj kaj kioskoj speguliĝas

Sur ĉi tiu paca lago.
Perle brila pordkurteno sin movetas
En zefiro karesema,
Ĉie, en la plena korto, aromadas
De rozfloroj laŭb' ĝardena.
trad. Minosun

高适 (704-765)

Gao Shi (704-765)

别董大

千里黄云白日曛，北风吹雁雪纷纷。
莫愁前路无知己，天下谁人不识君。

Adiaŭado al amiko Dong

Grizflavaj la nuberoj ŝirmas sunon en malhelo,
sovaĝanseroj flugas kontraŭ neĝo en ventpelo.
Ne timas, ke vi ne amikon havos dum vojaĝo.
Kiu ne konas vin tre faman jen sub la ĉielo?
trad. Vejdo

除夜作

旅馆寒灯独不眠，客心何事转凄然。
故乡今夜思千里，霜鬓明朝又一年。

La nokto antaŭ la jarfino

En lamplumo de loĝejo frida mi maldormas sola,
do, pro kio agreniĝas mi ja en profundo kora?
Ili en hejmloko certe min sopiras en la foro,
morgaŭ nova jaro venos al mi grizharul' stupora.
trad. Vejdo

葛鸦儿 (?-?)

Ge Ya'er (?-?)

怀良人

蓬鬓荆钗世所稀，布裙犹是嫁时衣。
胡麻好种无人种，正是归时不见归。

Sopiremo al la edzo en la foro

En taŭzitaj haroj kun vergdorna kapdekoro,
portas mi ankoraŭ la nuptjupon el krudtolo.

Kvankam tempas jam sezamojn semi laŭ sezono,
tamen ne revenas li ĝusttempe el la foro.

trad. Vejdo

顾况 (? - ?)

Gu Kuang (? - ?)

宫词

玉楼天半起笙歌，风送宫嫔笑语和。
月殿影开闻夜漏，水晶帘卷近秋河。

Plendo de honordamo

Muzikaj sonoj el la luksa turo nubskrapanta
kaj ridoj de haremo kunfandiĝas en zefiro.
Nur gutas klepsidrakvo, ŝi kurtenon supren levas
por ĉei al la Lakta Vojo en aŭtuna spiro.

trad. Minosun

韩翃 (719—788)

Hang Hong (719—788)

寒食

春城无处不飞花，寒食东风御柳斜。
日暮汉宫传蜡烛，轻烟散入五侯家。

Tago de malvarma manĝaĵo

Nenie ne vidiĝas floroj en printempa urbo,
en la funebra tag'arb-branĉoj tremas en ventpelo.
Krepuske oni jam dissendas el palac'kandelojn,
en domoj de kvin lordoj ŝvebas fumo de kandelo.

trad. Ardo

En la festo de malvarma nutraĵo*

Per flirtantaj floroj dekoriĝas
ĉie l' metropolo de printempo;
la salikojn de l' ĝardeno reĝa
klinas vento en la festa tempo.
Je vespero vigle transdoniĝas
en palaco flamantaj kandeloj
kun leĝera fumo, kiu ŝovas
sin en luksan domon de nobeloj.

**En la festo (ofertago antaŭ Qingming) oni manĝis nur malvarman nutraĵon kaj estis*

absolute malpermesita fari fajron en la tuta lando, sed la imperiestro kaj liaj favorataj parencoj kaj nobeloj, kun privilegio, staris ekster la malpermeso. Se favoratoj ricevis "fajron" donacitan de la imperiestro en la festo, tio estis por ili aparte granda honoro.

trad. Minosun

酬程延秋夜即事见赠

长簟迎风早，空城澹月华。
星河秋一雁，砧杵夜千家。
节候看应晚，心期卧已赊。
向来吟秀句，不觉已鸣鸦。

Aŭtuna nokto

Kuŝante sur la mat' mi ĝuas friskan venton,
dumnokte flosas la lunlum' en l' urb' malplena.
Sovaĝanseroj flugas tra ĉiel' kun steloj,
aŭdiĝas sonoj de vestlav-batad' elhejma.
Jam en profundaj horoj de la nokt' kvieta,
min kaptas sopirem' al vi kun sent' ĉargena.
Mi legis viajn versojn donacitajn al mi,
nescie korvoj krias je la hor' matena.

trad. Vejdo

同题仙游观

仙台初见五城楼，风物凄凄宿雨收。
山色遥连秦树晚，砧声近报汉宫秋。
疏松影落空坛静，细草香闲小洞幽。
何用别寻方外去，人间亦自有丹丘。

Ĉe la taŭista templo Xianyou

De alte mi rigardas konstruaĵon de la templo,
lastnokta pluvo ĉesis, ĉio dronas en nebulo.
La monta verdo etendiĝas al malproksimeco,
aŭdiĝas lavbatad' el urbo je aŭtun-alrulo.

Laget' reflektas klare l' ombron de altar' malplena,
ĉe kavo herboj verdas kun penetra bonodoro.
Kial mi serĉu fean landon ekster homa mondo?
ĉi tie estas bela paradiz' laŭ mia volo.

trad. Vejdo

寒山（? —?）

Han Shan (?—?)

人问寒山道，寒山路不通。夏天冰未释，日出雾朦胧。
似我何由届，与君心不同。君心若似我，还得到其中。

Kiel atingi la Frost-Monton?
Al ĝi la voj' baritas plene.
Somere regas ja glacio,
nebulo densas sun-solene.
Kiel mi loĝas en ĉi monto,
aliaj volas tion ene.
Se iu havas mian senton,
li tie trovas sin senĝene.

城中娥眉女，珠珮珂珊珊。鸂鶒花前弄，琵琶月下弹。
长歌三月响，短舞万人看。未必长如此，芙蓉不耐寒。

En urb' fraŭlin' kun belaj brovoj
susuras per pendanta dekor'.
Papagon ŝi amuzas fole
liuton ludas en lunglor'.
Kantvoĉo ŝia eĥas tagojn
ŝi dancas scene kun fervor'.
Ĉu longe daŭros tiu stato?
Ne fridon spitas hibiskflor'.

家住绿岩下，庭芜更不芟。新藤垂缭绕，古石竖巉岩。
山果猕猴摘，池鱼白鹭衔。仙书一两卷，树下读喃喃。

Mi loĝas sub rok-klifo verda,
ne volas falĉi herbojn plu.
Rampantoj pendas kaj kroĉvolvas,
ŝtonegoj staras jen sen sku'.
Simioj plukas fruktojn ĝoje,
gruoj kaptas fiŝojn en flu'.
Sub arba ombr' taŭistajn librojn
mi legas kun murmura bru'.

谁家长不死，死事旧来均。始忆八尺汉，俄成一聚尘。
黄泉无晓日，青草有时春。行到伤心处，松风愁杀人。

Eterne kiu povas vivi?

por ĉiuj morto estas sama.
Fortulo alta post nelonge
fariĝos polv' pro mort' spontana.
Transmond' ne konas tempopason,
herboj strebas al tag' sunbana.
La tempo ĉagreniga venas
eĉ vento igas trist-fontana.

多少般数人，百计求名利。心贪觅荣华，经营图富贵。
心未片时歇，奔突如烟气。家眷实团圆，一呼百诺至。
不过七十年，冰消瓦解置。死了万事休，谁人承后嗣。
水浸泥弹丸，方知无意智。

Ekzistas diversspecaj homoj
penantaj por renoma glor',
ĉasantaj en kortegan rangon,
vendantaj por riĉaĵ-valor'.
Sen momenta halto ili
konkuras jen kun ŝvit-vapor'.
Finfine ili havas hejmon
kun servistoj por hejm-labor'.
Ĝis sepdek jaroj ili vivas
kiel glaci' degelas for.
Post morto nul' fariĝos ĉio,
do kiuj pretos je l' honor'?'
Komprenos klare ili tiam:
solviĝas kotoj en akv-vor'.
trad. Vejdo

韩偓 (842-923)

Han Wo (842-923)

已凉

碧阑干外绣帘垂，猩血屏风画折枝。
八尺龙须方锦褥，已凉天气未寒时。

La vetero fridiĝas

Falpendas brodita kurteno ĉe la balustrado,
la floroj koketas sur ruĝa ekran' en parado.
Satena matraco metitas jam sub la pajmaton,
vetero fridiĝas antaŭ ol alvenos frostbato.

trad. Vejdo

韩愈 (768-824)

Han Yu (768-824)

雉带箭

原头火烧静兀兀，野雉畏鹰出复没。
将军欲以巧伏人，盘马弯弓惜不发。
地形渐窄观者多，雉惊弓满劲箭加。
冲人决起百余尺，红翎白镞随倾斜。
将军仰笑军吏贺，五色离披马前堕。

Fazan' trafita sage

En kvieto kampa brulis la ĉasfajr' invade,
fuĝe sin fazan' sub agla ĉas-minaco.
Por elmontri la ĉas-lerton militĉef' parade,
forte streĉis arkon ŝajn-atende kun sagaco.
Plimallarĝis preme la sieĝ' de homamaso,
pro surpriz' fazan' elflugis kaj trafitas sage.
Ĝi barakte puŝis sin en homojn sen forlaso,
falas teren kun plumar' sangmakulita svage.
Militĉef' ridegis en ĉirkaŭa huraado
pri ĉasaĵo kolora ĉe ĉevalĉara rado.

trad. Vejdo

初春小雨

天街小雨润如酥，
草色遥看近却无。
最是一年春好处，
绝胜烟柳满皇都。

Pluveto en frua printempo

Pluveto en frua printempo
Humidas l' urba strat' pro pluveta friska falo,
freŝ-verdas herboj transe, sed cise en hel-palo.
Plej bonas ekprintempa vidaĵo super urbo
la reĝa, kie pompas salikoj en verd-marro.

trad. Minosun

晚春

草木知春不久归，
百般红紫斗芳菲。
杨花榆荚无才思，
惟解漫天作雪飞。

En malfrua printempo

La plantoj scias, ke foriros baldaŭ l' primavero;
La buntaj floroj ja konkuras laŭ sia libero.
Salikaj flokoj kaj eĉ ulmaj, kvankam ne helbelaj,
Disflugas kiel blanka neĝo flirtas en l' aero.

tra. Minosun

题榴花

五月榴花照眼明，
枝间时见子初成。
可怜此地无车马，
颠倒苍苔落绛英。

Dediĉe al granataj floroj

Granataj floroj majaj blindigan brilon donas,
De temp' al temp' sur branĉoj la fruktoj sin proponas.
Sed tien ĉi, bedaŭre, ne venas ĉevalĉaroj, -
Al musko l' ruĝaj flirtaj petaloj jam imponas.

trad. Minosun

贺知章（约 659 - 约 744）

He Zhizhang (ĉ. 659 – ĉ. 744)

回乡偶书二首

其一

少小离家老大回，乡音无改鬓毛衰。
儿童相见不相识，笑问客从何处来。

其二

离别家乡岁月多，近来人事半消磨。
惟有门前镜湖水，春风不改旧时波。

Improvizajo pri rehejmiĝo

1.

Foriro en juneco, reven' en alta aĝo;
Ŝanĝiĝis ĉio krom la akĉento de l' vilaĝo.
Infanoj min ne konas kaj ride pridemandas:
“De kie vi alvenas, aveto en vojaĝo?”

2.

De post forlas' de hejmo jam pasis multaj jaroj,
Dum kiuj konsumiĝis plejparte homaj faroj.
Nur l' antaŭporda lago ebena ne ŝanĝiĝis, -

Ankoraŭ ĝin karesas printempaj ond-muaroj.
trad. Minosun

咏柳

碧玉妆成一树高，万条垂下绿丝绦。
不知细叶谁裁出，二月春风似剪刀。

Kanto pri l' saliko

Sin trovas la saliko en smeralda tualetto,
Kaj pendas la branĉetoj supraj en centmilo.
Sed kiu tajlis ĉi foliojn sveltaj kaj graciaj? -
Jen vento de printempo frua kiel pritondilo.
trad. Minosun

胡令能 (785 - 826)

Hu Lingneng (785 - 826)

小儿垂钓

蓬头稚子学垂纶，侧坐莓苔草映身。
路人借问遥招手，怕得鱼惊不应人。

Infano fiŝhokanta

Infano kun taŭzitaĵoj lernas fiŝhokadon,
Sidante viglatente sur herboza musk-tapiŝo.
Pasanto venas pridemandi vojon, li mansignas
Tuj la ĉuanton por ne fortimigi ĝin – la fiŝo!
trad. Minosun

黄巢 (820–884)

Huang Chao (820-884)

不第后赋菊

待到秋来九月八，我花开后百花杀。冲天香阵透长安，满城尽带黄金甲。

Spekto al krizantemo post malsukceso en ekzameno

En l' aŭtuno krizantemo pompas en prospero,
floroj cent aliaj velkas pro veter-kruelo.
saturiĝas plene ĝia bonodor' en Chang-an,
ĉie ŝajne brilas skvam-kiraso en orhelo.
trad. Vejdo

题菊花

飒飒西风满院栽，蕊寒香冷蝶难来。他年我若为青帝，报与桃花一处开。

Krizantemo

En kort' disfloras krizantemo en aŭtuna vento,
ne venas papilioj en arom' pro frid-turmento.
Se mi fariĝus feo de printempo sur la tero,
mi volus, ke kun persikflor' disfloru vi en splendo.

trad. Vejdo

自题像

记得当年草上飞，铁衣著尽著僧衣。天津桥上无人识，独倚栏干看落晖。

Memportreto

Estinte mi heroe bataladis tra la lando,
sed nun mi jam fariĝis bonzo sen metal-kiraso.
Neniu konas min tiame kun renoma vanto,
rigardas sola mi al sunsubiro sur teraso.

trad. Vejdo

皇甫冉 (717-770)

Huangpu Ran (717-770)

春思

莺啼燕语报新年，马邑龙堆路几千。
家住层城临汉苑，心随明月到胡天。
机中锦字论长恨，楼上花枝笑独眠。
为问元戎窦车骑，何时返旆勒燕然。

Penso en printempo

Nova jaro venas en ĉirpad' de orioleoj,
etendiĝas kelkmil liojn norda la landlimo.
Kvankam loĝas mi ĉe la palaco en ĉefurbo,
tien flugas mia kor'kun lun'en malproksimo.

Vortoj sur saten' eldiras mian sopiremon,
floraj branĉoj min primokas jen pri dormo sola.
Ĉuu vian komandanton sur ĉevalo fera:
kiam gvidi trupojn al la urbo metropola?

trad. Vejdo

贾岛 (779 - 834)

Jia Dao (779 - 843)

寻隐者不遇

松下问童子，言师采药去。
只在此山中，云深不知处。

Sensukcesa vizito al ermito

Sub pino mi demandas servoknabon,
Li diras: "Majstro iris al montaro
Kolekti drogoherbojn; vi ne povas
Lin trovi pro l' profunda nubomaro."

trad. Minosun

三月晦日送春

三月正当三十日，
风光别我苦吟身。
共君今夜不须睡，
未到晓钟犹是春。

Adiaŭ al la printempo en ties lasta tago

Ĝuste en la trideka de l' lunmonato tria
Printempo adiaŭas nun al mi, bardo pia.
Amiko mia, kun mi, ne dormu en ĉi nokto,
Ĉar, ĝis tagiĝ', ankoraŭ regantas esto ĝia.

trad. Minosun

渡桑乾

客舍并州已十霜，归心日夜忆咸阳。
无端更渡桑乾水，却望并州是故乡。

Transpasi la riveron Sanggan

Jam dek jarojn mi en Bingzhou loĝas kiel gasto,
sed tagnokte mi sopiras al hejmloko fora.
Kiam translokiĝis mi trans la rivera vasto,
Mi eĉ sentas Bingzhou-n hejmo en la fundo kora.

trad. Vejdo

皎然 (720 - 803)

Jiao Ran (720 - 803)

寻陆鸿渐不遇

移家虽带郭，野径入桑麻。

近种篱边菊，秋来未著花。
扣门无犬吠，欲去问西家。
报道山中去，归时每日斜。

La netrovita amiko Lu Hongjian

Al antaŭurbo hejmon li translokis:
ĝis plantokampo l' pad' sovaĝa iras;
ĉe l' heĝo krizantemoj, kiuj tamen
aŭtune ne disfloras, sin spaliras.
Je pordofrapo, eĉ ne hundo bojas;
mi ĉuas, turniĝinte, al najbaro,
kiu respondas, ke li iris monten,
revenos ofte en krepusk-muaro.

trad. Minosun

金昌绪 (? - ?)

Jin Changxu (? - ?)

春怨

打起黄莺儿，
莫教枝上啼。
啼时惊妾梦，
不得到辽西。

Printempa rankoro

Mi la oriolejn fortimigas,
Ke sur branĉoj ili ĉesu trili,
Ĉar la ĉirpo rompita mian sonĝon:
Mi ne povus al Liaoxi* aliri.

**Liaoxi: indikas la regionon okcidente de la rivero Liao en la nuna provinco Liaoning. Siatempe la loko servis kiel limgardejo, kie garnizonis "mia" edzo.*

trad. Minosun

Plendo en printempo

Mi forpelu oriolejn de arb-branĉo,
kaj ne lasu ilin ĉirpi ekster domo,
nek disrompu mian sonĝon tre kruele,
pri la rendevu' kun mia kara homo.

trad. Ardo

景云(742年前后)

Jing Yun (en la 8a jc.)

画松

画松一似真松树，且待寻思记得无。
曾在天台山上见，石桥南畔第三株。

Pino sur pentraĵo

Ĝi similas vere al la pino en arbaro.
Kie mi ĝin vidis propr-okule en realo?
Ŝajne mi ĝin spektis en la monto Tjantaj, sude
de la pont' ĝi 'stas la tria arb'en rekta staro.
trad. Vejdo

郎士元 (727-780)

Lang Shiyuan (727-780)

柏林寺南望

溪上遥闻精舍钟，泊舟微径度深松。
青山霁后云犹在，画出东南四五峰。

Rigardo suden ĉe la templo Bolin

Mi enboate aŭdis el la templ' sonoril-tintojn,
mi post ankriĝ' ascendis laŭ vojeto al pinaro.
Sur verda mont' volvitas de nuberoj post pluvado,
pentriĝas ŝajne kvar-kvin montopintoj en nubmaro.
trad. Vejdo

李白 (701-762)

Li Bai (701-762)

静夜思

床前明月光，疑是地上霜。
举头望明月，低头思故乡。

Penso en kvieta nokto

Ĉelite ludas lunbrilo.
Jen kiel prujna terkovrilo.
Mi, rigardante l' lunon helan,
Hejmsopiras sen trankvilo.

trad. Vejdo

Nokta Penso

La plenluna bril'
estas prujnsimil'.
Kovras klara lun'
per hejmosopir'.

trad. Vejdo

早发白帝城

朝辞白帝彩云间，千里江陵一日还。
两岸猿声啼不住，轻舟已过万重山。

Ekirante de Baidi-urbo ĉe matenkrepusko

Ekirante de la urb' nub' viola,
mi mil liojn velis nur en tago sola.
En senĉesaj tristaj blekoj de simioj
pasis dekmil montojn jam boato fola.

trad. Vejdo

赠汪伦

李白乘舟将欲行，忽闻岸上踏歌声。
桃花潭水深千尺，不及汪伦送我情。

Dediĉe al Wang Lun

Mi en boato volas tuj ekiri,
min kantovoĉ' elborda faras miri.
La Persik-Lago ja ne pli profundas
ol via sento por adiaŭ diri.

trad. Vejdo

Dediĉe al Wang Lun

mi ŝipe tuj ekiras,
elborda kant' min miras
lagakvo ja profundas
vi pli al mi sopiras.

trad. Vejdo

清平调词

云想衣裳花想容，春风佛槛露华浓。
若非群玉山头见，会向瑶台下逢。

Ario pri belulino

En rob' de roza nub' kaj kun trajto peonia,

Rosite vi pli ĉarmas en brizo eŭforia.
Nur en mirlando povus vi esti renkontita,
Aŭ, sub la lun', vidita en mond' de fe' vizia.

trad. Minosun

客中行

兰陵美酒郁金香，
玉碗盛来琥珀光。
但使主人能醉客，
不知何处是家乡。

Gastado dum vojaĝo

En urb' min logas vina bonodoro
en jada vazo kun sukcenkoloro.
Se ebriigos maestr' min kiel gaston,
mi ne hejmeon kovus en la koro.

trad. Minosun

独坐敬亭山

众鸟高飞尽，
孤云独去闲。
相看两不厌，
只有敬亭山。

Sola sidante sur la monto Jingting

Ĉiuj birdoj malaperis alten,
Sola nuboj ŝvebas for laŭvole.
Nur la monto Jingting kaj mi vidas
Unu la alian nun konsole.

trad. Minosun

春思

燕草如碧丝，秦桑低绿枝。
当君怀归日，是妾断肠时。
春风不相识，何事入罗帏？

Sopiremo en printempo

Ĉe landlimo herboj verde mincas filamente,
smeraldaj la morusbranĉetoj pezas jam ĉe mi.
Kiam vi kalkulas tagojn de reveno, kara,
al vi mi sopiras kun korŝir' en agoni'.
La printempa vent' ne plene konas mian senton,
kial intrudiĝas ĝi min ĝeni por neni'?

trad. Vejdo

蜀道难

噫吁戏，危乎高哉！
蜀道之难，难于上青天！
蚕丛及鱼凫，开国何茫然。
尔来四万八千岁，不与秦塞通人烟。
西当太白有鸟道，可以横绝峨眉巅。
地崩山摧壮士死，然后天梯石栈相钩连。
上有六龙回日之高标，下有冲波逆折之回川。
黄鹤之飞尚不得过，猿猱欲度愁攀援。
青泥何盘盘，百步九折萦岩峦。
扪参历井仰胁息，以手抚膺坐长叹。
问君西游何时还，畏途躔岩不可攀。
但见悲鸟号古木，雄飞雌从绕林间。
又闻子规啼夜月，愁空山，蜀道之难，难于上青天！
使人听此凋朱颜。
连峰去天不盈尺，枯松倒挂倚绝壁。
飞湍瀑流争喧虺，砰崖转石万壑雷。
其险也如此，嗟尔远道之人胡为乎哉！
剑阁峥嵘而崔嵬，一夫当关，万夫莫开。
所守或匪亲，化为狼与豺。
朝避猛虎，夕避长蛇，磨牙吮血，杀人如麻。
锦城虽云乐，不如早还家。
蜀道之难，难于上青天！侧身西望长咨嗟。

Malfacila vojo al Shu-regno

Aĥ, ho ve! kiel kruta vojo en danĝero!
La vojirado al Shu-regn' pli malfacilas
ol surgrimpado al ĉielo!
Ekde l' fondiĝ' de la Shu-regno
jam pasis milmil jaroj en la temp-rivero.
Dum kvardek ok mil jaroj ĝi neniam
interkomunikiĝas trans la Qin-pasej' eĉ per letero.
Ueste en la Taibai-Mont' troviĝas trairej' por birda flugo,
transgrimpi l' Emei-monton tie oni povas kun espero.
Post martiriĝo de bravuloj pro montfal' kaj terkreviĝo
du lokoj interligas per ŝtupar', kornica voj' por pasaĝero.
Supre la montopintoj baras la filtriĝon de l' sunlumo,
malsupre ond-torentas turbulanta la rivero.
La flava gru' ne povas flugi transen,
kaj malfacilas por simioj grimpi kun leĝero.
Meandras montovicoj jen tavolo' post tavolo,
naŭ kurboj en cent paŝoj foj-refojas ĉirkaŭ roka sfero.
Spiron mi retenas tuj sub stelar' en manatingo,

suspiras mi premante bruston en anhelsufero.
 Kiam vi de l' vojaĝo okcidenten jen revenos?
 Ĉi tie krutaj kaj danĝeraj klifoj vin senigas je libero.
 Aŭdiĝas birdaj tristaj krioj inter praaj arboj,
 jen viraj birdoj flugas kaj la inaj sekvas kun vok-kvero.
 Kukoloj kukuadas kontraŭ l' nokta luno
 en trista mont' malplena en malhelo.
 La vojo al Shu-regn' ja malfacilas
 pli ol ascendo al lazura la ĉielo!
 Priskribo tia jam timigas homojn kun mienŝanĝiĝo!
 Vico da montopintoj preskaŭ tuŝas la ĉielon sen ŝancelo,
 inverse pendas la velkintaj pinoj sur klifmuroj.
 Impetaj fluoj, akvofaloj roras sub ondpele,
 frapante klifojn kaj rokegojn kun sonoro tondra.
 Nenio pli danĝera ol ĉi spirokapta sfero,
 ho, kial vi vaganto venas tien ĉi riskeme?
 Pasejo Jiange jen minacas alte kiel citadelo,
 bravulo unu tie defensivas kaj la vojon baras,
 eĉ dekmil homoj ne sukcesas ĝin okupi por konkero.
 Se garnizon' ne estus lojaluloj de l' imperiestro,
 fariĝus ili certe lupoj kaj ŝakaloj de ribelo.
 Matene vi evitu la ferocajn tigrojn,
 vi vin protektu kontraŭ serpentmordo ĉe vespero.
 Okazis multe da sangverŝ' kaj hom-mortigoj.
 Spite al la plezuroj en Shu-regno, hejmeniru kun prefero.
 Aĥ, malfacilas iri sur la vojo al Shu-regno,
 eĉ pli penige ol ascendo al lazura la etero!
 Uesten rigardante al l' altaĵoj animskuaj
 suspire ni sentas nin senkapablaj en despero.

trad. Vejdo

月下独酌

花间一壶酒，独酌无相亲。
 举杯邀明月，对影成三人。
 月既不解饮，影徒随我身。
 暂伴月将影，行乐须及春。
 我歌月徘徊，我舞影零乱。
 醒时相交欢，醉后各分散。
 永结无情游，相期邈云汉。

Drinki sola sub la luno

Sidante inter floroj mi per vinpokalo
 drinkadas sola sen alies kompani'.
 Mi levas vinpokalon por inviti l' lunon

al mi kaj l' ombro por triopa vin-orgi'.
La lun' ne konas la plezuron de drinkado,
Ho, Ombro, vi apudas min ja sen konsci'.
Portempe mi, la ombro kaj la luno kunas,
mi en printempo trinkas, montras ĝojon pli.
mi versas sub la luno en moviĝemado,
mi dancas kun la ombr' vibranta en vari'.
Se sobre, ni gajplene ludu, drinku kune,
ni do disiru satdrinkinte en ebri'.
Jen Lun', ni kaj vi amikiĝu por eterne
kaj renkontiĝos ĉe la rand' de galaksi'.

trad. Vejdo

关山月

明月出天山， 苍茫云海间。
长风几万里， 吹度玉门关。
汉下白登道， 胡窥青海湾。
由来征战地， 不见有人还。
戍客望边色， 思归多苦颜。
高楼当此夜， 叹息未应闲。

La luno super montaro

La luno pendas super la montaro,
ŝvebante en nebula nubomaro.
Trans dekmil lioj vento blovas foren
ĝis la Pasejo Yumen en batalo.
Soldatoj militiras kontraŭ hunoj,
la ter' de Qinghai dronos en amaro.
Delonge tie estas bataalkampo,
soldatoj ne revenas pro fatalo.
Rigardas splene ili al lim-urbo,
hejmvee kun ekstrema spirit-falo.
Sur alta turo ankaŭ en ĉi nokto
aŭdiĝas vesuspiroj sub lunpalo.

trad. Vejdo

怨情

美人卷珠帘， 深坐颦蛾眉。
但见泪痕湿， 不知心恨谁。

Plendemo

Kun levita pordkurten' sidante
belulin' kuntiras brovojn splene.
Larmo malsekigas ŝiajn vangojn,

Kiun ŝi malamas plormiene?

trad. Vejdo

怨情

新人如花虽可宠，故人似玉由来重。
花性飘扬不自持，玉心皎洁终不移。
故人昔新今尚故，还见新人有故时。
请看陈后黄金屋，寂寂珠帘生网丝。

Plendemo

Vi povas ami floran la virinon kun favoro,
dum la edzino bonkonduktas dece kiel jado.
Nesindetene l' novulino flirtas kun frivolo,
l' edzino tenas puran koron sen beleca fado.
Ŝi ankaŭ estis novulino ĉiam kun virt-gloro,
la nova ino iĝos pasintaĵo de malŝato.
Jen vidu: por la reĝa amindumo ĉel' de oro
nun jam araneaĵ-kovritas en povrinda stato.

trad. Vejdo

将进酒

君不见黄河之水天上来，奔流到海不复回。
君不见高堂明镜悲白发，朝如青丝暮成雪。
人生得意须尽欢，莫使金樽空对月。
天生我材必有用，千金散尽还复来。
烹羊宰牛且为乐，会须一饮三百杯。
岑夫子，丹丘生，将进酒，杯莫停。
与君歌一曲，请君为我倾耳听。
钟鼓馔玉不足贵，但愿长醉不复醒。
古来圣贤皆寂寞，惟有饮者留其名。
陈王昔时宴平乐，斗酒十千恣欢谑。
主人何为言少钱，径须沽取对君酌。
五花马，千金裘，呼儿将出换美酒，
与尔同销万古愁。

Preta drinki

Ĉu vi ne vidas la Riveron Flavan torentantan el ĉielo
al l' orienta maro senrevene?
Ĉu vi ne vidas la gepatrojn antaŭ la spegulo, sen tolero
lamentajn pri blankharoj, kiuj nigras ĉematene
kaj jam fariĝas blankaj kiel neĝo ĉe vespero?
Dum vivo pompas oni devas ĝui ĉion plene,
ne lasu vinpokalon sen alkoholaĵo sub luna helo.
Talento nia ĉiam brilas kaj valoras geme,

se l' oro disipiĝas, ĝi revenos kun espero.
Ni buĉu kaj kuiru bovon, ŝafon porfestene,
da alkoholo tri cent tasojn trinku kun prefero.
Amikoj miaj, ĝojmiene!
Pretigu vin ekdrinki! Ne demetu la pokalon sen ŝancelo!
Mi kantu por vi forto-plene!
Aŭskultu al mi atenteme per l' orelo.
La luksa vivo kun frandaĵoj jen forpasu svene,
ni ebriiĝu dorme, ne sobriĝu kun fiero.
De antikvec' sanktuloj sentas sin solece, splene,
nur drinkemulo lasas sian famon de la belo.
Feŭdulo festenigis siajn gastojn tre solene,
orgie ili drinkis kaj diboĉis kun libero.
Ne diru pri monmanko, maestr', aĉetu ja senĝene
alkoholaĵon por ni drinki do ĝis ebri-pelo.
Stalonon kolorriĉan kaj la pelton nun elprene,
forvenu kontraŭ bonkvalita vino en la kelo.
Ni kune ĝuu fole kaj drinkadu senĉagrene!

trad. Vejdo

夜泊牛渚怀古

牛渚西江夜，青天无片云。
登舟望秋月，空忆谢将军。
余亦能高咏，斯人不可闻。
明朝挂帆席，枫叶落纷纷。

Nokta ankriĝo piede de la monto Niuzhu

Nokte sur river' piede de la monto
ne videblas eĉ nuber' en la ĉielo.
Sur boat' rigardas mi l' aŭtunan lunon,
mi ekpensas generalon de fidelo.
La imponajn versojn mi deklami povas,
sed li ne plu povus aŭdi per orelo.
Morgaŭ mi forlasos jen per la boato,
ĉi nur flirtos la folioj de acero.

trad. Vejdo

春思

燕草如碧丝，秦桑低绿枝。
当君怀归日，是妾断肠时。
春风不相识，何事入罗帏？

Penseroj en la printempo

La herboj suplas kiel velur-viloj,

morusfolioj fleksas branĉojn peze.
Kiam vi eksopiras al hejmloko,
mi jam morozas, ve, pro vi freneze.
Printempa vento, vi ja ne min konas,
kial vi ĝenas min nun senkompleze?

trad. Vejdo

渡荆门送别

渡远荆门外，来从楚国游。
山随平野尽，江入大荒流。
月下飞天镜，云生结海楼。
仍怜故乡水，万里送行舟。

Trans pramejo en Jinmen

Trans pramejo mi boatveturis
al la vasta tero de ebena.
Montoj cedas lokon al plat-tero,
la river' torentas tra l' tereno.
Lun' spegule flugas el ĉielo,
nuboj flosas en miraĝa sceno.
Mi ja amas la hejmlokan akvon,
kiu foren portas min kun beno.

trad. Vejdo

黄鹤楼送孟浩然之广陵

故人西辞黄鹤楼，烟花三月下扬州。
孤帆远影碧空尽，唯见长江天际流。

Al Meng Haoran vojaĝonta al Yangzhou

Li ĝisis al mi ĉe la turo Flava Gru' senbrua
por iri al la Yangzhou-urb' en marta flor-prospiro.
Vanuis lia velo ĉe la horizonto blua,
videble nur rivero fluas rande de l' ĉielo.

trad. Vejdo

行路难

金樽清酒斗十千，玉盘珍羞直万钱。
停杯投箸不能食，拔剑四顾心茫然。
欲渡黄河冰塞川，将登太行雪满山。
闲来垂钓碧溪上，忽复乘舟梦日边。
行路难！行路难！多岐路，今安在？
长风破浪会有时，直挂云帆济沧海。

Malfacila vojirado

Fajna vino en pokal' el oro
kostas je dekmil moneroj en valoro,
la frandaĵo en la plad' el jado
ankaŭ multe karas ja je mia ŝato.
Tason kaj haŝiojn mi demetas
kaj pro ĝenateco manĝi mi ne emas.
Elinginte l' spadon jen rankore,
mi rigardas nun ĉirkaŭen malplenkore.
Volas mi transpasi l' Flav-Riveron,
sed glacio sur ĝi baras mian velon.
Ankaŭ l' neĝ' sur Taihang-monto tute
malebligas mian transgrimpadon trude.
Iam fiŝohokis maljunulo,
venis saĝa reĝ', lin trovis talentulo.
Malfacile! malfacila vojirado!
Vojoj jen ireblaj multas tre,
sed do, kie l' ĝusta vojo por mi, ve?
Venos por mi l' ĝusta tempo certe
sur la maro longajn ondojn fendi lerte,
mi veturos per favora velo
kaj direktos min al rando de l' ĉielo!

trad. Vejdo

送友人

青山横北郭，白水绕东城。
此地一为别，孤蓬万里征。
浮云游子意，落日故人情。
挥手自兹去，萧萧班马鸣。

Adiaŭ al amiko

Ekster l' urbo monto sidas en la nordo,
en l' eosto fluas klara la rivero.
Ĉi ni tuj disiĝos unu de l' alia,
vi suriros vojon jen al fora tero.
Kiel flosa nuboj vagas vi fremdloke,
pro vi eĉ la sun' ne sinkas ĉe vespero.
Mi la manon svingas al vi adiaŭe,
ĉeval-henoj sonas triste en aero.

trad. Vejdo

子夜秋歌

长安一片月，万户捣衣声。
秋风吹不尽，总是玉关情。

何日平胡虏，良人罢远征。

L' aŭtuna kanto

L' aŭtuna luno ĵetas palon sur la urbon,
aŭdiĝas vesto-lavbatad' el ĉiuj domoj.
La vento povas ne forblovi tiajn sonojn,
kiuj sopiron vekas al enforaj homoj.
Kiam sukcesos oni ja subigi l' hunojn?
Batalos viroj ne plu kiel la fantomoj.
trad. Vejdo

金陵酒肆留别

风吹柳花满店香，吴姬压酒唤客尝。
金陵子弟来相送，欲行不行各尽觞。
请君试问东流水，别意与之谁短长？

Adiaŭado en drinkejo de Jinling

Kun vin-aromo salikflokaj flirtas en aero,
alportas vinon sudanin' al gastoj por satĝu'.
Amikoj venas por min adiaŭi kun sincero,
ni tostas fojrefoje tas' post tas' en ĝoja bru'.
Kiu pli longas, la disiĝa sento de tenero,
aŭ direktanta sin al l' oriento l' riverflu'?'
trad. Vejdo

长相思

【其一】

长相思，在长安。
络纬秋啼金井阑，
微霜凄凄簟色寒。
孤灯不明思欲绝，
卷帷望月空长叹。
美人如花隔云端。
上有青冥之高天，
下有绿水之波澜。
天长路远魂飞苦，
梦魂不到关山难。
长相思，摧心肝。

【其二】

日色欲尽花含烟，
月明欲素愁不眠。
赵瑟初停凤凰柱，
蜀琴欲奏鸳鸯弦。
此曲有意无人传，

愿随春风寄燕然。
忆君迢迢隔青天。
昔时横波目，
今作流泪泉。
不信妾肠断，
归来看取明镜前。

Longa sopiro

1.

Tagnokte mi sopiras al vi en la urbo Chang-an.
Insektoj ĉirpas aŭtun-nokte ĉe putrand' el oro,
malvarm' invadas la bambuan maton pro prujn-mordo.
sopiro min obsedas en malhela la lamp-solo,
fenestr-kurtenon levas mi kaj veas al ĉielo.
Belino via ja distancas de vi en la foro.
La volbo alta vaste spacas en nebulo svaga,
malsupre sur river' leviĝas huloj de rankoro.
Penigas la vojaĝ' tagnokta inter la du lokoj,
animo malfacile transas montojn eĉ per soro.
Tagnokte mi sopiras al vi kun rompita koro.

2.

Lunlumo fadas, floroj banas sin en nebulfumo,
mi malfacile endormiĝas pro enkora spleno.
Apenaŭ ĉesis mi plukadi kordojn de Zhao-citro,
liuton de Shu-regno mi ekludas en ĉagreno.
Nur bedaŭrinde la ari' ne povas vin atingi,
mi volas, ke ĝi flugu jen al via loĝ-tereno.
Vin tenas mi en kor' sen renkontiĝi vid-al-vide.
Okuloj miaj kun amemo
fariĝas jam la font' de larmo
kun kor' ŝirita de trist-pleno.
Vi vidos mian povran malgrasiĝon je l' reveno.

trad. Vejdo

望庐山瀑布

日照香炉生紫烟，遥看瀑布挂前川。
飞流直下三千尺，疑是银河落九天。

Spektado al akvofalo de la Lu-monto

En la sunlumo la montpint' vaporas helpurple,
vidiĝas fore akvofal' pendanta antaŭ l' mont'.
De l' alto trimil-futa plonĝas fluoj galopkure,
kvazaŭ la Lakta Vojo falas al la homa mond'.

trad. Vejdo

塞下曲

五月天山雪，无花只有寒。
笛中闻折柳，春色未曾看。
晓战随金鼓，宵眠抱玉鞍。
愿将腰下剑，直为斩楼兰。

Kanto de soldatoj en lim-regiono

Ankoraŭ neĝkovritas mont' en majo,
videblas neĝpejzaĝo, sed sen floro.
Muziko pri saliko sonas bele,
eliĝas ne printempa bonodoro.
En tamburado ni matene luktas,
ĉe l' selo ni dormetas en nokt-horo.
Kuraĝe volas ni per glavo akra
ekstermi malamikon el la foro.

trad. Vejdo

宫中行乐词

小小生金屋，盈盈在紫微。
山花插宝髻，石竹绣罗衣。
每出深宫里，常随步辇归。
只愁歌舞散，化作彩云飞。

En palaco

Denaske ŝi vivadas en la domo ora,
ŝi ofte dancas en palac' gracie, bele.
Surkape okulplaĉas ornamaĵo flora,
surkorpe flirtas la brodita rob' leĝere.
Frekventas la palacon ŝi kun ĝojo kora,
kaj servas al l' imperiestro jen tenere.
Nur timas ŝi finiĝon de dancad' furora,
ŝi tiam kvazaŭ nub' vanuos efemere.

trad. Vejdo

梦游天姥吟留别

海客谈瀛洲，烟涛微茫信难求。
越人语天姥，云霞明灭或可睹。
天姥连天向天横，势拔五岳掩赤城。
天台一万八千丈，对此欲倒东南倾。
我欲因之梦吴越，一夜飞度镜湖月。
湖月照我影，送我至剡溪。
谢公宿处今尚在，渌水荡漾清猿啼。

脚著谢公屐，身登青云梯。
 半壁见海日，空中闻天鸡。
 千岩万转路不定，迷花倚石忽已暝。
 熊咆龙吟殷岩泉，栗深林兮惊层巅。
 云青青兮欲雨，水澹澹兮生烟。
 列缺霹雳，丘峦崩摧。
 洞天石扉，訇然中开。
 青冥浩荡不见底，日月照耀金银台。
 霓为衣兮风为马，云之君兮纷纷而来下。
 虎鼓瑟兮鸾回车，仙之人兮列如麻。
 忽魂悸以魄动，恍惊起而长嗟。
 惟觉时之枕席，失向来之烟霞。
 世间行乐亦如此，古来万事东流水。
 别君去兮何时还？且放白鹿青崖间。
 须行即骑访名山。
 安能摧眉折腰事权贵，使我不得开心颜！

Vizito al la monto Tianmu en songô

t.e. Kanto pri adiaŭado

Laŭdire Yingzhou—la feland' en vasta nebulmaro,
 apartigitas de la homa mondo en realo.
 La monto Tianmu tamen staras jen en Yue-tereno,
 jen kaj jen oni povas vidi svage tra nubpleno.
 Ĝi kvazaŭ etendiĝus rekte supren al ĉielo,
 l' imponajn kvin montegojn superaltas kun fiero.
 La monto Tiantai altas dek-ok cent mil klaftojn vere,
 sed ĝi aspektas antaŭ l' monto Tianmu nan-apere.

Mi eĉ veturas en Yue-landon belan en song-lulo,
 kaj nokte jen leĝere flugas mi trans Lag' Spegulo.
 Lagakv' reflektas mian ombron klare
 kaj min forsendas al Shan-rojo per-nubmare.
 Ĉi tie la loĝejo de poet' Xie restas same
 simioj krias, lago ondetadas kristal-ĉarme.
 Kun la grim pantaj ŝuoj surpiede
 per nub-ŝtupar' ascendas mi sencede.
 Ĉe l' monttali' mi vidas sunon el la maro,
 kaj aŭdas ĉiel-kokon kanti per kri-klaro.

La voj' sinuas inter milmil rokoj en pelmelo,
 raviĝas mi de floroj kaj rokegoj ĝis vespero.
 Muĝad' de drak' kaj urs' tremigas la fontakvon vibre,
 kaj forte skuas arbojn kaj montpinton sonor-sible.
 Nubaro griza amasiĝas, pluv' minacas,

vapor' nebula svarmas, la aer' grimacas.
Tuj sekvas tondro, fulm' subite,
jen ŝajne krevus mont' krepite.
La peza ŝtona pordo de l'ĉielo
ovriĝas jen abrupte en aero.
Senfunda la kaverno regas vasta, blua lumo,
palacojn el arĝent' kaj or' briligas sun' kaj luno.
La feoj en ĉielark-vesto rajdas sur la vent-ĉevalo
desupre ili avataras ŝvebe jen en aro.
Liuton ludas tigroj kaj feniksoj ĉarojn tiras,
la feoj puŝiĝante en linioj jen aliras.
Animo mia panikiĝas en terura skuo,
mi vekiginte el la ŝong' suspiras kun ve-bruo.
Mi vidas kapkusenon, maton antaŭ la okuloj,
vanuis tute en la song' nubfumo kaj nebulo.

La ĝojo en la vivo malaperas kiel songa sfero,
aferoj de l' hommond' forfluas kiel la rivero.
Nun adiaŭas mi vin vojaĝantajn al la foro,
kiam revenos vi renkonti min ja en izolo?
Mi paŝtu blankajn cervojn en verd-monto provizore,
viziti l' faman monton ilin rajdos ni laŭvole.
Ĉu povus mi kajoli la nobelojn jen servile,
sen ke mi ĝoje vivas ridmiene kaj trankvile?
trad. Vejdo

玉阶怨

玉阶生白露，夜久侵罗袜。
却下水晶帘，玲珑望秋月。

Plendemo ĉe jada perono

Sterniĝas blankaj rosoj sur perono jada,
humidas ŝtrumpoj miaj en la nokta brum'.
Revenas mi en ĉambron kun kurteno falda,
Mi ĉe l' fenestr' rigardas al l' aŭtuna lun'.
trad. Vejdo

听蜀僧濬弹琴

蜀僧抱绿绮，西下峨眉峰。
为我一挥手，如听万壑松。
客心洗流水，余响入霜钟。
不觉碧山暮，秋云暗几重。

Aŭskultado al liut-ludado de bonzo

La bonzo el la monto Emei en uesto
Brakumas la liuton verdan ĉe la sino.
Eksving' de plektr' en lia man' vibrigas kordojn,
muzikas vento kvazaŭ el envala pino.
Lavitas de akvfluo ŝajne mia koro,
tintil' aŭtuna eĥas jen ĝis malproksimo.
La verda monto nebuliĝas senkonscie,
malhelas ankaŭ nuboj en grizblanka glimo.

Trad. Vejdo

对酒

葡萄酒，金叵罗，吴姬十五细马驮。
青黛画眉红锦靴，道字不正娇唱歌。
玳瑁筵中怀里醉，芙蓉帐底奈君何！

Lindulino

Mi ĝue drinkas vinon el pokal' el oro,
kaj venas lindulino per la ĉevaletto.
Kun blu-pentritaj brovoj kaj broditaj botoj,
ŝi kantas per raspaĉa voĉo kun koketo.
Ŝi en festen' ebrie eĉ sin ĵetas al mi,
kiel mi traktas ŝin en lito sen diskreto?

trad. Vejdo

长干行

长干行其一

妾发初覆额，折花门前剧。
郎骑竹马来，绕床弄青梅。
同居长千里，两小无嫌猜，
十四为君妇，羞颜未尝开。
低头向暗壁，千唤不一回。
十五始展眉，愿同尘与灰。
常存抱柱信，岂上望夫台。
十六君远行，瞿塘滟滪堆。
五月不可触，猿声天上哀。
门前迟行迹，一一生绿苔。
苔深不能扫，落叶秋风早。
八月蝴蝶来，双飞西园草。
感此伤妾心，坐愁红颜老。
早晚下三巴，预将书报家。
相迎不道远，直至长风沙。

长干行其二

忆妾深闺里，烟尘不曾识。
嫁与长干人，沙头候风色。
五月南风兴，思君下巴陵。
八月西风起，想君发扬子。
去来悲如何，见少离别多。
湘潭几日到，妾梦越风波。
昨夜狂风度，吹折江头树。
淼淼暗无边，行人在何处。
好乘浮云骢，佳期兰渚东。
鸳鸯绿蒲上，翡翠锦屏中。
自怜十五余，颜色桃花红。
那作商人妇，愁水复愁风。

Kanzonoj de Changgan

1.

Ĵus kiam mian frunton plene kovris hararo,
ekludis mi ĉe pordo per plukita branĉaro.
Vi venis ludi kun mi per ĉevalo bambua,
ni ĵetis prunojn ĉirkaŭ puto kun krio brua.
Ni ambaŭ loĝis kune en la Changgan-tereno,
kiel infanoj sen dubemo kaj sen sinĝeno.
Mi dekkvar-jara edziniĝis al vi volonte,
sed mi neniam montris ridmienon kunhonte.
Kun kap' klinita mi rigardis al murangulo,
kaj je mil voko ne min turnis jen de la muro.
Mi ekis ja vigliĝis je la aĝ' dekkvin-jara,
kaj volis sperti tagojn mi en vivo banala.
Mi ĉiam tenis min kroĉiĝe al vi fidela,
neniam mi ekpensis pri estonto sortpela.
Kiam mi dekses-jaris, vi vojaĝis al foro,
tra l' Gorĝo Qutang ĝis celloko Yanyu en solo.
En maj' ŝvelinta akvo al vi la vojonoj baris,
simiaj krioj ambaŭborde sore spiralis.
Antaŭ la porda via piedspuro hezita
kovriĝis plene jam per verda musko tre glita.
Balai mi ne povis ĝin pro ĝia densdenso,
folioj falis en l' aŭtuna vent' en intenso.
Aŭgusto bonvenigis papilian alvenon,
alflugis ili pare en uestan ĝardenon.
Je la vidaĵ' mi tristis jen kun koro ŝirita,
vizaĝo mia palas en oldiĝo rapida.
Kiam vi volis rehejmiĝi ja kun deziro,
mesaĝon sendu al mi antaŭ via foriro.

Por bonvenigi vin mi volos iri tutsola
la longan vojon spite al sufero dolora.

2.

Kiam profunde mi najlitis en buduaro,
hommondon mi ne konis tute ja en detalo.
Min Changgan-ano edzinigis vole sen plendo,
sed mi lin sopiradas nun ĉe riverbord' en atendo.
En majo forte blovas suda vent' en intenso,
mi pensis, ke tra Baling iras vi en la menso.
Aŭguste blovis l' okcidenta vent' violente,
imagis mi, ke vi deiras jam evidente.
Foriron kaj reiron viajn mi ja zorgas en koro,
ni rare kunas, sed vi restas ofte en foro.
Kiam revenos al la hejm' vi tute sekure?
mi sonĝis, ke ni fluge transas ondojn veture.
Lastnokte furioze blovis vent' el ĉielo,
derompis arbgigantojn ĝi ĉe l' bord' de rivero.
Mi gapis al la torentanta flu' en stuporo,
kie, karulo mia, trovas vin en izolo?
Mi volus rajdi sur la nub-stalon' en aero
por vin renkonti ĉe eosta strand' kun prefero.
Ambirdoj naĝas sur la lago koro kun koro,
broditas alcionoj sur satena silk-tolo.
Mi estas pli-ol-dekkvin-jarulin' kompatinda,
kun vangoj persikfloraj kaj aspekto tre linda.
Kiel edzin' de komercist' migranta libere,
mi vivas vivon de disiĝoj multaj mizere.

trad. Vejdo

李端 (743 782)

Li Duan (743 782)

听箏

鸣箏金粟柱，素手玉房前。
欲得周郎顾，时时误拂弦。

Aŭskulto al citro

Antaŭ luksa ĉambro la liuton
tinte sonan l' jada man' kondukas.
Por allogi l' koron de amato
ĉarma, ŝi de temp' al temp' misplukas.

trad. Minosun

Aŭskultado al citro-ludo

Mi aŭskultas al muzik' de citroludo,
ŝi per fingroj ludas antaŭ l' domo jada.
Se ŝi volas vekti intereson ĉe li,
devus pluki kordojn ŝi per miso ada.

trad. Vejdo

李华 (715-766)

Li Hua (715 - 766)

春行即兴

宜阳城下草萋萋，涧水东流复向西。
芳树无人花自落，春山一路鸟空鸣。

Improviĵo pri printempa ekskurso

Ekster la urbo Yiyang herboj sternas sin abunde.
De l' oriento al la okcidento fluas roĵo.
Aromaj floroj lasas al si fali por neniuj,
Kaj vane trilas birdoj ĉe printempa montovojo.

trad. Minosun

Noto pri printempa ekskurso

en ekster urbo Yiyang herboj verdas en prospero,
eosten fluas kaj sin turnas okcidenten roĵo.
petaloj de aromaj floroj ŝvebas jen sen celo,
flugantaj birdoj krias vane trans monteta vojo.

trad. Ardo

李隆基 (685-762)

Li Longji (685-762)

经邹鲁祭孔子而叹之

夫子何为者，栖栖一代中。
地犹鄆氏邑，宅即鲁王宫。
叹凤嗟身否，伤麟怨道穷。
今看两楹奠，当与梦时同。

Kultado al Konfuceo

Konfuceo karmemora nia, ho ve,
vi penegis en generacio via.
Kvankam la malnova loko restas sama,

tamen staras la palac' de moŝto lia
Lu-regnestra en impona la aspekto,
vivon vivis vi en stato agonia.
Nun vi sidas jen idole en la templo,
oni kultas vin per dec' ceremonia.

trad. Vejdo

李频(818 – 876)

Li Pin (818 - 876)

渡汉江

岭外音书断，经冬复历春。
近乡情更怯，不敢问来人。

Transpasi la riveron Han

Trans montoj hejma vivosigno senas,
forpasas vintro, kaj printempo venas.
Sentmikse mi proksimas al vilaĝo,
dandi pri ĝi mankas la kuraĝo.

trad. Minosun

李颀 (? - ?)

Li Qi (? - ?)

古从军行

白日登山望烽火，黄昏饮马傍交河。
行人刁斗风沙暗，公主琵琶幽怨多。
野云万里无城郭，雨雪纷纷连大漠。
胡雁哀鸣夜夜飞，胡儿眼泪双双落。
闻道玉门犹被遮，应将性命逐轻车。
年年战骨埋荒外，空见蒲桃入汉家。

Gardado ĉe landlimo

Tage sur mont' gardistoj rigardas signalfajron,
vespere la ĉevalojn trinkigas ĉe l' rivero.
En sabloŝtormo klakas frapilo en mallumo,
kiel la ĝema tono de bivo en tenebro.

Vastega nebulnubo vualas urbajn murojn,
pluvo kaj neĝo kovras dezerton en tumulto.
Sovaĝanseroj nokte traflugas vekriante,
ĉiu el la tataroj lamentas kun larm-multo.

Blokiĝas vojo, kiu direktas sin al hejmo,
soldatoj generalon nur sekvas en penego.
Kadavroj ĉiujare dismetas sin sur kampo,
sed kio alvenigas tributon nur por regno.

trad. Minosun

古意

男儿事长征，少小幽燕客。
赌胜马蹄下，由来轻七尺。
杀人莫敢前，须如猬毛磔。
黄云陇底白云飞，未得报恩不得归。
辽东小妇年十五，惯弹琵琶解歌舞。
今为羌笛出塞声，使我三军泪如雨。

Versoj laŭ antikva stilo

De juneco viro migras norde,
havas la aspiron pri batalo.
Li ne ŝparas la staturon altan
por landlimon gardi sur ĉevalo.
Pro impona barbo lia, kun li
ne aŭdacas lukti la rivalo.

Sur montaro flava peze flosas blankaj nuboj,
rehejmiĝ' ne eblas por soldatoj sen merito.
Estas virineto dekkvin-jara el hejmlando,
kiu lertas je bivlud' kaj danc' en eskvizito.
Nun ŝi ludas flut-arion "Elir' el Pasejo",
ke ploregas tri armeoj fronte al milito.

trad. Minosun

李峤 (? — ?)

Li Qiao (? — ?)

风

解落三秋叶，
能开二月花。
过江千尺浪，
入竹万竿斜。

Vento

Vi estas potenca, foliojn forŝiri
aŭtunajn, burĝonojn printempajn inspiri

al pompo, — je via trapaso, — ondigi
riverojn, klinon de bambuoj akiri.

trad. Minosun

Vento

Aŭtun-foliojn ĝi deŝiras kun susuro,
printempajn florojn urĝas flori en konkuro.
Sur la river' ĝi levas ondojn preterpase,
Oblikve fleksas ĝi bambuojn per torturo.

trad. Vejdo

Vento

Vi deŝiras la foliojn de aŭtuno,
kaj florigas plantojn de fruprimumo.
Sur rivero vi eĉ rulas altajn ondojn,
la bambuoj svingas sin en via pelo.

trad. Ardo

李商隱 (813—858)

Li Shangyin (813—858)

无题

相见时难别亦难，东风无力百花残。
春蚕到死丝方尽，蜡炬成灰泪始干。
晓镜但愁云鬓改，夜吟应觉月光寒。
蓬山此去无多路，青鸟殷勤为探看。

Sentitole

Ja malfacilas rekuniĝi kaj disiĝi same,
la orienta vent' malfortas, floroj velkas plene.
Silkraŭp' printema ĉesas ŝpini silkon ĉe la morto,
kandel' ne stopas larmi ĝis cindriĝo kunĉagrene.
Matene la spegulo timas vidi harblankiĝon,
en luna lumo frost' invadas maldormanton ĝene.
La monto baras vojiradon neproksiman de li,
al Blua birdo mi konfidas la viziton splene.

trad. Vejdo

落花

高阁客竟去，小园花乱飞。
参差连曲陌，迢递送斜晖。
肠断未忍扫，眼穿仍欲归。
芳心向春尽，所得是沾衣。

Falantaj floroj

Gastoj jam foriris de la alta turo,
en la korto floroj flirtas en pelmelo.
Svagas en vidkampo la meandra pado,
strabe brilas subiranta la sunhelo.
Florojn ne balaas mi jen kun korŝiro,
la printempo haste svenis en leĝero,
Floroj plendas pri tro frua printempfino,
vest' humidas, ve, de larm' pro flor-mizero.

trad. Vejdo

凉思

客去波平槛，蝉休露满枝。
永怀当此节，倚立自移时。
北斗兼春远，南陵寓使迟。
天涯占梦数，疑误有新知。

Penseo en frida aŭtuno

Kiam vi foriris, la printempa akvo
ŝvelis ĝis la balustrado,
jam cikadoj ĉesis trili sur la branĉo
ros-humidaj en parado.
Mi ĉi tie staras en sezon' aŭtuna
kun la penso de sopiro,
apogante min al balustrad' senmove
jen sen emo al foriro.
Norda stelo flagre pendas malproksime
kiel tiu primavero,
kuriero el la sud' ankoraŭ tardas
ja alveni kun letero.
Mi kelkfoje sortdivenis kaj prisonĝis
la kialon de malfru',
mi konjektas, ke vi konas nov-amikon,
jam memoras min ne plu.

trad. Vejdo

春雨

帐卧新春白袷衣，白门寥落意多违。
红楼隔雨相望冷，珠箔飘灯独自归。
远路应悲春晼晚，残霄犹得梦依稀。
玉珰缄札何由达，万里云罗一雁飞。

Printempa pluvo

Mi kuŝas sen demeti blankan robon nov-printempe,
ne vizitatas rendevua lok' je mia ĝeno.

Rigardas mi tra pluv' la buduaron en malvarmo,
sub pluvbatado mi revenas hejmen kun ĉagreno.

Vi eble sentas fridon en printempa nokt' en foro,
verŝajne renkontiĝus ni en sonĝo de nubpleno.

Mi jam pretigis orelingojn, amleteron por vi,
per la sovaĝansero ilin sendos mi kun beno.

trad. Vejdo

乐游原

向晚意不适，驱车登古原。

夕阳无限好，只是近黄昏。

Leyou-altano

Min ĉagreno mordas jen kruele,
mi ascendas la altanon oldan.

Subiranta suno ĉarmas bele,
sed vesperas bedaŭrinde vere.

trad. Vejdo

蝉

本以高难饱，徒劳恨费声。

五更疏欲断，一树碧无情。

薄宦梗犹泛，故园芜已平。

烦君最相警，我亦举家清。

Cikado

Vi sur alta branĉo stare malsatas,
vane ripetade ĉirpas rankore.

Noktprofunde vi singultas kelkfoje,
ĉiam l' arb' sin tenas kalme senkore.

Kiel malalta-rangul' mi migradas,
herbkovritas la hejmloko enfore.

Min avertu zorgi mian konduton,
mi imitas vin en alt' senkaĵole.

trad. Vejdo

风雨

凄凉宝剑篇，羁泊欲穷年。

黄叶仍风雨，青楼自管弦。

新知遭薄俗，旧好隔良缘。

心断新丰酒，消愁斗几千？

Ventpluvo

Mi verkas tristajn versojn, sed kun ambicio,
mi forvagadas jarojn ĉie nenifara.
Folioj flavaj fale flirtas en ventpluvo,
el luksa hal' elŝvebas la muziko bala.
Amikoj novaj ja klaĉatas triviale,
dum la malnovaj foras pro destin' reala.
Mi volas dampi la ĉagrenon per la vino,
eĉ devus mi aĉeti ĝin je prezo kara.

trad. Vejdo

夜雨寄北

君问归期未有期，巴山夜雨涨秋池。
何当共剪西窗烛，却话巴山夜雨时。

En nokta pluvo

Vi ĉuas, kiam mi revenos, mi ne certas,
en nokta pluvo ŝvelas l' aŭtun-akvo en baseno.
Ĉe renkontiĝo ni lampmeĉon kune tondos,
mi diros al vi amsopiron kun ĉagreno.

trad. Vejdo

晚晴

深居俯夹城，春去夏犹清。天意怜幽草，人间重晚晴。
并添高阁迥，微注小窗明。越鸟巢干后，归飞体更轻。

Vespera sereno

Mi ermite vivas flanke de urbeto,
printempfine freŝas spiro de l' somero.
La Ĉiel' kompatas herbojn en kvieto,
al la homa mondo plaĉas ĉi vespero.
Sur la alta tur' pli klaras vid' en belo,
svagas la subira sun' ĉe l' fenestreto.
Nestoj varmas jam en seka la aero,
birdoj revenflugas ŝvebe kun impeto.

trad. Vejdo

锦瑟

锦瑟无端五十弦，一弦一柱思华年。
庄生晓梦迷蝴蝶，望帝春心托杜鹃。
沧海月明珠有泪，蓝田日暖玉生烟。
此情可待成追忆，只是当时已惘然。

Farbita citro

La farbita citro havas kvin dek kordojn, kial?
Ĉiu kordo memorigas min pri la pase'.
Zhuang Zi songĝis pri l' de si amata papilio,
La regnestr' konfidis koron al kukol' kun ve'.
La lunbild' en maro glimas kiel larmoperloj,
la fumanta jad' naskiĝas en Lantian-are'.
Tiuj belaj scenoj restas nur en rememoro,
bedaŭrinde tiam mi kondukis ilin al pere'.
trad. Vejdo

北青萝

残阳西入崦，茅屋访孤僧。落叶人何在，寒云路几层。
独敲初夜磬，闲倚一枝藤。世界微尘里，吾宁爱与憎。

Lianoj

Malantaŭ monto sinkis jam la suno,
mi serĉas bonzon en kaban', sed vane.
Videblas falfolioj, sed ne homo,
en frosto mi jam grimpis montojn lame.
Vespere frapas sonorilon sola
li kun inert' starante ĉe-liane.
En polvo ĉio ŝvebas, mi do pensas,
kial konduki ame aŭ malame?
trad. Vejdo

小园独酌

柳带谁能结，花房未肯开。空馀双蝶舞，竟绝一人来。
半展龙须席，轻斟玛瑙杯。年年春不定，虚信岁前梅。

Drinki sola en korto

Kiu povas ligi salikvergojn kune?
La burĝonoj emas ne paradi bele.
Nur du papilioj flirtas en etero,
ne persono venas al mi nun tenere.
Mi duone jen malfaldas la pajlmaton,
kaj agat-pokalon levas mi leĝere.
Printempfloroj pompas en necerta tempo,
disflorad' umea min mistifas vere.
trad. Vejdo

无题二首

【无题其一】
昨夜星辰昨夜风，画楼西畔桂堂东。

身无彩凤双飞翼，心有灵犀一点通。
隔座送钩春酒暖，分曹射覆蜡灯红。
嗟余听鼓应官去，走马兰台类转蓬。

【无题其二】

闻道阊门萼绿华，昔年相望抵天涯。
岂知一夜秦楼客，偷看吴王苑内花。

Sentitole

1.

Lastnokte vento forte blovas sub lastnoktaj steloj,
de hala okcidento al eosto de la turo.
Malhavas kolorajn flugilojn mi por flugi tien,
ni tamen havas empatation kaŝan kun plezuro.
Ni ĝuas divenludon dum vintrinko por varmigo,
ring-ĵeton ludas en ruĝbrila kandelluma lulo.
Ve, mi je l' tamburado devas iri por ofico,
sur la ĉevalo mia koro batas kun susuro.

2.

Mi ofte aŭdas pri fein' kun vest' smeralda,
ŝi ŝajnas al mi netuŝebla en la foro.
ĉeestis mi ĉe la festen' kun kor' ekzalta,
mi gvatis florojn en palaco per esploro.
trad. Vejdo

自喜

自喜蜗牛舍，兼容燕子巢。绿筠遗粉箨，红药绽香苞。
虎过遥知阱，鱼来且佐庖。慢行成酩酊，邻壁有松醪。

Memkontentiĝo

Mi kontentas pri helik-kabano mia,
kun hirunda pajla nesto ĉe alero.
Kreskas bambuŝosoj kun blanketa ŝelo,
kaj aromas burĝonaro peonia.
Tigr' evitas la kaptilon fore de mi,
fiŝoj jen alnaĝas kiel ambrozio.
Mi promenas lante kvazaŭ en ebrio,
la najbaran vinon ĝojas ni ĝuemi.
trad. Vejdo

春宵自遣

地胜遗尘事，身闲念岁华。
晚晴风过竹，深夜月当花。

石乱知泉咽，苔荒任径斜。
陶然恃琴酒，忘却在山家。

Distriĝo en printempa nokto

Bela loko forgesigas bruon mondon,
paca vivo min pensigas pri temp-sveno.
Vento blovas tra bambuojn ĉe vespero,
nokte l' luno klaras super flor-tereno.
Fonto fluas glugle inter ŝtonoj disaj,
pad' dekliva jen kovriĝas per muskpleno.
Al vintrink' kaj citroludo mi min donas,
jen ĝuante loĝi monte sen ĉagreno.

trad. Vejdo

寄令狐郎中

嵩云秦树久离居，双鲤迢迢一纸书。
休问梁园旧宾客，茂陵秋雨病相如。

Al Linghu Tao

Vi estas nub' sur monto, dum mi arb' sur ebenejo,
eĉ trans mil lioj vi konsolas min ja per letero.
Ne ĉuu, kiel mi vivadas en ĝardeno reĝa,
mi malsanemas feble en aŭtuna pluv-vetero.

trad. Vejdo

为有

为有云屏无限娇，凤城寒尽怕春宵。
无端嫁得金龟婿，辜负香衾事早朝。

Plendema edzino

Malantaŭ glima ekraneg' koketas belulino,
post la finiĝ' de frosto kurtan nokton ŝi tre timas.
Ŝi senkonscie edziniĝis jen al kortegano,
tre frue ellitiĝi por ofic' li jam kutimas.

trad. Vejdo

北楼

春物岂相干，人生只强欢。花犹曾敛夕，酒竟不知寒。
异域东风湿，中华上象宽。此楼堪北望，轻命倚危栏。

Sur norda turo

Printempaĵoj ne rilatas al mi vere,
mi nur trudas ridon dum la viv' tolere.
Hibiskfloroj ne paradas dum la nokto,

vintrinkad' senigas min je frost' mistere.

Mi humidan eost-venton sentas tie,
vastas la ĉiel' kaj tero dimensie.
Turo ĉi nur servas por rigardi norden,
mi min klinas al la balustrad' defie.

trad. Vejdo

幽居冬暮

羽翼摧残日，郊园寂寞时。
晓鸡惊树雪，寒鹭守冰池。
急景忽云暮，颓年浸已衰。
如何匡国分，不与夙心期。

Vivi solece ĉe vintrofino

Jen venas temp' distaŭzi pluman flugilparon
kaj triste splenas ĉirkaŭurba la ĝardeno.
Matena kok' timkrias pro surarba neĝo,
anasoj gardas lagon kun la glacipleno.
Hasteme tago cedas al vespera lumo,
kaduka korpo mia velkas kun san-sveno.
Kiel mi servu al la regno energie?
Ve, mi senilas jam dronante en ĉagreno.

trad. Vejdo

正月崇让宅

密锁重关掩绿苔，廊深阁迥此徘徊。
先知风起月含晕，尚自露寒花未开。
蝙拂帘旌终展转，鼠翻窗网小惊猜。
背灯独共馀香语，不觉犹歌起夜来。

Dum la unua lunmonato

Ŝlositas oblaj pordoj antaŭ kort' kun verda musko,
mi paŝas sola ir-reire sur la klostr' kvieta.
La luno kun halo' heroldas la morgaŭan venton,
sur florburĝonoj fridas nokta roso la obseda.
Vesperto fluge tanĝas rulkurtenon la fenestran,
je mia surpriziĝ' kuraĉas mus' per lud' pieda.
Sidante kontraŭ lamp' mi kvaz' babilas kun l' edzino,
mi senkonscie zumas kanton jen per voĉ' falseta.

Trad. Vejdo

李涉 (? - ?)

Li She (? - ?)

登山

终日昏昏醉梦间，
忽闻春尽强登山。
因过竹院逢僧话，
又得浮生半日闲。

Montogrimpado

Dronante kvazaŭ en ebrío songa
De tag' al tago konfuziĝas mi.
Printemp' min ekinformas pri l' finiĝo,
Altrudas min al montogrimpo ĝi.
Ĉe bambutemplo bonzon mi renkontas;
Parolas ni pri budh-alegorio,
El kio mi ricevis duontagon
Da viv' flosanta en mensa orgio.
trad. Minosun

李绅 (772-846)

Li Shen (772-846)

悯农二首

春种一粒粟，秋收万颗子。
四海无闲田，农夫犹饿死。

锄禾日当午，汗滴禾下土。
谁知盘中餐，粒粒皆辛苦？

Kompato al kampuloj

1.

Unu grajn' semitas en la primavero,
oni en aŭtun' rikoltas grajnojn mil.
Ja ne mankas kampoj sur la tuta tero,
sed kampuloj malsatmortas sen akir'.

2.

En kamp-sarkad' sub arda la sunhelo
ŝvitgutoj de kampuloj teren falas.
Ho, sciu, ke la manĝon en telero

kampuloj per grandega pen' preparas.

trad. Vejdo

李益 (750 - 830)

Li Yi (750 - 830)

江南曲

嫁得瞿塘贾，朝朝误妾期。

早知潮有信，嫁与弄潮儿。

Melodio sude de Janzi-rivero

Pri edziniĝo al la komercisto, Qutang-ano,
Ĉiam perdanta reventempon, mi bedaŭras vere.

Se antaŭscius mi pri akurato de la tajdo,

Al surfemulo mi do edzinigus min prefere.

trad. Minosun

夜上受降城闻笛

回乐峰前沙似雪，受降城外月如霜。

不知何处吹芦管，一夜征人尽望乡。

Sur la murturo de la kapitulaciga urbo nokte mi aŭdas flutadon

Antaŭ l' monto Huile la dezerto ŝajnas neĝo,

Prujn' — lunlumo ekster la kapitulacigejo.

De kie, neniŭ scias, ekludiĝas fluto, —

Ĉiuj limgardistoj nostalgias dum nokttuto.

trad. Minosun

喜见外弟又言别

十年离乱后，长大一相逢。

问姓惊初见，称名忆旧容。

别来沧海事，语罢暮天钟。

明日巴陵道，秋山又几重。

Ĝojo renkonti la kuzon kaj bedaŭro lin tuj adiaŭi

Post la disiĝ' dekjara pro milito,

Surprizas min junulo per vizito.

En miro ekkoninte noman vian,

Mi rememoras trajton la naivan.

Vespere la babilon rompas son' de

La sonoril', pri kio pasis monde.

Kaj dum al Baling morĝaŭ vi foriros,

Kiom l' aŭtunaj montoj vesuspiros?

trad. Minosun

刘长卿（约 726 - 约 786）

Liu Changqing (ĉ.726 – ĉ.786)

逢雪宿芙蓉山主人

日暮苍山远，天寒白屋贫。
柴门闻犬吠，风雪夜归人。

En nokta neĝoŝtormo

La montoj foraj nebuliĝas ĉe vespero,
Povriĝas en la frosto l' neĝkovrita domo.
Ekbojas hundo ĉe la pordo branĉplektita,
En nokta ŝtorm' videblas revenanta homo.
trad. Minosun

送上人

孤云将野鹤，岂向人间住。
莫买沃洲山，时人已知处。

Adiaŭ al la altestimata bonzo

Simila kiel sola nuboj kaj sovaĝa gruo,
Kiel vi povus vin loĝigi en la homan mondon?
Ne iru al Wozhou'o por aĉeti ermit-monton,
Nuntempe oni jam interesiĝis pri l' situo.
trad. Minosun

Al l' altestimata bonzo

Vi ŝajnas nuboj aŭ sovaĝa gruo,
ne plu vi vivu en ĥaosa mondo,
nek loĝu ankaŭ en la Wozhou-monto,
frekventas oni tien kun voĉ-bruoj.
trad. Ardo

送灵澈上人

苍苍竹林寺，杳杳钟声晚。
荷笠带斜阳，青山独归远。

Adiaŭ al la altestimata bonzo Ling Che

El la templo Bambuaro en malhela verdo
Sonorilo krake tintas ĉe vespera hor'.
Sola, dorsportante pluvĉapelon en krepusko,
Vi reiras al la glaŭkaj montoj en la for'.
trad. Minosun

听弹琴

泠泠七弦上，静听松风寒。
古调虽自爱，今人多不弹。

Aŭskultado al citro-ludado

Plektrante sur sep tintaj kordoj de la citro,
kvieste mi aŭskultas venton el pinaro.
Kvankam mi ŝatas la antikvajn melodiojn,
la nuntempuloj ilin ludas ja en raro.
trad. Vejdo

Ludado sur citro

Je aŭskulto de sepkorda citr' melankolia
sentas mi l' pinaran venton triste melodia.
La antikva ariet' aparte plaĉas al mi,
sed ne multaj nune ludas ĝin kun em' pasia.
trad. Minosun

刘方平 (? — ?)

Liu Fangping (? - ?)

春怨

纱窗日落渐黄昏，金屋无人见泪痕。
寂寞空庭春欲晚，梨花满地不开门。

Plendemo en printempo

La gazfenestroj dronas en krepusk' ĉe sunsubiro,
Neniu vidas min larmadi en la buduaro.
Finiĝos tuj l' printempo en la korto dezerdeca:
Post la fermita pordo flirte falas pirfloraro.
trad. Minosun

刘慎虚 (? - ?)

Liu Shenxu (? - ?)

阙题

道由白云尽，春与青溪长。时有落花至，远闻流水香。
闲门向山路，深柳读书堂。幽映每白日，清辉照衣裳。

Sen titolo

Perdiĝas inter blankajn nubojn vojo,

printempo longas kiel verda roĵo.
fojfoje floroj falas, kaj de foro
alŝvebas el akvfluo bonodoro.
Kvieta pord' vizaĝas al aleo;
en salikaro sidas ĉi studejo.
Dum la sunlum' tra branĉoj glimas,
sur mian veston sin helbril' pavimas.

trad. Minosun

Sentitole

Montvoj' finiĝas en profundo de la nuboj,
fluas printempa spir' kun klara la rivero.
Okaze fala flor' aldrivas sur la akvo,
aromo ĝia jen alŝvebas kun leĝero.
Rigardas la vergpord' zigzagan la montpadon.
en salikarba ombr' kaŝiĝas lego-ĉelo.
Kiam sunlumo penetriĝas la arbombron,
nun mi min banas tute per radia helo.

trad. Vejdo

刘禹锡 (772—842)

Liu Yuxi (772—842)

浪淘沙

九曲黄河万里沙，浪淘风簸自天涯。
如今直上银河去，同到牵牛织女家。

Ondo lavas sablon

Sinue fluas Flava la Rivero*,
ondanta tange foren sub ventpelo,
kvazaŭ kaskadus ĝi al ĉielvolbo,
kie l' feino vivas de fabelo.

**la dua plej granda rivero en Ĉinio.*

trad. Vejdo

望洞庭

湖光秋月两相和，潭面无风镜未磨。
遥望洞庭山水翠，白银盘里一青螺。

Rigarde al la lago Dongting

L' aŭtuna luno harmonias kun la lago, kies
Surfac' similas spekulon opakan en kvieto.
La monto verda ĉe la akvo ŝajnas, se vidate

De fore, konko spiralforma sur arĝenta pleto.

trad. Minosun

玄都观桃花

紫陌红尘拂面来，
无人不道看花回。
玄都观里桃千树，
尽是刘郎去后栽。

Spekto al persikfloroj en la Taŭista templo Xuanduguan

De stratoj terpoveroj leviĝas al vizaĝo,
Revenas gaje ĉiuj homoj el florpejzaĝo.
Mil persikarboj en la taŭista templo,
Post mia degradiĝo, plantiĝis por vid-plaĉo.

trad. Minosun

再游玄都观

百亩庭中半是苔，
桃花净尽菜花开。
种桃道士归何处，
前度刘郎今又来。

Revizito al la taŭista templo Xuanduguan

La korton de cent muoj en la templo
Musko duonekovras
La floroj kolzaj floroj, anstataŭ la persikaj
disflore pompe sin ovras.
Sed kien la taŭistoj, kiuj plantis
la persikarbojn, iris?
Denove mi, vipata de la sorto,
Ĉi-tien min altiras.

trad. Minosun

和乐天春词

新妆宜面下朱楼，深锁春光一院愁。
行到中庭数花朵，蜻蜓飞上玉搔头。

Responde al la poemo de Bai Juyi

Ŝminkinte sin, descendas ŝi de sur l' etaĝo ruĝa, -
Ŝlosiĝas en ĉi trista korto la printempa belo.
Kun spleno l' belulino tie nombras freŝajn florojn,
Sur ŝian jadan haropinglon flugas jen libelo.

trad. Minosun

柳中庸 (? -约775)

Liu Zhongyong (?— . 775)

征人怨

岁岁金河复玉关，朝朝马策与刀环。
三春白雪归青冢，万里黄河绕黑山。

Plendemo de soldatoj

Ni militiras tie kaj alie jar' post jaro,
nin akompanas evalvip' kaj sabro iutage.
En marto neĝo kovras la tumulojn en kamparo,
rivero nigran monton irkaŭfluas jen zigzage.
trad. Vejdo

柳宗元 (773—819)

Liu Zongyuan (773—819)

溪居

久为簪组累，幸此南夷谪。闲依农圃邻，偶似山林客。
晓耕翻露草，夜榜响溪石。来往不逢人，长歌楚天碧。

Loĝado ĉe roĵo

Mi longe implikiĝis en ofic-laboro,
kaj nun mi degradiĝas suden en ekzilo.
Najbaras mia dom' al kampa legombedo,
okaze ŝajnas mi ermito en trankvilo.
Matene mi trudherbojn falĉas kun roseroj,
vespere preter rokojn remas kun facililo.
Mi ir-reiras sen renkonti vulgarulojn,
mi kantas ĝoje al ĉielo kun blu-brilo.
trad. Vejdo

Ĉeroja situo

De longe lacas mi de ofic-vesto kaj, degrade,
Mi ĝoje iras al sudlando necivilizita.
Ĉe bedoj foje mi najbaras en libera tempo,
Kaj foje en montaro vagas kiel hom' ermita.
Plugiĝas en mateno rosa l' herbkovrita kampo,
Vespere en boato al mi sonas fluo glita.
Ĉi tie mi renkontas ja neniujn vulgarulojn,
Kaj kantas kun la kapo al ĉielo lazurita.
trad. Minosun

江雪

千山鸟飞绝，万径人踪灭。
孤舟蓑笠翁，独钓寒江雪。

Neĝo sur rivero

En mil montoj mankas birda flugo,
sur mil vojoj senas homa spuro.
Sola jen oldul' kun pajlmantelo
fiŝohokas en glaci-naturo.
trad. Vejdo

渔翁

渔翁夜傍西岩宿，晓汲清湘燃楚竹。
烟销日出不见人，欸乃一声山水绿。
回看天际下中流，岩上无心云相逐。

Fiŝisto

Vespere li tranoktas sub rokego ĉe rivero,
li ĉerpas akvon kaj kuiras manĝon jen matene.
La sun' elvenas, fum' vanuas, sed li malaperas,
aŭdiĝas krioj tra river' kaj monto verda plene.
Mi okulsekvas lin remantan foren laŭ akvfluo,
kaj super rokoj blankaj nuboj ĉasas sin senĝene.
trad. Vejdo

登柳州城楼寄漳汀封连四州刺史

城上高楼接大荒，海天愁思正茫茫。
惊风乱飐芙蓉水，密雨斜侵薜荔墙。
岭树重遮千里目，江流曲似九回肠。
共来百越文身地，犹自音书滞一乡。

Sur la pordego de Liuzhou

Ligiĝas etaĝdomoj al la vasta sovaĝejo,
ĉagreno mia en la kor' senlimas kiel maro.
Ventego skuas forte lotusflorojn en la lago,
grimplantojn sur la muro batas pluv' per vipa knaro.
Surmontaj arboj baras al mi l' vidon al la foro,
river' meandras kvazaŭ miaj ĝenoj de amaro.
Ni degradiĝis al dezerta kaj sovaĝa sudo,
kaj dise vivas sen komunikiĝi pro mont-baro.
trad. Vejdo

卢纶（约737-约799）

Lu Lun (c. 737-c. 799)

晚次鄂州

云开远见汉阳城，犹是孤帆一日程。
估客昼眠知浪静，舟人夜语觉潮生。
三湘愁鬓逢秋色，万里归心对月明。
旧业已随征战尽，更堪江上鼓鼙声。

En Ezhou ĉe vespero

Nuboj cedas, riveliĝas l' urbo en la foro,
unutagan iron mi bezonas per la velo.
Komercestoj en la ŝip' sufi e dormis tage,
kaj babilas nokte sur kvieta la rivero.
En aŭtuno mi maldormas kun grizblankaj haroj,
mute mi sopire nur rigardas al lunhelo.
Mia hejmo jam vanuis pro milito daŭra,
tamburad' milita ŝajne sonus e l' orelo.
trad. Vejdo

卢照邻（636-695?）

Lu Zhaolin (636-695?)

曲池荷

浮香绕曲岸，圆影覆华池。
常恐秋风早，飘零君不知。

Lotusoj en ronda lageto

En lageto plenas lotusflora bonodoro,
la folioj rondaj kovras akvon per tavolo.
Oni timas, ke l' aŭtuna vent' tro frue venos,
tiam nur velkintaj floroj dronos en angoro.
trad. Vejdo

骆宾王（约 619 - 约 687）

Luo Binwang (c. 619 - c.687)

咏鹅

鹅鹅鹅，曲项向天歌。
白毛浮绿水，红掌拨清波。

La ansero

Ho ansero, ansero, ansero!
Kun la kolo kurbema ĝi kantas al blua ĉielo.
Sub la blanka plumaro ĝi flosas sur verda la akvo;
Per la ruĝaj piedoj ĝi puŝas sin en flu-ŝancelo.

trad. Minosun

在狱咏蝉

西陆蝉声唱，南冠客思深。
那堪玄鬓影，来对白头吟。
露重飞难进，风多响易沉。
无人信高洁，谁为表予心？

Cikado kaj malliberulo

Cikado triste kantas en aŭtuna la vetero,
mi en karceru enpenŝiĝas kun melankolio.
Oldaĝa, mi kaduka jam surportas blankajn harojn,
ne plu eltenas ĝian nigran korpon kun ĝemkrio.
La densa roso malebligas ĝian flugon altan,
kaj vent' aŭtuna sonas super ĝia elegio.
Nu, kiu povus kredi je bonvirt' kaj noblo mia?
Kiu esprimi povus mian menson de racio?

trad. Vejdo

于易水送别

此地别燕丹，壮士发冲冠。
昔时人已没，今日水犹寒。

Disiĝo ĉe la rivero Yi

Ni disiĝas ĉi sur Yandan-tero,
haroj ja hirtiĝas pro kolero.
mortis jam herooj la pasintaj.
nun ankoraŭ frostas la rivero.

trad. Vejdo

马戴 (799-869)

Ma Dai (799-869)

灞上秋居

灞原风雨定，晚见雁行频。
落叶他乡树，寒灯独夜人。
空园白露滴，孤壁野僧邻。

寄卧郊扉久，何年致此身。

Loĝejo en aŭtuno

Ĵus ĉesis sur l' eben' pluvet' aŭtuna,
sovaĝanseroj flugas ĉe vespero.
Folioj falas en ĉi fremda loko,
mi sidas sola nokte ĉe kandelo.
Gutadas blanka prujno en la korto,
nur bonz' najbaras jen al mia ĉelo.
mi loĝas sovaĝeje jam delonge,
kiam mi regnon servos kun sincero?

trad. Vejdo

楚江怀古

露气寒光集，微阳下楚丘。
猿啼洞庭树，人在木兰舟。
广泽生明月，苍山夹乱流。
云中君不见，竟夕自悲秋。

Ĉe Dongting-lago

Nebul' kolektas la penetran fridon,
malantaŭ montoj sinkas sun' vespera.
En krioj de simioj en la arboj,
la homoj remas en la lag' malhela.
Leviĝas brila luno el lagakvo,
en montoj fluas akvo la pelmela.
Kial enuis la fein' en nuboj?
Tutnokte tristas mi en sent' sufera.

trad. Vejdo

孟浩然 (689 – 740)

Meng Haoran (689 – 740)

春晓

春眠不觉晓，
处处闻啼鸟。
夜来风雨声，
花落知多少。

Printempa mateno

La dormo printempa vekigon ne konas,
Matene, sed ĉie, birdpepo resonas.
Hieraŭ en nokto de pluvo kaj vento,

Ve, kiom da floroj falis en lamento?

trad. Minosun

宿建德江

移舟泊烟渚，日暮客愁新。
野旷天低树，江清月近人。

Tranoktado ĉe la rivero Jiande

Boat' ankriĝis ĉe sablej' en brumo,
ĉagren' naskiĝas ĉe mi en vespero.
malalte arbojn pezas la ĉielo,
jen proksimiĝas homoj al la luno.

trad. Vejdo

过故人庄

故人具鸡黍，邀我至田家。
绿树村边合，青山郭外斜。
开轩面场圃，把酒话桑麻。
待到重阳日，还来就菊花。

Vizito al amiko en vilaĝo

Amik' invitas min al sia hejmo
kaj per vilaĝa manĝo min regalas.
Ĉirkaŭ l' vilaĝ' borderas arbopleno,
ekstere verda monto kline staras.
Fenestr' rigardas al legomĝardeno,
pri kampaferoj ni babilon faras.
Mi ĝuos spekton ĉi al krizantemo
en la Montgrimpa Tag', mi nun deklaras.

trad. Vejdo

望洞庭湖赠张丞相

八月湖水平，涵虚混太清。
气蒸云梦泽，波撼岳阳城。
欲济无舟楫，端居耻圣明。
坐观垂钓者，徒有羡鱼情。

Rigardo al Dongting-lago

Aŭguste la lagakvo ŝvelas ĝis la bordo,
ĉiel' kaj akvo kunfandiĝas en nebulo.
Vaporon sputas vasta lago sub nub-hordo,
verŝajne skuas l' urbon furioza hulo.

Por ĝin transigi mankas al mi la boato,

se ne transiĝi, honton sentas mi en koro.
Vidante hokfiŝantojn manovri laŭ ŝato,
mi kovas nur envion kun malbonhumoro.

trad. Vejdo

早寒有怀

木落雁南度，北风江上寒。
我家襄水曲，遥隔楚云端。
乡泪客中尽，孤帆天际看。
迷津欲有问，平海夕漫漫。

En frua frosto

Gruoj flugas suden dum folia falo,
froston blovas norda vento sur rivero.
Mia hejmo sidas e sinua roĵo,
sed ĝi distas de mi en ofic-sufero.

El erpiĝis mia larm' de sopiremo,
ĉe la horizonto glitas sola velo.
Kie estas la pramejo en nebulo?
Nur ondetoj jen luliĝas sur rivero.

trad. Vejdo

孟郊 (751 -815)

Meng Jiao (751 -815)

游子吟

慈母手中线，游子身上衣。
临行密密缝，意恐迟迟归。
谁言寸草心，报得三春晖。

Kanto de vojaĝanto

Fadeno en la mano de l' patrino,
vestaĵo de la vojaĝonta filo.
Kun tim' pri lia reveno malfrua
ŝi kudras, ke firmiĝu l' korpŝirmilo.
Kiu do diris, ke herbeto povus
repagi al printempa sunobriilo?

trad. Minosun

聂夷中 (837-?)

Nie Yizhong (837-?)

咏田家

二月卖新丝，五月糞新谷。
医得眼前疮，剜却心头肉。
我愿君王心，化作光明烛。
不照绮罗筵，只照逃亡屋。

Povra kampulo

Li antaŭvendas novan silkon februarie,
kaj maje novan rizon kun ŝirita koro.
Kuracas mi l' ulceron nunan ja amare
per tranĉo de kora karnopeco kun doloro.

Esperas mi, ke de l' regnestro la korfavoro
fariĝu l' klara kandellumo ruĝa fajre,
prilumu ne la lukson de la metropolo,
sed pajlkabanojn la malri ajn malavare.

trad. Vejdo

田家

父耕原上田，子劬山下荒。
六月禾未秀，官家已修仓。

Familio de l' kampulo

Patro plugas teron sur la monto,
sube filo kreas kampon ŝvite.
En juni' spikiĝas ne grenplantoj,
l' impostist' jam pretas jen inside.

trad. Vejdo

公子家

种花满西园，花发青楼道。
花下一禾生，去之为恶草。

Dando

Floroj pompas en ĝardeno lia,
kaj kovriĝas plene pado stria.
Grenplantid' elkreskas apud floroj,
li eltiras ĝin por herbo fia.

trad. Vejdo

裴迪 (? - ?)

Pei Di (?-?)

送崔九

归山深浅去，须尽丘壑美。
莫学武陵人，暂游桃源里。

Adiaŭado al amiko

Vi aprecu ĉion en la monto:
la naturan belon de montvalo.
Ne similu al malzorgemulo,
konu ĉiun lokon laŭ detalo.
trad. Vejdo

綦毋潜 (692 -749)

Qimu Qian (692 -749)

春泛若耶溪

幽意无断绝，此去随所偶。
晚风吹行舟，花路入溪口。
际夜转西壑，隔山望南斗。
潭烟飞溶溶，林月低向后。
生事且弥漫，愿为持竿叟。

Printempe remi en boato sur la rojo Ruoye

Neniam ĉesis interes' viziti kvietejon:
ien ajn la boaton drivi lasas mi ĉi-fojon.
Jen blovas la vespera vento, ĝi promenas glate,
laŭ ambaŭ bordoj florkovritaj, en fluantan rojon.
Noktiĝe ĝi turniĝas al la okcidenta valo,
trans montoj la Ĉerpilo Suda ĉiele sin ŝovas.
Sur l' akvo la nebulo densa ŝvebas en obskuro,
kaj super bambuaro sin la luno retromovas.
La monda vivafero vere estas konfuzita,
preferas esti mi maljuna fiŝkaptist' ermita.
trad. Minosun

钱起 (722—780)

Qian Qi (722—780)

暮春归故山草堂

谷口春残黄鸟稀，辛夷花尽杏花飞。

始怜幽竹山窗下，不改清阴待我归。

rehejme al la ĥato fine de printempo

en printempfino orioletoj vale preskaŭ nulas.
floroj de magnoli' kaj abrikot' sin teren rulas.
ĉi-tempe ravas pli bambuoj ekster la fenestro,
per la helverdo al mi kiel kutime karulas.

trad. mao zifu

送僧归日本

上国随缘住，来途若梦行。
浮天沧海远，去世法舟轻。
水月通禅寂，鱼龙听梵声。
惟怜一灯影，万里眼中明。

Dediĉe al bonzo reiranta al Japanio

Por Budho vi vojaĝis kvazaŭ sonĝe
alvenis loĝi ĉe ni kunsincere.
Trans mar' vi ŝajnis flosi ja sur nuboj,
kaj vi reiras per budh-ŝip' leĝere.
Enakva lun' kvietas en la zeno,
jen fiŝoj, drak' aŭskultas vin prefere.
Vi amas nur la budhan ole-lampon,
forfore ĝi prilumas vin ja vere.

trad. Vejdo

赠阙下裴舍人

二月黄莺飞上林，春城紫禁晓阴阴。
长乐钟声花外尽，龙池柳色雨中深。
阳和不散穷途恨，霄汉长怀捧日心。
献赋十年犹未遇，羞将白发对华簪。

Dediĉe al la palaca konsilanto Pei

Orioletoj flugas al ĝardeno reĝa februarie,
la palaca urbo verdas en maten' de primavero.
Tintoj de l' palacaj sonoriloj ŝvebas inter floroj,
ĉe la lag' salik-koloro okulfrapas en pluv-pelo.
Eĉ en la sunplena tago mi morozas pro fi-sorto,
sed mi kovas lojalecon al la filo de l' Ĉielo.
Dum dek jaroj malsukcesas mi en reĝaj ekzamenoj,
mi, kun blankaj haroj, alvizaĝas vin kun hont-sufero.

trad. Vejdo

谷口书斋寄杨补阙

泉壑带茅茨，云霞生薜帷。
竹怜新雨后，山爱夕阳时。
闲鹭栖常早，秋花落更迟。
家童扫萝径，昨与故人期。

Al kortegano Yang

Ĉirkaŭ l' pajlkabano kreskas herboj,
fluas font' abunde.
Nuboj super mur-sarmentoj
jen falpendas bunte.
La bambuoj plaĉas al okuloj
post pluvet' subtila.
Montoj banas sin en vesperruĝo
jen kun lumo brila.
Jam ardeoj flugis al la nesto
frue en arbaro.
Vigloplena aŭtun-floroj tardas
en flirtanta falo.
Servoknab' balaas pure padon
sub sarmentoj mortaj.
Mi hieraŭ renkontiĝis ĝoje
kun amikoj oldaj.

trad. Vejdo

秦韬玉 (? - ?)

Qin Taoyu (?-?)

贫女

蓬门未识绮罗香，拟托良媒益自伤。
谁爱风流高格调，共怜时世俭梳妆。
敢将十指夸针巧，不把双眉斗画长。
苦恨年年压金线，为他人作嫁衣裳。

Malriĉa filino

Malriĉa ŝi ne konas la silkaĵon bonodorajn,
ŝi eĉ eksentas triston je menci' de bona svato.
Kiu ŝin amus pro bonvirt' kaj bonkonduto ŝia?
Oni nur ĉasas la furoran ŝminkon laŭ kor-ŝato.

Kapablas vere kudri, brodi ŝi per lertaj fingroj,
neniam pentri brovojn ŝi por pavi jen per belo.
Ŝi tre bedaŭras, ke ŝi brodas vestojn tra la jaro

ne por si, sed por aliuloj en la nupta helo.

trad. Vejdo

邱为 (? - ?)

Qiu Wei (? - ?)

寻西山隐者不遇

绝顶一茅茨，直上三十里。
扣关无僮仆，窥室唯案几。
若非巾柴车，应是钓秋水。
差池不相见，黽勉空仰止。
草色新雨中，松声晚窗里。
及兹契幽绝，自足荡心耳。
虽无宾主意，颇得清净理。
兴尽方下山，何必待之子。

Ne trovi la ermiton en l' Okcidenta Monto

De sube l' voj' ascendas tridek liojn,
sur monta supro ĥato sin prezentas.
Ne estas servoknabo ĉe la pordo,
skrib- kaj te-tabloj ene nur silentas.
La mastro aŭ eliras per la ĉaro,
aŭ ĉe aŭtuna akvo fiŝojn hokas.
Mi perdis la okazon lin viziti
kun kulto, kiun mi en koro lokas.
En nova pluv' la verdaj herboj freŝas,
vespere l' pinoj ĉe l' fenestr' murmuras.
En tia kvietejo, kie decas
purigi la animon, mi plezuras.
Malhavas mi honoron vin renkonti,
la zeno tamen iluminis min.
Ĝuinte jam, de l' monto mi descendas.
Kial mi devus nepre vidi vin?

trad. Minosun

权德舆 (759-818)

Quan Deyu (759-818)

独酌

独酌复独酌，满盏流霞色。
身外皆虚名，酒中有全德。
风清与月朗，对此情何极。

Drinki sola

Mi drinkadas sola foj-refoje,
la pokalo plenas je karmino.
Famo estas vanta ekster korpo,
bonvirtec' troviĝas en la vino.
Sub la klara luno en zefiro,
ravas min la sento en animo.

trad. Vejdo

岭上逢久别者又别

十年曾一别，征路此相逢。
马首向何处？夕阳千万峰。

Redisiĝo post renkontiĝo sur monto

Antaŭ dek jaroj adiaŭis vin mi,
ni renkontiĝas sur monta vojstri'.
Kien vi tuj jam iros surĉevale?
Al montoj en vespera lumradi'.

trad. Vejdo

玉台体

昨夜裙带解，今朝蟾子飞。
铅华不可弃，莫是篙砧归。

Sopiro al amo*

Hieraŭ nokte loziĝis jupzono;
araneeto ĉi-matene flugas.
Ĉu tio signas revenon de l' edzo? –
Al ŝminko haste mi min alkondukas.

**Antikvaj ĉinoj kredis pri la superstiĉo: kiam jupa zono mem loziĝas, aŭ kiam
araneeto ekflugas, tio aŭguras ian feliĉon baldaŭ okazonta.*

trad. Minosun

Sopiremo

Lastnokte malstreĉiĝis mia jup-rimeno,
hodiaŭ rampas araneoj du sur reto.
Mi nepre bele ŝminkos min kun ĝoj-mieno,
ĉar eble mia edz' revenos tuj en preto.

trad. Vejdo

沈佺期（约656-约715）

Shen Quanqi (c.656-c.715)

杂诗

闻道黄龙戍，频年不解兵。可怜闺里月，长在汉家营。
少妇今春意，良人昨夜情。谁能将旗鼓，一为取龙城。

Sentitole

Militas arde oni en la urbo Huanglong
soldatoj ne retretas jam dum multaj jaroj.
En buduaro ŝi nur gapas al la luno,
kun sopiremo al li en milit-tendaroj.
Ĉi-nokte brulas ŝia sopir-sento al li,
lastnokte ankaŭ dronis li ja en ĉagreno.
Kiam al malamiko oni militiros
kaj venkos jen sur malamika la tereno?
trad. Vejdo

独不见

卢家少妇郁金香，海燕双栖玳瑁梁。
九月寒砧催木叶，十年征戍忆辽阳。
白狼河北音书断，丹凤城南秋夜长。
谁为含愁独不见，更教明月照流黄？

Sopire al la edzo

Junulin' Lu loĝas en tulip-parfuma halo,
nestas la hirunda paro sur pentrita trabo.
En septembr' oni lavbatas en folia falo,
ŝi sopiras al li jam dek jarojn en batalo.
En du lokoj ĉesas komuniko per mesaĝo,
nokt' aŭtuna longas ja por ŝi en buduaro.
“Kial kovas mi ĉagrenon por li en armaĵo?
Kial ĉiam ĝenas min lunlum' sur litvualo?”
trad. Vejdo

司空曙（720 - 790）

Sikong Shu (720 - 790)

喜外弟卢纶见宿

静夜四无邻，荒居旧业贫。
雨中黄叶树，灯下白头人。
以我独沉久，愧君相见频。

平生自有分，况是蔡家亲。

Min ĝojigas la vizito de mia kuzo

Kvietas nokto. Pro mizero loĝas
Mi sennajbare sur dezerta kampo.
En pluvo velkas flavaj arbofolioj,
Mi blankharulo kadukas ĉe lampo.
Ne indas mi, deprimiĝanta longe,
Je via vizitado por konsolo.
Tiu frateco kaj eĉ parenceco
Denaske ligas nin per sama koro.

trad. Minosun

云阳馆与韩绅宿别

故人江海别，几度隔山川。
乍见翻疑梦，相悲各问年。
孤灯寒照雨，深竹暗浮烟。
更有明朝恨，离杯惜共传。

Adiaŭ al Han Shen en la hotelo Yunyang

Post l' adiaŭ' ni estis disigitaj
De montoj kaj riveroj multajare.
Je renkontiĝ' abrupta, kvazaŭ songa,
Tuj demandatas nia aĝ' amare.
La frida pluv' mornigas solan lampon,
Nebulo sombre ŝvebas bambuare.
Ve, por morgaŭa ĝis', amiko mia,
Ni tostu, tostu, ne diboĉoŝpare.

trad. Minosun

贼平后送人北归

世乱同南去，时清独北还。
他乡生白发，旧国见青山。
晓月过残垒，繁星宿故关。
寒禽与衰草，处处伴愁颜。

Post la subpremo de ribelo

Ni kune fuĝis sudolanden el malordo,
Nun pace, vi revenos sola al la nordo.
Fremdloke niaj haroj sin rivelas blanke,
La montoj ja ankoraŭ verdas nialande.
Ruinojn vi trapasos kun matena luno,
Kaj ĉe pasej' tranoktos sub stelara lumo.
De frosto velkas herboj kaj birdaro tremas.

Ĉe ĉiu via paŝo ĉio vin ĉagrenas.
trad. Minosun

宋之问（约656—约712）

Song Zhiwen (ĉ. 656—ĉ. 712)

题大庾岭北驿

阳月南飞雁，传闻至此回。
我行殊未已，何日复归来。
江静潮初落，林昏瘴不开。
明朝望乡处，应见陇头梅。

Ĉe poŝta stacio

Sovaĝanseroj flugas suden en aŭtuno
ĝis mia loko kaj reflugos jen laŭdire.
Sed devas mi daŭrigi la vojaĝon longan,
sen scii, kiam mi revenos laŭdezire.
Post tajd' ondetis la rivero sen torento,
arbaro la profunda svagas nebulŝmire.
Ĝis mi ascendas la altaĵon kaj rigardos,
mi vidos la hejmlokajn florojn kunsopire.
trad. Vejdo

渡汉江

岭外音书断，经冬复历春。
近乡情更怯，不敢问来人。

Trans Han-rivero

Jam ne alvenas hejma la letero,
post vintro sekvas ree primavero.
Des pli mi timas proksime al hejmo,
ne riskas ĉui homon el nasktero.
trad. Vejdo

王勃（650—676）

Wang Bo (650-676)

山中

长江悲已滞，万里念将归。
况属高风晚，山山黄叶飞。

En la monto

Malfluas Jangzi* jen kun trista spleno,
sopiras fore mi al hejmeveno.
Aŭtuna vento nun susure blovas,
folioj flavaj flirtas sur montĉeno.

**Jangzi-rivero estas la plej granda rivero en Ĉinio.*

trad. Vejdo

送杜少府之任蜀州

城阙铺三秦，风烟望五津。
与君离别意，同是宦游人。
海内存知己，天涯若比邻。
无为在歧路，儿女同沾巾。

Adiaŭ al mia amiko, kiu oficos en Shuzhou

La ĉefurbon tri strategilokoj remparas spacvaste,
En nebulo l' kvin sudaj pramejoj apenaŭ vidatas.
Ĉe la ĝis' al vi, mia amiko, min kaptas kunsento:
Kiel regnaj servistoj fremdloke ni ambaŭ sam-statas.
Por intimaj amikoj interne de l' kvaroj da maroj,
Eĉ grandega distanco najbaras, - jen oni konstatas.
Disiĝante ĉe la vojoforko, ni certe ne estu
Kiel karaj geuloj, al kiuj la larmoj invadas.

trad. Minosun

Adiaŭado al amiko por posteniĝo en Sichuan

La ĉefurb' sidanta sur teren' de tri Qin-feŭdoj
rigardas al kvin pramejoj foraj en malklaro.
Ni ekhavas saman tristan senton ĉe l' disiĝo,
ĉar ni ambaŭ 'stas migrantaj ja por ofic-faro.
Eĉ trans maro restas vi amik' intima mia,
kvankam fore, al mi vere ŝajnas vi najbaro.
Sur la vojo de disiĝ' ne verŝu sangan larmon,
kiel juna par' adiaŭiĝas pro separo.

trad. Vejdo

王昌龄 (698-757)

Wang Changling (698-757)

送柴侍御

流水通波接武冈，送君不觉有离伤。
青山一道同云雨，明月何曾是两乡。

Al imperia prokuroro CHAI

Fluas rekte al la urbo Wugang la rivero,
Mi kaj vi malĝojas pro disiĝa korsufero.
verda mont' kun nubo kaj pluveto nin kunligas,
En du lokoj banas nin la sama luna helo
trad. Ardo

闺怨

闺中少妇不知愁，春日凝妆上翠楼。
忽见陌头杨柳色，悔教夫婿觅封侯。

Ekplendo en haremo

Neniam ŝi ĉargenon ajnan sentas en haremo,
ŝminkite ŝi suriras turon en printempa tago.
Vidante apudvojn salikarbojn kun verdpleno,
ŝin kaptas pent' forsendi lin al la batala vago.
trad. Vejdo

芙蓉楼送辛渐

寒雨连江夜入吴，平明送客楚山孤。
洛阳亲友如相问，一片冰心在玉壶。

Adiaŭado al amiko

Pluvnokte venas tien ĉi mi ĉe l' rivero frida
por vin forsendi splene el la monto ĉe aŭroro.
Se iu el amikoj ĉuos vin pri mi hejmsida,
do diru, ke mi virta tenas min kun pura koro.
trad. Vejdo

王梵志 (? — ?)

Wang Fanzhi (? - ?)

其一

他人骑大马，我独跨驴子。
回顾担柴汉，心下较些子。

Sen titolo

Aliaj rajdas sur ĉevalo granda,
Sed nur mi sur azeno. Rerigarde
Al la portanto de brulligno peza,
Mi sentas min nun iom bonhazarde.
trad. Minosun

王翰 (687-726)

Wang Han (687-726)

凉州词

葡萄美酒夜光杯，欲饮琵琶马上催。
醉卧沙场君莫笑，古来征战几人回？

Kanto de batalkampo

La belan vinon en pokalo el rubeno
mi pretas trinki, korno urĝas al ĉevalo.
Ne moku min pri kuŝo sur batal-tereno,
kiom da homoj povas vivi sen mort-falo?
trad. Vejdo

王绩 (约 589 - 644)

Wang Ji (ĉ. 589 - 644)

过酒家

此日长昏饮，非关养性灵。
眼看人尽醉，何忍独为醒。

En drinkejo

Ĉi tagon mi drinkadas ĝiskonfuze,
Sed ne por min kulturi animnobla.
Nun ke aliaj ĉiuj ebriiĝis,
Kiel mi povus sole resti sobra?
trad. Minosun

王驾 (? - ?)

Wang Jia (? - ?)

雨晴

雨前初见花间蕊，
雨后全无叶底花。
蜂蝶纷纷过墙去，
却疑春色在邻家。

Sereno post pluvado

plantaro antaŭ pluv' ekfloris en nepleno;
postpluve nur folioj staras kun elteno.
la papilioj kaj abeloj transis muron,

jen por printempon eblan serĉi en ĝardeno.

trad. mao zifu

Serena printempa tago

Antaŭ l' printempa pluvo mi florburĝonojn vidas,

Sed post ĝi, krom folioj, neniaj floroj sidas.

L' abeloj, papilioj, transflugis svarme l' muron -

Ĉu la printempo ĉe la najbaro nun rezidas?

trad. Minosun

王建 (766? — 830?)

Wang Jian (766?—830?)

望夫石

望夫处，江悠悠。

化为石，不回头。

上头日日风复雨。

行人归来石应语。

Edz-sopira roko

Starante sur verdeta monto,

vizaĝe al rivera ondo,

la rok' obstinas por eterne,

vidante lin en vagabondo.

Tra pluv' kaj vento nokte-tage,

ĝi pretas diri ĉe renkonto.

trad. Vejdo

水夫谣

苦哉生长在驿边，官家使我牵驿船。

辛苦日多乐日少，水宿沙行如海鸟。

逆风上水万斛重，前驿迢迢后淼淼。

半夜缘堤雪和雨，受他驱遣还复去。

衣寒衣湿披短蓑，臆穿足裂忍痛何？

到明辛苦无处说，齐声腾踏牵船出。

一间茅屋何所值，父母之乡去不得。

我愿此水作平田，长使水夫不怨天。

Kanzoneto pri ŝiphaŭlisto

Ve, kiel ŝiphaŭlisto servas mi mizere,

por reĝo trenas ŝipojn ŝvite sur haŭlvojo.

Mi tage klopodadas kun malmulta ĝojo,

tranoktas surboate akvbird-maniere.

Mi kontraŭflue penas kun streĉita forto,
ne vidas kie estas la staci' celita.
Noktmeze en vetero pluve neĝ-agita
ordonon pelas min al servo kun kohorto.
Kun vest' malseka nokta-froste ĝis la haŭto
kaj pikdolor' neeltenebla je kalkano
ne povas ni elverŝi plendojn al tirano,
laŭpaŝe ĉantas la koleron nur en laŭto.
Mi ne domaĝas mian senvaloran ĥaton
sed ĉiam mi sopiras al gepatra lando.
Mi volas, ke riveroj iĝu kampa grandao
ke ni haŭlistoj ne plu priplendu malŝaton.
trad. Vejdo

雨过山村

雨里鸡鸣一两家，竹溪村路板桥斜。
妇姑相唤浴蚕去，闲看中庭栀子花。

Vilaĝo en pluvo

En pluv' aŭdiĝas kokerik' ĉe ĥatoj je foj-fojo,
tra bambutufoj sub pontet' oblikve fluas rojo.
Por silkraŭpa prizorg' virinoj voke sin invitas,
en kort' nur gardenioj staras kun senfara ĝojo.
trad. Vejdo

王湾（约693-约751）

Wang Wan (ĉ.693-ĉ.751)

次北固山下

客路青山外，行舟绿水前。潮平两岸阔，风正一帆悬。
海日生残夜，江春入旧年。乡书何处达？归雁洛阳边。

Piede de la monto Beigu

Preter verda monto mi veturas
per boat' en klara la rivero.
La tajdakvo glate, vaste kuras,
drivas jen per vento nia velo.
Restan nokton brila sun' forrulas
cedas l' inta jar' al primavero.
Kiel sendi alhejman mesaĝon?
Helpu min, ho, vi sovaĝansero.
trad. Vejdo

王維 (701 – 761)

Wang Wei (701 – 761)

竹里館

獨坐幽篁里，
彈琴復長嘯。
深林人不知，
明月來相照。

La domo en bambuoj

Sidante sola en l' malhela bambubosko,
Liuton plukas mi kaj kanta senkompane,
Fore de l' homa mondo, en la dom-kiosko;
Al mi la luma luno brilas akompane.

trad. Minosun

終南山

太乙近天都，連山到海隅。
白雲回望合，青靄入看無。
分野中峰變，陰晴眾壑殊。
欲投人處宿，隔水問樵夫。

La monto Zhongnan

La monto Zhongnan proksimiĝas al ĉefurbo,
Kaj trae sin etendas ĝis la mara bordo.
La blankaj nuboj post mi kunas en la mason,
Dum antaŭ mi l' nebul' foriras sen form-ordo.
Duflanke de l' monteĝo ŝanĝas sin pejzaĝo:
Al la malhelaj l' helaj valoj mal-identas.
Por nokti, trans la roĝo mi arbohakiston
Demandas, kie tranoktejo sin prezentas.

trad. Minosun

鹿柴

空山不見人，但聞人語響。
返景入深林，復照青苔上。

La ermitejo

Kvietas monto. Nevideblas homoj,
Aŭdiĝas tamen homaj voĉaj sonoj.
L' arbaro dronas en vesperkrepusko,
Rebrilo ĝia restas sur la musko.

trad. Minosun

鸟鸣涧

人闲桂花落，夜静春山空。
月出惊山鸟，时鸣春涧中。

Birdpepa montrojo

Senfare mi aŭskultas falon de osmantaj floroj;
En la printempaj montoj regas nokta la kvieto.
Ekmiras birdoj ĉe l' apero de la luno, kiuj
Fojfoje pepas super l' intermonta rivereto.

trad. Minosun

画

远看山有色，近听水无声。
春去花还在，人来鸟不惊。

Pentraĵo

La montoj malproksimaj estas koloritaj,
Proksime la fluanta akvo ne aŭdiĝas.
Ĉe la printempa fin' ankoraŭ pompas floroj;
Pri la alven' de homo birdoj ne timkriĉas.

trad. Minosun

归嵩山作

清川带长薄，车马去闲闲。
流水如有意，暮禽相与还。
荒城临古渡，落日满秋山。
迢递嵩高下，归来且闭关。

En monto Songshan

Ĉirkaŭ la herbejo fluas klara rojo,
ĉar-veturas mi paceme sur la vojo.
Al mi l' fluo montras senton de tenero,
mi revenos kun birdaro de vespero.
Ĉe l' dezerta urbo la pramej' apudas,
sun' sinkanta sur l' aŭtuna monto ludas.
Ĉe l' pied' de l' monto fora, alt-solena,
mi ermite vivas sen vizito ĝena.

trad. Vejdo

山居秋暝

空山新雨后，天气晚来秋。
明月松间照，清泉石上流。
竹喧归浣女，莲动下渔舟。

随意春芳歇，王孙自可留。

Ĉe aŭtuna vespero

Post nova pluvo monto ŝajnas pure klara,
aŭtuna la vetero friskas ĉe vespero.
La lun' disverŝas lumon filtre inter pinojn,
fontakvo lirlas ĉirkaŭ ŝtonojn kun libero.
En bambuaro ĝoje ridas lavistinoj,
boato tra lotusoj velas en ventpelo.
Etos' printempa povas sveni ja laŭplaĉe,
ankoraŭ mi vagadas en aŭtuna helo.

trad. Vejdo

过香积寺

不知香积寺，数里入云峰。
古木无人径，深山何处钟。
泉声咽危石，日色冷青松。
薄暮空潭曲，安禅制毒龙。

Vizito al la templo Xiangji

Ideon mi ne havas, kie Xiangji-templ' sin trovas,
mi erarvagas kelkajn liojn en nebul-vualo.
En la arbar' antikva ne videblas pad' por homoj,
kie la tintoj sonorilaj sonas en ĝangalo?
Fontakvo plaŭde frapas kontraŭ la danĝeraj klifoj,
jam ne plu varmas la sunlum' filtrita en pinaro.
Vespere mi aliras al kaŝita lok' ĉe lago,
kaj mi meditas por konkeri drakon en kor-maro.

trad. Vejdo

相思

红豆生南国，春来发几枝。
愿君多采撷，此物最相思。

Amsopiro

Beroj de abruso* kreskas en Sudlando,
primavere ili belas en prospero.
Pluku ilin do pli multe por konservo,
ĉar simbolas ili amon de fidelo.

*Abruso: *Abrus precatorius* L.

trad. Vejdo

山中

荆溪白石出，天寒红叶稀。
山路元无雨，空翠湿人衣。

En monto

Elstaras blanka rok' en rivereto,
en frost' folioj ruĝaj falas flirte.
ne pluvo ŝvebas sur la monta pado,
smeralda verd' humidas vestojn milde.

trad. Vejdo

秋夜曲

桂魄初生秋露微，轻罗已薄未更衣。
银筝夜久殷勤弄，心怯空房不忍归。

Melodio en aŭtuna nokto

Ĵus la lun' leviĝas. Aŭtunnokte rosas fride.
mi ankoraŭ portas silkan veston en deprimio.
Citron mi senĉese ludas dum longlonga nokto,
en haremon vakan iri malemas pro timo.

trad. Vejdo

送别

一

下马饮君酒，问君何所之？
君言不得意，归卧南山陲。
但去莫复问，白云无尽时。

二

山中相送罢，日暮掩柴扉。
春草年年绿，王孙归不归？

Aŭdiaŭado

1.

“Deĉevaliĝu por pokal' da vino!”
Demandi riskas mi, vi loĝas kie?
Respondas vi, ke vi ne tre prosperas,
kaj loĝas en la suda monto ie.
Mi ne plu ĉuas kaj vin lasas foren,
neniam blankaj nuboj mankas tie.

2.

En mont' mi adiaŭis vin bedaŭre,
mi fermis barilpordon ĉe vespero.
Ĝis printemp-herboj verdos sekvan jaron,

ĉu vi vagant' revenos kun prefero?

trad. Vejdo

渭川田家

斜阳照墟落，穷巷牛羊归。
野老念牧童，倚杖候荆扉。
雉雉麦苗秀，蚕眠桑叶稀。
田夫荷锄至，相见语依依。
即此羡闲逸，怅然吟式微。

Vilaĝa vivo

Vilaĝ' sin banas en sunlumo de vespero,
laŭ voj' serpenta bovoj, kaproj jen revenas.
Oldul' atendas sian nepon bovpaŝtanta,
ĉe l' barilpord' li irbastonon mane tenas.
Kukuas la fazanoj inter tritikplantoj,
jam, dum silkraŭpa dorm', morusfolioj senas.
Kampuloj rehejmiĝas el la kamplaboro,
renkonte ili jen salute ridmienas.
Mi vere ja envias ilin el korfundo,
nereteneble versoj vervaj en mi plenas.

trad. Vejdo

终南别业

中岁颇好道，晚家南山陲。
兴来每独往，胜事空自知。
行到水穷处，坐看云起时。
偶然值林叟，谈笑无还期。

Ermita vivo en la monto Zhongnan

Mi mezaĝa studis la doktrinon Budhan,
loĝas mi oldaĝa en la monto fora.
Mi de lok' al loko vagas ofte sola,
mi aferojn traktas kun kontent' elkora.
Mi pluiras ĝis la fino de l' akvfluo,
side mi rigardas al nubflug' petola.
Kun oldul' babilas mi en la arbaro
longe sen reiri al la hejm' konsola .

trad. Vejdo

九月九日忆山东兄弟

独在异乡为异客，每逢佳节倍思亲。
遥知兄弟登高处，遍插茱萸少一人。

Penso pri fratoj en Shandong dum Festo de Duobla Naŭo*

Kiel fremdul' mi vagas sola en alia loko
dum festoj des pli mi sopiras al karuloj miaj.
Mi scias, ke vi ĉiuj kolektiĝas nun sur monto,
ve, nur mi mankas bedaŭrinde en sidlokoj viaj.

** La festo okazas la naŭan de la naŭa lunmonato.*

trad. Vejdo

送元二使安西

渭城朝雨浥轻尘，客舍青青柳色新。
劝君更尽一杯酒，西出阳关无故人。

Al l' amiko vojaĝanta al Anxi

En urbo Wei de matenpluvo humidiĝas polvo,
ĉirkaŭ l' gastejo verdas salikaro freŝe hela.
Amiko, trinku plian tason da alkoholaĵo,
trans la Pasejo mankas al vi amikar' sincera.

Trad. Vejdo

青溪

言入黄花川，每逐青溪水。
随山将万转，趣途无百里。
声喧乱石中，色静深松里。
漾漾泛菱荇，澄澄映葭苇。
我心素已闲，清川澹如此。
请留磐石上，垂钓将已矣。

Klara Rojo

Kiam mi al tiu ĉi tereno iras
ĉiam mi promenas laŭ la Klara Rojo.
Kvankam la fluakvo dekmil kurbojn giras
interesas min nur kurt-distanca vojo.
Flu' impetas frape inter ŝtonoj brue,
kaj senonas en pinar' kun verd-koloro.
Ĝi ondete puŝas akvoherbojn skue,
karesante la fragmitojn kun frivolo.
Mi nun tenas mian koro en kvieto
kiel la trankvila akvo en aktivo.
Do, mi sidu sur la rok' ĉe rivereto,
kaj fiŝhoku tra la rest' de mia vivo.

trad. Vejdo

王之涣 (688 – 742)

Wang Zhihuan (688 – 742)

登鹳雀楼

白日依山尽，
黄河入海流。
欲穷千里目，
更上一层楼。

Sur la turo Guanque

La helpala suno falas post montaron,
Fluas la Rivero Flava en la maron.
Por rigardi pli subliman belpejzaĝon
Nepras iri sur pli altan turetaĝon.

trad. Minosun

Sur la Cikonia Turo

La sun' subiras ĉe l' montaro,
River' la Flava fluas al la maro.
Se volas plenan vi pejzaĝon,
Ascendu plian turetaĝon.

trad. Vejdo

Sur la Cikonia Turo

Subiras suno,
torentas river' .
Ascendu plue
por vida liber' .

trad. Vejdo

送别

杨柳东风树，青青夹御河。
近来攀折苦，应为别离多。

Adiaŭado

Printempe salikarboj verdas en ventpelo,
starante e la bord' de reĝa la rivero.
Nun mankas salikbran oj por adiaŭado,
lasttempe multas la disiĝoj de sufero.

trad. Vejdo

凉州词

黄河远上白云间，一片孤城万仞山。

羌笛何须怨杨柳，春风不度玉门关。

Kanto pri limregiono

Rivero Flava altorentas jen el firmamento,
en altaj montoj staras la Pasejo en izolo.
Muziko fluta ne lamentu pri l' printempa vento,
kiu neniam ĝis pasejo blovas por konsolo.

trad. Vejdo

韦应物 (737 - 786)

Wei Yingwu (737 - 786)

滁州西涧

独怜幽草涧边生，
上有黄鹂深树鸣。
春潮带雨晚来急，
野渡无人舟自横。

La okcidenta roĵo en Chuzhou

Verdaj herboj mutas ĉe la fluo;
Inter densaj arboj orioloj
Supre trilas hele kaj en bruo –
Ĉi pejzaĝoj, kiel ja idoloj,
Plaĉas al mi.

La printempa tajdo altorentas,
Kaj tuj urĝas pluvo je vespero.
La dezerta pramejo silentas,
Nur boat' sur roĵo, laŭ libero,
Flosas kun si.

trad. Minosun

寒食寄京师诸弟

雨中禁火空斋冷，江上流莺独坐听。
把酒看花想诸弟，杜陵寒食草青青。

Al fratoj dum fridmanĝaĵa tago

En pluva kaj senfajra tago fridas vaka ĉelo
turmentas min jen oriolaj krioj ĉe rivero.
Drinkante inter floroj mi sopiras miajn fratojn
nun tie ĉi jam herboj hele verdas en prospero.

trad. Ardo

夕次盱眙县

落帆逗淮镇，停舫临孤驿。
浩浩风起波，冥冥日沉夕。
人归山郭暗，雁下芦洲白。
独夜忆秦关，听钟未眠客。

Ĉe nokta ankriĝo

Kun ferlita velo ĉe urbeto sola
ni ankriĝis ĉe l' dezerta poŝt-stacio.
La river' subite levas altajn ondojn,
suno sinkas en malhela nokt-magio.
Homoj jame rehejmiĝis por ripozi,
kaj sovaĝanseroj dormas en fragmitoj.
Nokte mi sopiras al ĉefurbo regna,
maldormigas min tintilaj son-incitoj.

trad. Vejdo

秋夜寄邱员外

怀君属秋夜，散步咏凉天。
空山松子落，幽人应未眠。

En aŭtuna nokto

Mi sopiras al vi en aŭtuna nokto,
mi promenas jen en frosta la vetero.
Nun pinnuksoj falas en malplena monto,
eble ne dormiĝas vi en via ĉelo.

trad. Vejdo

寄李儋元锡

去年花里逢君别，今日花开又一年。
世事茫茫难自料，春愁黯黯独成眠。
身多疾病思田里，邑有流亡愧俸钱。
闻道欲来相问讯，西楼望月几回圆。

Versoj al miaj amikoj

Lastjare ni disiĝis en disflora la sezono,
nun jar' forpasis, reas disflorado en prospero.
Aferoj en la mond' ŝanĝiĝas ja neatendite,
ĉagreno min dormigas sola en printempa helo.
Pro malsanemo ofte mi sopiras al hejmloko,
oficas honte mi pro rifuĝantoj en mizero.
Mi aŭdas, ke vi min viziti venos en ĉi jaro,
atendas vin multfoje mi sur turo kun espero.

trad. Vejdo

长安遇冯著

客从东方来，衣上灞陵雨。
问客何为来，采山因买斧。
冥冥花正开，颺颺燕新乳。
昨别今已春，鬢丝生几缕。

Renkontiĝo kun amiko en Chang'an

Gasto venis tien ĉi el l' oriento,
restis sur la vest' pluvgutoj de la foro.
"Kial vi alvenas al mi?" mi demandis.
"Por aĉeti ilon en arbhak-laboro."
Floroj nun troviĝas pompe en prospero,
nutras idon hirundin' kun kora molo.
Nun re-renkontiĝas ni en primevero,
kiom da grizharoj kreskas kontraŭ volo?
trad. Vejdo

淮上喜会梁川故友

江汉曾为客，相逢每醉还。
浮云一别后，流水十年间。
欢笑情如旧，萧疏鬓已斑。
何因不归去，淮上有秋山。

Ĝoja renkontiĝo kun malnova amiko

Mi gaste loĝis en areo Jianghan,
ni ofte ĝoje drinkis kune ĝis ebrio.
Paseo malaperis kiel nub' flosanta,
dek jaroj jam forpasis ja sen nia scio.
Sed restas nia amikeco kiel inte,
kvankam grizharoj aldoniĝas ĉe l' tempio.
"Kial vi ne reiras hejmen?" vi demandas.
"L'aŭtunan monton amas tre mi kun pasio!
trad. Vejdo

初发扬子寄元大校书

凄凄去亲爱，泛泛入烟雾。
归棹洛阳人，残钟广陵树。
今朝此为别，何处还相遇。
世事波上舟，沿洄安得住！

Adiaŭado al kara amiko

Dirinte adiaŭon al amiko kara,
mi perboate glisas al nebulprofundo.

Leĝere remas mi al Luoyang, mia loko,
matenaj voĉoj sendas min tra arbabundo.
Hodiaŭ ni disiĝas unu de l' alia,
kiam ni renkontiĝos jen kun ĝoj' elkora?
Aferoj en la mond' similas la boaton,
suronde ĝi turniĝas kaj kirliĝas sola.

trad. Vejdo

赋得暮雨送李胄

楚江微雨里，建业暮钟时。
漠漠帆来重，冥冥鸟去迟。
海门深不见，浦树远含滋。
相送情无限，沾襟比散丝。

Adiaŭado en vespera pluvo

En delikata pluvo ĉe rivero
aŭdiĝas en la urbo tamburado.
La vel' boata pezas en pluvstrio,
malŝue flugas birdoj jen en fado.
Rivero fluas foren ĝis la maro,
la arboj humidiĝas ĉe l' rivero.
Amikon adiaŭas mi kun sento,
sur veston larmo fluas sen modero.

trad. Vejdo

寄全椒山中道士

今朝郡斋冷，忽念山中客。
涧底束荆薪，归来煮白石。
欲持一瓢酒，远慰风雨夕。
落叶满空山，何处寻行迹？

Al taŭisto en la monto Quanjiao

Sentante fridon tujan en la rezidejo,
mi eksopiras al taŭisto en la monto.
Kolektas brullignaĵon vi ĉe vala roĵo,
legomojn vi kuiras hejme sur fajra-rondo.
Donaci vinon volus mi ĉe via loko
por vin konsoli iom en pluvŝtorma mondo.
Sed en arbar' kun susurantaj la folioj,
kie mi trovus vian spuron por renkonto?

trad. Vejdo

东郊

吏舍跼终年，出郊旷清曙。

杨柳散和风，青山澹吾虑。
依从适自憩，缘涧还复去。
微雨霭芳原，春鸠鸣何处。
乐幽心屡止，遵事迹犹遽。
终罢斯结庐，慕陶直可庶。

Orienta ĉirkaŭurbo

Tutjare loĝas mi en la loĝej' ofica,
mi tuj eksentas freŝon ekster ĝia pordo.
Salikoj verdaj svingas sin jen en zefiro,
min refreŝigas verdaj montoj per komforto.
Mi ĉe arbustoj min apogas por ripozi,
promenas laŭ montoj' laŭvole kun libero.
Subtila pluvo flirtas super kamp'aroma,
aŭdiĝas ĉirpoj birdaj sur kvieta tero.
Mi ŝatus vivi pacan vivon, sed, ve, vane,
ĉar implikiĝas mi ja en ofic-laboro.
Finfine mi forlasos la oficon, vivos
en monto kiel la ermit' kun kalma koro.

trad. Vejdo

送杨氏女

永日方戚戚，出行复悠悠。
女子今有行，大江溯轻舟。
尔辈苦无恃，抚念益慈柔。
幼为长所育，两别泣不休。
对此结中肠，义往难复留。
自小阙内训，事姑贻我忧。
赖兹托令门，任恤庶无尤。
贫俭诚所尚，资从岂待周。
孝恭遵妇道，容止顺其猷。
别离在今晨，见尔当何秋。
居闲始自遣，临感忽难收。
归来视幼女，零泪缘缨流。

Adiaŭado al mia filino

Tuttage dronas mi en tristo kaj malĝojo:
filino mia tuj foriros al la foro.
Hodiaŭ ŝi pretigas sin vojaĝi cele
al edziniĝo per boato sen konsolo.

De infaneco vi fratinoj perdis panjon,
mi flegas vin du kun duobla zorg' pro tio.
fratin' pliaĝa ame nutris la plijunan,

ĉe la disiĝo ili ploras kun larmstrio.

La trista sceno ĵetas min en grandan splenon,
ne povus mi vin tiri kiel novedzinon.
Instru' patrina mankas al vi de junaĝo,
mi maltrankvilas kiel servi bopatrinon.

Feliĉe via edzo havas bonan staton,
li montros indulgemon al misaĝo via.
Adoras mi ja al simpleco kaj ŝparemo,
mi nur elsendos vin per dot' ekonomia.

Esperas mi, ke vi respektu bogepatrojn
kaj bonkonduitu laŭ virina etiketo.
Ni ĉi-matene tuj disiĝos ĉe la bordo,
kiam revidos mi vin kun filin-koketo?

Ĉagrenon povas mi forigi kun temp-paso,
sed daŭras la disiĝa trist' senintermite.
Fratinon la plijunan rigardante hejme,
faligas sangan larmon mi ja afliktite.

trad. Vejdo

韦庄(约836-910)

Wei Zhuang (ĉ. 836-910)

金陵图

谁谓伤心画不成？画人心逐世人情。
君看六幅南朝事，老木寒云满故城。

Pentraĵo de la urbo Jinling

Kial la pentraĵo ne esprimas tristajn pasintaĵojn?
Ĉar pentristo nur por ŝtatregantoj pentris kontraŭ volo.
Vidu l' ses pentraĵ-kopiojn pri la Suda Dinastio:
l' urbo plenas je maljunaj arboj, frosta nub-tavolo.

trad. Vejdo

章台夜思

清瑟怨遥夜，绕弦风雨哀。孤灯闻楚角，残月下章台。
芳草已云暮，故人殊未来。乡书不可寄，秋雁又南回。

Nokta penso en palaco Zhangtai

Trista citro-sonoj ŝvebas nokte,

tra ventpluvo frida kaj ĉagrena.
Sola mi ĉe lampo, aŭdas kornojn,
sinkas post palacon l' lun' matena.

Verdaj herboj velkis ĝis pereoj,
ne amikoj venas min por teo.
Flugas suden jam sovaĝanseroj,
ne forportis vortojn kun hejmeo.
trad. Vejo

温庭筠（约812—866）

Wen Tingyun (ĉ. 812—866)

利州南渡

澹然空水对斜晖，曲岛苍茫接翠微。
波上马嘶看棹去，柳边人歇待船归。
数丛沙草群鸥散，万顷江田一鹭飞。
谁解乘舟寻范蠡，五湖烟水独忘机。

Pramado ĉe Lizhou

Rebriloj de la subiranta suno
helglimas sur rivero,
zigzaga bordo sin etendas svage
ĝis monta verda sfero.
Ŝarĝita per ĉeval' henanta, homoj
la pramo velas glite,
la homoj sub salikoj jen atendas
revenon ĝian vide.
Ĝi fendas akvon kaj dispelas birdojn
en herboj sur sabl-tero,
ardeo super vastaj rizokampoj
tang-flugas kun leĝero.
Kiu komprenas min en serĉado
al la ermita vivo?
Mi jam forgesas la vulgareajn pensojn
per la vaganta drivo.

trad. Vejo

瑶瑟怨

冰簟银床梦不成，碧天如水夜云轻。
雁声远过潇湘去，十二楼中月自明。

Plendemo

Mi ne povas sonĝi sur lunplena frida lito,
nuboj noktaj flosas en lazura la ĉielo.
la sovaĝanseroj flugas suden gakahante,
prilumas dekdu-etaĝan turon lun' kun helo.

trad. Vejdo

送人东游

荒戍落黄叶，浩然离故关。
高风汉阳渡，初日郢门山。
江上几人在，天涯孤棹还。
何当重相见？樽酒慰离颜。

Adiaŭado al amiko vojaĝanta orienten

Folioj flavaj falas sur landliman teron,
forlasas la pasejon vi kun ambici'.
Matena suno vidas vin ekiri frue,
per vent' rapida velas vi al celstaci'.
Karuloj ja atendas vian rehejmiĝon
en ĵonko ankaŭ, ho, kun via nostalgi'.
En kiu tag' ni revidiĝos vid-al-vide?
ĉagrenon vian tiam jen fordrinkos ni.

trad. Vejdo

Al orienta amiko

Jen folioj flavaj falas sur dezerto,
Vi forlasas la pasejon kun majesto
Hanyang-bordo sin dronigas en tempesto,
Yingmen-monto sunbaniĝas en mildverdo.
Ĉu amikoj vin atendas en la foro?
mi sopiras vian venon kun sincero.
Kiam min ĝojigos via reapero,
do ni trinku vinon kune en fervoro!

trad. Ardo

许浑（约791—约858）

Xu Hun (ĉ.791-ĉ.858)

秋日赴阙题潼关驿楼

红叶晚萧萧，长亭酒一瓢。
残云归太华，疏雨过中条。
树色随山迥，河声入海遥。
帝乡明日到，犹自梦渔樵。

En aŭtuna tago

Foliojn ruĝajn blovas vento kun susuro,
en pavilon' mi drinkas kun senĝena ĝuo.
Nuberoj ŝvebas al la monto malrapide,
subtila pluv' verŝiĝas monten en sibl-bruo.
La arba verdo etendiĝas ĝis la foro,
rivero muĝas foren en rapida fluo.
Atingos mi la metropolon Chang'an morgaŭ,
mi ŝatas l'senokupan vivon sen enuo.

trad. Vejdo

薛逢 (? - ?)

Xue Feng (?-?)

宫词

十二楼中尽晓妆，望仙楼上望君王。
锁衔金兽连环冷，水滴铜龙昼漏长。
云髻罢梳还对镜，罗衣欲换更添香。
遥窥正殿帘开处，袍袴宫人扫御床。

Plendemo en la palaco

Matene damoj jam sin ŝminkas sur l'etaĝ' dekdua,
atendas la imperiestron ili sur l' altano.
Ŝlositas firme l'palac-pordo per bestformaj ringoj,
klepsidr' gutadas ŝajne mordas koron de dam-klano.

Rigardas ili en spegulon por beligi sin plu
kaj ŝanĝas jen kaj jen silkveston ja kun bonodoro.
de fore ili vidas movojn en palaca halo,
servoknabin' ordigas liton por li en ĉi-horo.

trad. Vejdo

杨炯 (679-681)

Yang Jiong (679-681)

从军行

烽火照西京，心中自不平。
牙璋辞凤阙，铁骑绕龙城。
雪暗凋旗画，风多杂鼓声。
宁为百夫长，胜作一书生。

Militirado

Militfajr' alarmas regnan la ĉefurbon,
ni bravuloj dronas jam en maltrankvilo.
General' ekiras kun ordon' edikta,
sekvas fer-ĉevaloj jam dum militiro.
En neĝado militflagoj ŝajnas palaj,
vento urĝas la soldatojn en defilo.
Mi preferas sturmi sur la batalejo
ol verkaĉi kiel homo de gracilo.
trad. Vejdo

杨巨源 (755 - 832)

Yang Juyuan (755 - 832)

城东早春

诗家清景在新春，
禄柳才黄半未匀。
若待上林花似锦，
出门俱是看花人。

Frua printempo oriente de la urbo

Poetoj amas vidojn de l' nova primaver':
Salikoj ĵus junverdas ĉe sia ĝermaper'.
Se en ĝardeno reĝa sterniĝos buntaj floroj,
Eliros homoj ĉie por bel' jam en prosper'.
trad. Minosun

叶采 (? - ?)

Ye Cai (? - ?)

暮春即事

双双瓦雀行书案，
点点杨花入砚池。
闲坐小窗读周易，
不知春去几多时。

Improvisaĵo en la malfrua printempo

Sin movas du paseroj sur tegmento –
Sur librotablo ombre do promenas;
La inkoplato estas pripunktita
De flokoj la salikaj kiuj enas.
La Libron de Ŝanĝiĝoj mi legadas,

Sidante ĉe l' fenestro en libero,
Kaj ne perceptas, kiom da vivtempaj
Tagoj forpasis dum ĉi primavero.
trad. Minosun

虞世南 (558 - 638)

Yu Shinan (558 – 638)

咏萤

的历流光小，飘飘弱翅轻。
恐畏无人识，独自暗中明。

La lampiro

Kun eteta lum' flagranta,
Flirtas ĝi leĝere fole.
Por altiri la rigardon
Blinkas ĝi en nokto sole.
trad. Minosun

蝉

垂緜饮清露，流响出疏桐。
居高声自远，非是藉秋风。

Cikado

Ĝi suĉas freŝe dolĉan roson per anteno,
aŭdiĝas ĝia son' el branĉoj de platano.
Disflugas foren ĝia ĉirp' el alt-tereno,
tute sen helpo de la venta akompano.
Trad. Vejdo

元结 (719—772)

Yuan Jie (719—772)

石鱼湖上醉歌

漫叟以公田酿酒，因休暇，载酒于湖上，时取一醉。欢醉中，据湖岸，
引臂向鱼取酒，使舫载之，偏饮坐者。意疑倚巴丘酌于君山之上，诸
子环洞庭而坐，酒舫泛泛然触波涛。而往来者，乃作歌以长之。

石鱼湖，似洞庭，夏水欲满君山青。
山为樽，水为沼，酒徒历历坐洲岛。
长风连日作大浪，不能废人运酒舫。
我持长瓢坐巴丘，酌饮四坐以散愁。

Ebria kanto sur la lago Shiyu

Mi faras vinon el greno, kiun pagis la registaro kiel ofican salajron. En ferioj, mi portas vinovazon sur boaton pretan iri al lago, por tiutempe min amuzi per trinkado. Kun tia distro, mi lokas min sur la bordo, kaj tie drinkas antaŭ la lago, sur kiu la boato kun vino remas. Mi imagas, ke mi, dorse al Ba-monto, prenus ebriigaĝon sur Jun-monto en la lago Dongting, kaj ke miaj gastoj sporade sidus ĉirkaŭ la akvovasto, kiam mia ŝipeto velas petole sur la ondoj. Kaj nu tiuj homoj kreas jenan arion por kanti.

La eta lago Shiyu, same kiel granda Dongting,
Nun ŝvelas en somero ĉe l' helverda insulmonto.
La valo servas kiel glaso, kaj la lag' vinujo,
Ĉi drinkemuloj jen sporade sidas en la rondo.
Ne povas bari la vinotransporton de boato
Eĉ tio, ke dum tagoj furiozas vent' kaj ondo.
Ĉerpilon longan mi kruclide tenas, kaj l' aliaj
Ĉirkaŭe drinkas, nur ke estingiĝu desaponto.
trad. Minosun

元稹(779 – 831)

Yuan Zhen (779 - 831)

行宫

寥落古行宫，宫花寂寞红。
白头宫女在，闲坐说玄宗。

La vic-palaco

En la dezerta vic-palaco
Florar' soleca flame ruĝas.
Nur blankaharaj damoj side
pri l' reĝ' iama babiljuĝas.
trad. Minosun

遣悲怀三首

【其一】

谢公最小偏怜女，自嫁黔娄百事乖。
顾我无衣搜苧筐，泥他沽酒拔金钗。
野蔬充膳甘长藿，落叶添薪仰古槐。
今日俸钱过十万，与君营奠复营斋。

【其二】

昔日戏言身后意，今朝都到眼前来。
衣裳已施行看尽，针线犹存未忍开。
尚想旧情怜婢仆，也曾因梦送钱财。
诚知此恨人人有，贫贱夫妻百事哀。

【其三】

闲坐悲君亦自悲，百年都是几多时。
邓攸无子寻知命，潘岳悼亡犹费词。
同穴窅冥何所望，他生缘会更难期。
惟将终夜长开眼，报答平生未展眉。

Tri poemoj por mia edzino

1.

De kiam vi, filino plej amata en la hejmo,
Vin edzinigis al mi, ĉio iris malfavore.
Por mi, povrulo, pene vi prifosis vestokeston,
Aĉetis vinon kontraŭ l' ora harpingl' bonkore.
Sovaĝajn herbojn, kiel frandon, vi volonte prenis;
Dum por hejtaĵo vi ŝuldiĝis al soforoj oldaj.
Hodiaŭ el l' ofico mi enspezon grandan havas,
Per kiu mi oferas al vi kun memoroj fortaj.

2.

Iame ni parolis ŝerce pri aranĝ' postmorta,
Nuntempe antaŭ mi, ve, ĉio ĉi prezentas sin.
Vestaĵoj viaj estas preskaŭ almozodonaĵoj,
Nur kudrilujo restas, kiu nun konsolas min.
Kun via amo mi kompatas tiun servistinon,
Kaj pro sopira sonĝo monrimedon al ŝi donas.
Mi bone scias, ke bedaŭron tian ĉiu havas,
Sed ke ĝi, al mizera paro, des pli triste sonas.

3.

Sidante sola, mi veploras pri vi kaj eĉ mi mem:
Eĉ ni kunvivus— ĉu ne efemerus— dum jarcento?
Senfila Denyou* devis vei pri la Providenco,
Kaj Panyue** pri l' edzino vanis versi en lamento.
Nun ke ne plenumiĝas la kunest' en sombra tombo,
Ĉu la alia rekuniĝo ne estus ĥimera?
Mi, nur per ĉi sopiro dum sendorma tuta nokto,
Repagas al vi, kiu vivis zorga kaj mizera.

**Denyou: Homo el la dinastio Xijin, kiu oferis sian filon por elsavi sian nevon.*

***Panyue: Homo el la dinastio Xijin, kiu verkis tri elegiajn poemojn por funebri pri sia edzino.*

trad. Minosun

张泌 (? — ?)

Zhang Bi (? - ?)

寄人

别梦依依到谢家，小廊回合曲阑斜。
多情只有春庭月，犹为离人照落花。

Letere al la memorata

Post la disiĝo, pri l' knabino sonĝe mi sopiras:
Enkorte l' galeri' kun balustrad' zigzage iras.
Nur la printempa luno amoplena nun ankoraŭ,
Por mi, la afliktat', sur la falintajn florojn brilas.
trad. Minosun

张祜 (ĉ. 785 – ĉ. 849)

Zhang Hu (ĉ. 785 – ĉ. 849)

赠内人

禁门宫树月痕过，媚眼惟看宿鹭窠。
斜拔玉钗灯影畔，剔开红焰救飞蛾。

Dediĉe al honordamo

Super palacaj pordoj kaj arbaro
La luno kalme velas senbalzame;
Alloga, ŝi rigardas nur al nesto,
En kiu geardeoj noktas ame.
La jadopinglo eltirita el hararo
Oblikve sin reflektas sur lampbrilo, -
Ŝi forflankigas noktopapilion
Por savi ĝin de l' flamo de lumilo.
trad. Minosun

题金陵渡

金陵津渡小山楼，一宿行人自可愁。
潮落夜江斜月里，两三星火是瓜洲。

Jinling-pramejo

Tranoktis en loĝejo ĉe Jinling-pramejo,
mi turniĝadas, ve, maldorme kun ĉagreno.
Rivera tajdo malleviĝas sub la luno,
jen Guazhou kun du aŭ tri lampoj en lumtremo.
trad. Vejdo

何满子

故国三千里，深宫二十年。
一声何满子，双泪落君前。

Trista ario

Malproksime de l' nasklok' je tri mil lioj
mi restadas dudek jarojn en kortego.
Jen eksonas la tristiga melodio,
mia larmo flue perlas sen memrego.
trad. Vejdo

Trista melodio

for de hejmloko trimil liojn,
en la palac' dum dudek jaroj,
aŭdante tristan melodion
mi ploras ĉe vi per larmfaloj.
trad. Ardo

张继（约753在世）

Zhang Ji (vivanta ĉ. 753)

枫桥夜泊

月落乌啼霜满天，江枫渔火对愁眠。
姑苏城外寒山寺，夜半钟声到客船。

En boato ĉe acer-ponto

Luno sinkas, korvoj grakas en prujna vetero,
triste dormas mi sub fiŝistlampo ĉe acero.
Nokte el la templo Hanshan ekster l' urbo Gusu
sonorilaj tintoj ĝenas min sur la rivero.
trad. Ardo

张九龄（678 - 740）

Zhang Jiuling (678 - 740)

赋得自君之出矣

自君之出矣，不复理残机。
思君如满月，夜夜减清辉。

De kiam vi foriris...

De kiam vi foriris, mi ne povas

Labori ĉe kaduka la teksilo.
Sopiras al vi mi kiel plenluno:
Malkreskas ĉiunokte ĝia brilo.
trad. Minosun

望月怀远

海上生明月，天涯共此时。
情人怨遥夜，竟夕起相思。
灭烛怜光满，披衣觉露滋。
不堪盈手赠，还寝梦佳期。

Sopiro al karuloj sub la luno

La hela lun' leviĝas sur la maro,
vi kaj mi ĝin rigardas en ĉi-horo.
Mi plendas longe sub la nokt-vualo,
sed naskas sopiremon en la koro.
Sen kandellum' pli brilas la lulpalo,
min trafas en silk-vesto ros-rigoro.
Mi ne alsendu faskon da lunklaro,
sed dorme sonĝu pri vi en la foro.
trad. Vejdo

感遇

其一

兰叶春葳蕤，桂华秋皎洁。
欣欣此生意，自尔为佳节。
谁知林栖者，闻风坐相悦。
草木有本心，何求美人折？

其二

江南有丹橘，经冬犹绿林。
岂伊地气暖，自有岁寒心。
可以荐佳客，奈何阻重深。
运命惟所遇，循环不可寻。
徒言树桃李，此木岂无阴。

Penseroj

1.

En printempo orkideoj pompas verde,
en aŭtuno osmantfloroj freŝas pure.
La etos' vivplena sin prezentas vere
en sezono bona, taŭga ja nature.
La ermitoj en la mont' kapablaj gaje
flaras bonodoron, distras sin plezure.

Herboj, floroj ja aromas el la koro,
ĉu necesas pluki por belinoj nure?

2.

La mandarinarboj kreskas en sudlando,
ili ĉiam verdas tra la vintr-rigoro,
ne pro klimat-varmo en konvena loko,
sed kun pina karaktero de malmolo.
Povas mi ja rekomendi talentulojn,
kiel mi sukcesus sendi al la foro?
Oni la malsamajn sortojn trafas meme,
tamen kaŭzo iras kontraŭ nia volo.
Persikarboj povas stari jen arbare,
ĉu mandarinarboj ombras ne en ĥoro?
trad. Vejdo

张乔 (? - ?)

Zhang Qiao (? - ?)

书边事

调角断清秋，征人倚戍楼。
春风对青冢，白日落梁州。
大漠无兵阻，穷边有客游。
蕃情似此水，长愿向南流。

Priskribo por la limregiono

Kornado la aŭtunon faras freŝa,
gardistoj sin apogas al krenelo.
Venteto milda blovas sur tombejo,
terenon ora farbas varma stelo.
Turistoj vagas ĉe l' ekstrema limo—
forestas en dezerto gent-ribelo.
Fratec' tibeta estu kiel fluo
kuranta suden ĉiam kun fidelo.
trad. Minosun

张旭 (675-约750)

Zhang Xu (675-ĉ.750)

桃花溪

隐隐飞桥隔野烟，石矶西畔问渔船。
桃花尽日随流水，洞在清溪何处边？

Persikflora Rojo

mi svage vidas arkan ponton tra la fumnebullo,
sur bordo roka mi do petas ŝipon sen hezito.
persik-petaloj ĉiam flosas kun kuranta akvo,
je kiu flank' de rojo estas la kavern' de mito?

trad. Ardo

Persikflora rojo

Alta ponto svage riveliĝas en nubskuo,
ĉe l' uesta bordo mi demandas al fiŝisto:
ĉiutage persikfloroj drivas laŭ la fluo,
sed troviĝas kie la klar-roja fonta truo?

trad. Vejdo

张说 (667-730)

Zhang Yue (667-730)

蜀道后期

客心争日月，来往预期程。
秋风不相待，先至洛阳城。

Hasteco

Mi migradas aliloke kun hasteco,
kurso mia difinitas laŭ la plano.
Sed l' aŭtuna vent' ne volas min atendi,
ĝi jam flugas al ĉefurbo sen kompano.

trad. Vejdo

醉中作

醉后乐无极，弥胜未醉时。
动容皆是舞，出语总成诗。

En ebrieco

Ebrieco vekas ĉe mi grandan ĝojon,
pli plezure ol mi 'stas en sobra horo.
Mi min movas vere kvazaŭ en dancado,
el la buŝ' mi vomas versojn de trezoro.

trad. Vejdo

三月闺怨

三月时将尽，空房妾独居。

蛾眉愁自结，鬓发没情梳。

Plendemo en marto

Marto proksimiĝas al la fino,
mi en buduaro vivas sole.
Inter brovoj naskiĝas ĉagreno,
mi ne emas kombi jen laŭvole.

trad. Vejdo

朱庆馀(? - ?)

Zhu Qingyu (? - ?)

近试上张水部

洞房昨夜停红烛，待晓堂前拜舅姑。
妆罢低声问夫婿，画眉深浅入时无？

Novedzino sin ornamanta

Ruĝa kandel' en nupta ĉambro tutanokte flamis,
matene ŝi salutos bogepatrojn en salono.
Ĉu mia tualetto – kiam ŝi sin mem ornamis –
laŭmodas? Edzon ŝi demandas en subtila tono.

trad. Minosun

宫中词

寂寂花时闭院门，美人相并立琼轩。
含情欲说宫中事，鹦鹉前头不敢言。

Plendo de honordamoj

Izolas pompajn florojn la ŝlosita kortopordo,
du belulinoj solaj staras en jad-galerio.
Koviĝas pri palacaj la aferoj l' afekcio,
antaŭ papago ne kuraĝas vibri korokordo.

trad. Minosun

Plendemo pri palacaj aferoj

Solecas buntajn florojn post fermita kortopordo,
du belulinoj staras kune en jad-koridoro.
Elverŝi ili pretas la plendemon el la koro,
sed antaŭ la papago ŝlosas buŝon sen komforto.

trad. Vejdo

祖咏（? —? ）

Zu Yong (?-?)

终南望余雪

终南阴岭秀，积雪浮云端。
林表明霁色，城中增暮寒。

Lasta neĝo sur la monto Zhongnan

Ĉarmas dorsa flanko de la monto,
neĝo ŝajne flosas en nubmaro.
Arboj brilas en sunluma ondo,
frost' sentiĝas sur urboremparo.

trad. Veĵdo